


ÖSTERREICHISCHE  
NATIONALBIBLIOTHEK

701959-B

*Esp*







"Esperanto" S. 76/77



ÖNB



+Z122982806



Al

hi

„Ek

Le



E. DREZEN

Analiza  
historio

de

ESPERANTO-

-M OVADO

„EKRELO”

Leipzig

1931



Handwritten notes in the top right corner, including the name "Dr. C. J. ...".

Handwritten notes on the right edge of the page, including the name "Dr. C. J. ...".



E. DREZEN

*Al la defendanto  
de la sole ĝusta  
Kolektivisma roĝo de Esp-evoluo  
prof Th. Carr altstine La aŭtoro  
10-1-31.*

Analiza Historio  
de Esperanto-Movado

---

„EKRELO“

LEIPZIG 1931

701959-B



1891

Handwritten notes in blue ink, including the name "M. J. J." and other illegible text.

Historical  
Observations

1891

10123-B



## ANSTATAŬ ANTAŬPAROLO

Neniam kaj neniel oni povas verki plenan historion pri iu ajn faktaro sen atento de la ĝeneralaj ekzistoformoj de la homa socio, samtempa al la priskribata faktaro.

Tiu aserto absolute ĝustas por historio de la mondlingvo. Se eĉ la ĝisnunaj historiaj verkoj tiurilataj malmulte zorgis pri simila interligo de la mondlingva historio kun koncerna epoko kaj kun koncerna situacio socia, — tio nur malaltigis valoron de tiuj verkoj, faris el tiuj verkoj, laŭnome historiaj, simplajn kronologiajn registro-librojn de diversaj projektoj, eksperimentoj, provoj kaj faroj.

Ĉe la provo prezenti la historion de esperanto-movado kun certa sociala enhavo tute ne necesas detala priskribo de diversaj gravaj kaj malgravaj esperantaj agit-kaj propagand-okazaĵoj, ĉar por la ĝenerala mondhistorio ĉiuj okazaĵoj de esperanto-historio estas malgravaj kaj ne importantaj. Multe pli gravas eltrovo de tiuj fortoj, kiuj influis esperanto-movadon, kiuj ĝin subtenis kaj kreskigis. Necesas registroj de konstantaj ŝanĝoj, okazintaj en tiuj movfortoj. Necesas klarigoj pri malapero de unuj el tiuj fortoj kaj pri apero de pluaj fortoj novaj.

Konforme al ĉi-ĉio la nun eldonata Analiza Historio ne celas prezenti plenan kaj tutampleksantan historion de la esperanto-movado. Relative malmultaj estos en ĝi la kronologiaj datoj kaj citaĵoj pri diversaj faktoj okazintaj.

Tiu Historio celas prezenti kvazaŭ certan komentarion de la faktoj de esperanto-historio — komentarion, kiu donus laŭpove socialan analizon por tiuj ideoj kaj fortoj, kiuj dum certaj periodoj regis kaj antaŭenpuŝis la esperanto-movadon, kiuj markis certajn periodojn de tiu movado.

Ĉe prezento de simila analiza historio fariĝas ebla certa antaŭvido de la vojoj de plua evoluo kaj progreso, fariĝas ebla certa historia prognozo por la estonto.

Tial, analizante la mov-fortojn de esperanto-movado en pasinto, ni devas ĉiam pleje streĉi la atenton por laŭpove trovi la mov-fortojn de la estonta evoluo de la mond-lingvo.

La aŭtoro de tiuj skizoj bone komprenas, ke al multaj legantoj eble ne plaĉos, eble ne estos agrablaj — la konkludoj tirataj el la verko, ke multajn eble senluiziigos tiu verko. Tamen li esperas ke al multaj aliaj la analizo de la movfortoj de la esperanto-movado donos novan instigon, novan volon kaj deziron batali por la lingvo internacia, por ĝia plua kreskigo kaj disvastigo.



---

Por helpi al legantoj de tiu ĉi verketo fari pluajn historiajn esplorojn kaj kontroli la faktojn kaj asertojn en ĝi entenatajn, en la fino de la libro estas donata romcifere numerita listo de ĉefaj verkoj pri esperanta historio. En la teksto de la libro en krampoj estas romcifere indikata koncerna fonto; la ciferoj post la romcifera indiko montras la paĝon de verko, kiu entenas tiun aŭ alian informon.

**E. Drezen**

Moskvo,  
12. V. 30.



## I. LA IDEISMA FORTO EN LA KOMENCA PERIODO

### La grado de ĝenerala prepariteco por akcepto de la lingvo internacia

La lingvo-projekto esperanto povis sukcesi kaj sukcesis kiel lingvo internacia nur dank'al speciale favora situacio, dank'al tio, ke ĉe certaj sociaj rondoj jam estis bone preparita la idea tereno por akcepto de la lingvo internacia.

La bezono de lingvo internacia — se ne fakte, reale, tiam principe — estis sentata de la rondoj grandkapitalistaj, kiuj, rapide kreskigante sian influon kaj rolon en la mondregado, povis esperi per la L. I. vastigon de sia merkato kaj faciligon de siaj komercaj rilatoj. La et-burĝaj rondoj vidis en L. I. pluan faciligan teknikan ilon por internacia reciproka proksimigo de la popoloj, por plua teknika faciligo de la vivo. Diversaj fluoj, tendencoj kaj organizoj internaciaj povis esperi ke L. I. servos al plua vastigo de iliaj ideoj kaj aspiroj. La klaso laborista komencis sin ree organizi internaciskale. En la j. 1889 estis fondita la II-a Internacio. Ĉe certaj avangardaj pioniroj de la klaso laborista naskiĝis ideoj pri la granda servo, kiun povus fari al la homaro — lingvo komuna. Ankoraŭ dum la II-a kongreso de la I-a Internacio, en la j. 1867 en Lozano tiu ideo estis favore akceptita (VI, p. 12).

Apud tiuj sentoj pri bezonateco kaj utileco — ekzistis jam ankaŭ certaj sentoj pri ebleco krei lingvon internacian. La kreita de Schleyer lingvo volapük ĝuste dum la jaroj 1880—1889 sukcesis doni multajn pruvojn pri uzebleco de lingvo artefarita ĉe internaciaj rilatoj.

Kiam en la j. 1887 aperis la unua publikigita de Zamenhof lernolibro de la nova lingvo, — la semo trovis bone preparitan grundon. La lingvo sukcesis rapide trovi por si unuajn adeptojn. Fakto, ke Zamenhof — male al Schleyer — lerte solvis ne nur la problemon pri internacia vortaro; plua fakto, ke Zamenhof ne ligis estontan evoluon kaj pliriĉigon de la L. I. kun sia persono, ke li proklamis la principon pri kolektiva iom post ioma plua evoluo de la lingvo (VII, pp. 29—49) — tiuj faktoj kaŭzis ne nur laŭnombran kreskon de la esperantistaro, sed ankaŭ ĝian baldaŭan superkreskon de la volapükistaro, kies lingvo estis ĝenata en sia evoluo per la formoj neinternaciaj de la vortaro kaj per tro personeca lingvo-dependo de la lingvo-aŭtoro.

### La unuaj propagandaj faroj de Zamenhof

Ni ne intencas ĉi-tie rakonti pri la epoko, kiam la lingva kerno estis kreata de Zamenhof, kiam la sola persono, uzanta tiun lingvo-ker-



non estis ĝia iniciatinto mem. Pri la iniciatinto de la lingvo, pri lia personeco kaj pri lia persona rolo en la mondlingva movado—rigardu koncernajn verkojn (VII).

En la jaro 1887 en Varsovio aperis unuaj lernolibroj de la nova lingvo internacia, komence por rusoj, poste por poloj, francoj kaj germanoj.



L. L. Zamenhof

(laŭ portreto aperinta en „Vollständiges Lehrbuch“, Nurenberg 1889)

Nature, tiu provo ne povis sukcesi, ĉar inter la milionaj amasoj provizore estis ne sufiĉa la konscio, ke la L. I. por ili nepre necesas, kaj ke la lingvo Zamenhofa garantiite estos la vera L. I.

### La morala interna idearo de Zamenhof

La praktikisma argumentado de Zamenhof certe neniel signifas, ke li venis al la ideo krei lingvon internacian nur pro konsideroj pure praktikaj. Li agis laŭ ideoj plej altinspiraj kaj idealistaj (VII). Jam en la j. 1878, ĉe la unua gimnaziana kunveno, festinta kreon de la nova «Lingve Uniwersala» oni kantis: «falu, falu malamikeco de la nacioj,

Tiuj lernolibroj estis samtempe la unuaj propagandiloj por la nova lingvo. Ili enhavis la tutan argumentaron, kiun pripensis Zamenhof dum jaroj kaj kiu lia opinie devis konvinki la mondon pri la ĝusteco de la solvo proponata.

La epoko de rapida fortiĝo de grandkapitalistaj tendencoj en la socio postulis, ke ĉiuj fakoj de la vivo moderna, ĉiuj movadoj laŭpove adaptiĝu al la praktikismo de tiu epoko. Tion bone sentis ankaŭ Zamenhof mem, argumentinta en sia «Unua libro» pleje per konsideroj praktikaj pri la neceso kaj eventuala rolo de L. I., pri perfektaj ecoj de la nova sistemo kaj eĉ pri ĝia tuja senpera uzebleco. Zamenhof provis eĉ krei el la praktikuloj, logeblaj al la L. I., fortan movadon por eventuala adapto de sia sistemo. Tiucele li proponis en la «Unua Libro» aranĝi tutmondan kolekton da promesoj — lerni la lingvon, kondiĉe ke entute estos kolektitaj 10.000.000 da tiaj promesoj.



estas jam tempo...» (VIII, p. 420). Jam en Unua libro estis esprimplenaj poezioj, skizantaj esencon de la estonta «interna ideo esperantisma». Sed, malgraŭ tiuj konvinkoj internaj, Zamenhof volis iri al la vasta publiko ne kun siaj internen-kaŝitaj aspiroj, sed kun konsideroj kaj argumentoj pure praktikaj.

Nur al la jam varbitaj adeptoj li malkovris siajn konvinkojn internajn. En la «Aldono al la Dua libro» li jam skribis pri «nia sankta afero» (p. 4). Ĝuste tiu termino trovis pli poste vastan akcepton kaj komprenon inter la esperantistaro.

### La ideoj akceloj de la unuaj esperantistoj

La unuaj lernolibroj aperis en Rusio. Ankaŭ en Rusio la nova lingvo trovis siajn unuajn adeptojn. Ankoraŭ en la j. 1889—80% de la tuta esperantistaro estis ruslandanoj.

Specialaj soci-politikaj kondiĉoj de Ruslando kaŭzis, ke en la reakcia carista lando vaste ekfloris kaj trovis komprenon la internaj ideoj de esperanto. La inteligentularo de tiu lando en longa kaj persista batalado kontraŭ la carismo kaj kontraŭ obskurantismo ĉiuspeca — facile entuziasmiĝis por la noblaj homamaj ideoj de Zamenhof. En plua formigo kaj fiksigo de tiuj ideoj la unuaj rusaj esperantistoj ludis gravan rolon. Tiuj iliaj meritoj estas konfesataj de ĉiuj historiistoj esperantaj. La rusoj donis el sia anaro la unuajn verkistojn. Ili kreis la unuajn literaturajn verkojn. En Ruslando troviĝis plej unuaj, fervoraj propagandistoj.

La rusoj forĝis la internan enhavon de esperanto. Sed A. Zakrzewski prave rimarkas: «Ne malgrandigante la meritojn de rusaj esperantistoj, oni devas konsideri plej grava, ke la ĉefaj organizaj centroj en tiu ĉi epoko estis tamen kreitaj en Bavarujo per laboroj kaj rimedoj de germanoj» (V, p. 56). Estis bonŝanco por nova lingvo, ke al la idealismaj rusoj venis kun helpo pli praktikaj, organizkapablaj okcidentanoj el la lando kaj regiono (Suda katolika Germanio), kie naskiĝis, ekĝermis kaj fine fiaskis volapük.

Ankaŭ tiuj unuaj eksterrusiaj esperantistoj estis certgrade homoj pli ideismaj ol praktikaj. Eĉ se ili estis pli frue partianoj de volapük, ankaŭ al tiu lingvo ilin logis ĉefe la homamaj idealoj, ligataj kun la ideo pri lingvo universala.

Paul Nylén—unu el la idealismaj volapükistoj, poste aliĝinta senrezerve al la interna ideo esperanta, skribis («La Duonmonata» I j. 1909, № 6, p. 66). ke en la j. 1891 li studis volapük - on kaj «provis varmiĝi ĝis entuziasmo por ĝiaj barbaraĵoj, entuziasmo, kies natura celo estis la ideo mem de internacia helplingvo, sed kies konkreta objekto ne taŭgis por nutradi longdaŭre la entuziasmon».

Personoj kun konceptoj idealismaj, similaj al P. Nylén, troviĝis en ĉiuj landoj kaj per ilia helpo esperanto plej ofte trovis en tiuj eksterrusiaj landoj la unuajn radikojn por sia plua evoluo.



Ankoraŭ la 23-XII - 1889 d-ro S. Bogdanov el Sofio en sia nelongdaŭre ekzistinta gazeto «Mondlingvo» (p. 55) skribis: ... «en mia batalo por nia sankta afero...» «en la nomo de la bono de l'homaro...»

Tiaj estis la vortoj kaj ideoj, kiuj entuziasmigis ĉiujn unuajn esperantistojn por ilia malfacila laborado.

Sed la rusaj esperantistoj plejmultis.

Kiam en la fino de la j. 1899 en Nürnberg komencis aperi la unua gazeto de la nova lingvo «La Esperantisto» — ruslandanoj estis ĝiaj ĉefaj legantoj, abonantoj kaj kunlaborantoj.

Ruslandanoj pleje klopodis antaŭenpuŝi la novan lingvon en komenca periodo de ĝia apero.

En la rubriko de «Novaĵoj» de la gazeto «Esperantisto» oni povas trovi kortuŝajn informojn pri tio, kiamaniere la malmultnombraj entuziasmuloj tiutempaj oferis al la nova lingvo siajn ideojn kaj konsilojn, sian energion, sian laboron kaj sian monon, eĉ se ĝi sumis nur kelkajn kopekojn. Sento de kolektivisma kunlaboro estis tre forta jam ĉe la unuaj pioniroj de esperanto. Kaj tiu sento pleje servis al interna solidiĝo de la esperantistaro kaj al solidiĝo de ilia lingvo.

Esencon de la ideismaj aspiroj de la esperantistaro frutempa elmontris grafo Tolstoj en sia konata letero de 27-IV - 1894: «La lernado de esperanto kaj ĝia disvastigado estas do sendube kristana afero, kiu helpas al kreo de la regno de dio, afero, kiu estas la ĉefa kaj sola celado de la homa vivo».

E. Privat ne vane skribis: «Konstanta insistado de la ruslandaj samideanoj pri la interhoma fratiga flanko de la afero kreis inter la esperantistoj ĉiulandaj tiun tre belan poezian senton, kiun oni pli malfrue nomis «interna ideo de esperantismo».

Plej bonan influon ĝi havis sur la lingvo, ĉar ĝi donis al ĝi spiriton tre fortan kaj per fervoro kunigis la esperantistojn kun esperanto kvazaŭ popolon kun ĝia lingvo» (I, p. 52).

Ankaŭ en plipostaj tempoj la ideoj, dorlotitaj de rusiaj esperantistoj, havis certan bonfaran influon sur la plua evoluo kaj progreso de la lingvo.

Ĉe la reforma krizo de la j. 1893 (vidu ĉap. II p. 16) la rusaj esperantistoj pleje kontraŭstaris la reformo-provojn. La reforma ideo trovis subtenantojn ĉefe ekster la rusaj esperantistoj.

Same en la j. 1908 ĉe la iniciato de IDO-reformoj (vidu ĉap. VII p. 52) la rusaj esperantistoj, krom malmultaj esceptoj, restis senŝanĝe fidelaj al klasika esperanto kaj al kolektivaj principoj de ĝia evoluo.

Tio pleje rezultis, ĉar la rusaj esperantistoj estis per la «interna ideo» pli intime ligitaj kun la lingvo ol la esperantistoj eksterrusiaj, ĉar la mondlingva movado estis en Rusio multe pli idealista ol en landoj aliaj.





## II. PROVOJ ORGANIZI KAJ REFORMI LA LINGVON EN LA KOMENCA PERIODO

### Provo doni la gvidadon de movado en manojn de Amerika filozofia societo

Zamenhof neniam konsideris sian lingvon kiel idealan. Li havis konscion pri siaj fortoj kaj kapabloj. La ŝarĝo — esti aŭtoro, iniciatinto kaj gvidanto de la lingvo tro premis liajn ŝultrojn (VII, p. 37).

Tial li rifuzis siajn rajtojn aŭtorajn pri la lingvo. Tial li proklamis la kolektivisman principon de plua lingvo-evoluo. Tial li dum tuta sia vivo provis trovi iun apogon por la organizado de la afero ĉu ĉe aŭtoritatoj eksteresperantistaj ĉu ĉe organizitaj esperantistoj.

Tial li celis labori por la lingvo ne nur ĉe idealismoj diversspecaj, sed ankaŭ inter homoj de praktiko, de vivo reala.

Se, speciale en Rusio, similaj provoj restis sensukcesaj — vole-nevole li estis devigita ĉefe gvidi sian agitadojn inter la idealisma intelektularo.

Dum la j. 1887—88 la Amerika Filozofia Societo proprainiciate sin okupis pri la problemoj de la lingvo internacia. Ĝi konsideris tiun problemon pure teknika kaj neniel atentis la kolektivisman elementon de la lingvo-evoluo.

Tamen konatiĝinte kun la sistemo de Zamenhof ĝi trovis ĝin plej perfekta el ĉiuj aliaj sistemoj kaj rekomendis ĝian praktikan vastigon (VI, p. 16). Por organizi tiun vastigon ĝi proponis al diverslandaj sciencaj asocioj organizi specialan Internacian kongreson, kiu difinite solvus la starigitan problemon. Zamenhof kontente povis en la «Aldono al la Dua libro», publikigita en junio de la j. 1888, diskonigi tiujn decidojn kaj deklari, ke «la fina formo kiun la kongreso donos al la lingvo, devas esti leĝdonanta por ĉiuj amikoj de la lingvo internacia, se la kongreso eĉ trovas necesa ŝanĝi la lingvon ĝis nerekonobleco».

Sed la espero de la Filozofia societo antaŭenpuŝi la solvon de la problemoj per interveno de aŭtoritatoj sciencaj ruiniĝis. La tereno ne estis ankoraŭ preparita, por ke la scienculoj interesiĝu pri tiu problemoj. Nur tre malmultaj sciencaj asocioj promesis sian partoprenon en la projektita scienca kongreso (V. p. 25).

### Provo organizi ligojn esperantistojn

Zamenhof komence estis tre ĉagrenita pro la falo de la entrepreno de la Filozofia societo. Tiam venis al li ideo, esprimita jam pli frue



en la Unua Libro (p. 29), pri kreo de de la Lingva Akademio, elektota de la esperantistoj. En la gazeto «Esperantisto» 1889 j. № 3 de la 20 decembro Zamenhof ĉagrene konstatis, ke «la afero estas sen kondukanto ... Ni bezonas havi ian Ligon aŭ Akademion, kreitan de esperantistoj kaj aŭtoritatan de ili».

Tial li provis fondi la Ligon. En la marta numero de j. 1890 (№ 6) li anoncis, ke la Ligo estas fondita. En la sama numero de la gazeto estis publikigita teksto de la Liga Regularo. Tiu teksto, kvankam subskribita de Zamenhof, estis fuŝita de la Nürnbergaj esperantistoj, kiuj fakte eldonadis la gazeton. Rezulte aperis multaj malkontentuloj. Multaj timis, ke la Ligo sin okupos pri la lingvo-reformado kaj donos neniun realan utilon al la movado. En sekvontaj numeroj de la gazeto V. de Majnov kaj E. de Wahl el Peterburgo batalis por la ideo, ke ne Akademio, sed la verkistoj faras la lingvon, ĉar la leĝoj de Akademio ne ricevas obeon, dum nerimarkeble kaj tute nature transformiĝas ĉiuj vivantaj lingvoj en sia ĉiutaga literaturo. (I, p. 33).

Mankis subtenantoj kaj reala bazo al la Ligo; kaj jam en decembro de 1890 en № 12 de la gazeto Zamenhof sentis sin devigita nomi la Ligon «infano malvive naskita».

Tamen ne ĉiuj esperantistoj estis kontentaj. Apud la idealismanoj, senrezerve donintaj sin al la nova lingvo, — inter la esperantistoj ĉiam plinombriĝis nova speco de mondlingvanoj, kiujn krom la interna ideo interesis ankaŭ la formo de la lingvo kaj la organizaj problemoj de la nove naskiĝanta movado.

### **La esperantistoj celantaj reformi esperanton**

Kelkaj esperantistoj «ne vidas kaj ne sentas la veran signifon kaj utilon de lingvo internacia kaj, kvankam ili eĉ diligente okupas sin je ĝi, ili tamen vidas en lingvo internacia nur ludon» — skribis J. Janowski en «Esperantisto» (1894 j., № 49, p. 8).

Similaj ludantaj esperantistoj apartenis nature ne al la firmaj ideismaj partianoj de la lingvo. Ili plej ofte restis fremdaj al la «kara lingvo», al la «sankta afero» kaj al la «interna ideo». Ili restis esperantistoj nur ĝis kiam la lingvo ilin interesis. Ili ne lasis esperanton nur ĝis kiam ili vidis iun praktikan eblon eksperimenti aŭ ludi kun tiu lingvo, praktiki tiun lingvon, partopreni en ĝia perfektigado, ĝis kiam ilia personeco povis ĝui ion de la lingvo.

### **Volapükistoj venintaj al esperanto**

Speciale multajn similajn ludantajn lingvo-amatorojn donis al esperanto la falinta volapük-movado. De volapük al esperanto venis nature nur plej fortikaj elementoj. Disreviĝintoj en volapük lasis la mondlingvan aferon por ĉiam aŭ almenaŭ por longe. Al esperanto aliĝis sendube nur la plej entuziastaj. Sed eĉ tiuj esperantistiĝintaj volapükisti-



stoj estis tro saturitaj per la tendencoj konsideri lingvon internacian kiel pure teknikan instrumenton, korekteblan kaj perfektigeblan laŭ pure personaj preferoj. Malmulte aŭ neniom ili atentis la kolektivisman kreadon, kiu devis laŭ ideo de Zamenhof fariĝi ĉefa bazo por plua evoluo de la L. I.

La kaŭzoj, kial volapükistoj forlasadis volapükon kaj venis al esperanto, estis bone esprimitaj per la konfeso de iama volapükisto A. Grabowski («Lingvo Internacia», 1910 j. № 2, p. 62), kiu skribis: «kvankam mi havis sufiĉan kapablon por lingvoj, mi baldaŭ konvinkiĝis, ke ne estas facile fariĝi lerta volapükisto. Por ekaŭdi, kiel sonas la lingvo en buŝa uzado, mi faris vojaĝon kaj vizitis eminentajn volapükistojn, tamen mi ne atingis mian celon. La sinjoroj-redaktoroj sciis skribi volapüke, ne formetante la vortaron el la manoj, sed ili ne sciis paroli la tro malfacilan lingvon. La ĉefa kaŭzo de ĝia pereco estis do ne la apero de esperanto, sed la cirkonstanco, ke volapükneniam fariĝis kaj povis fariĝi lingvo viva, flue parolata».


Tia traktado de la problemo mondlingva, tiaj motivoj de aliĝo al esperanto neniel garantiis firmecon de la plejmulto el la aliĝintoj; ĝuste tial inter la volapükistoj plej ofte kreskis tendencoj ankoraŭ pliperfektigi esperanton, organizi la esperanto-movadon tiamaniere, ke tiu movado troviĝu sub influo de iliaj personaj gustoj kaj preferoj.

Certe ankaŭ inter la iamaj volapükistoj troviĝis sindonaj batalanoj por esperanto, intime ligiĝintaj kun esperanto dum sia batalo kontraŭ volapük.

Simila eksvolapükisto, senrezerve sin doninta al esperanto, estis L. Einstein, kiu iniciatis la transiron de Nürnberga volapüka klubo al esperanto kaj kiu poste organizis eldonadon de la gazeto «Esperantisto». Kiam li mortis je la fino de la j. 1890, Zamenhof perdis en lia persono unu el siaj plej idealismaj kaj sindonaj kunlaborantoj. Post morto de Einstein Zamenhof estis devigita provi mem pluen eldoni la gazeton. Tamen jam ĉe la fino de la j. 1891 Zamenhof tropremita de financaj kaj personaj zorgoj, estis devigita anonci ĉesigon de la gazeto. En la lasta tiujara N-o de la gazeto li skribis: «Kun la nuna No mi devas interrompi mian laboradon en nia afero».

### Trompeter — mecenato de esperanto


Tiam venis nova persono, termezuristo W. H. Trompeter el Schalke en Vestfalia. Li prenis sur sin ĉiujn eldonkostojn de la gazeto kaj oferis krom tio 100-markan monatan salajron por la redaktisto.



L. Einstein



Sendube al W. Trompeter multon ŝuldas la plua ekzisto de esperanto. Kiam Trompeter en novembro 1901 j. mortis en Essen, Zamenhof skribis: «Se nia afero ne mortis, sed vivas kaj floras — tio ĉi estas en tre granda parto merito de Trompeter» («Lingvo internacia», 1901 j., № 10—11, p. 140). La samon recitis Zamenhof dum la unua kongreso en Boulogne.



**W. H. Trompeter**

Tamen Trompeter apartenis al tiu kategorio de esperantistoj, kiuj ĉefe atentis la praktikajn flankojn de la lingvo kaj malmulte komprenis ĝian propran evoluoforton. Trompeter, vidante malrapidan progreson de esperanto, devigis en la j. 1893 d-ro Zamenhof okupiĝi pri prezento de diversaj reformvariaĵoj. Vere, Zamenhof neniam kaj nenie plendis publike pri tiurilata premo flanke de Trompeter, sed nian aserton bone pravas privata letero de d-ro Zamenhof al d-ro Guminski en Saratov, datita la 29-VIII—94.

En tiu letero Zamenhof skribis: «En la fino de la j. 1893 s-ro Trompeter sciigis min, ke se mi ne elpaŝos persone kun radikalaj reformoj, li ĉesos eldonadi la gazeton... tiam alpremita al la muro kaj vidante nenian helpon mi vole-ne-vole devis cedi kaj elpaŝi kun propono de radikalaj reformoj» (VIII, p. 496). Trompeter — mecenato de la lingvo — volis instigi, ke la lingvo evoluu laŭ vojoj, kiujn li konsideris plej ĝustaj.

### La reformprojekto de la j. 1894.

De la N-o 1 (49) de «Esperantisto» 1894 j. Zamenhof komencis disvolvoni de detala plano pri reformoj en la lingvo. Tiu plano estis poime finpublikigita en apartaj NN-oj de la gazeto. La proponitaj reformoj devis esti voĉdonataj de la tuta abonantaro de la gazeto. Trompeter provis influi la voĉdonantojn. Du monatojn antaŭ la limtempo de voĉdonado li sciigis en «Esperantisto» la tutan esperantistaron, ke li mem voĉdonos por la reformo.

Sed la reformemuloj ne ĉiam konsentis kun la proponoj farataj. Ja ĉiu havis siajn proprajn ideojn pri la plej bonaj reformoj. Samtempe la plejmulto de esperantistoj, uzantaj la lingvon, akre ekprotestis kontraŭ ĉia reforma tendenco. S-ino Okromĉedjelova el Moskvo skribis: «Neniu volus lingvon, kiun li devus senĉese relernadi». N. Borovko skribis ankoraŭ pli katerogie: «Mi faras proponon plej gravan el ĉiuj — fari neniun proponon pri ŝanĝoj, ĉar tio estas tre glita vojo... El tiu fakto, diris Voltaire, ke ĉiu lingvo estas ne perfekta, ne sekvas, ke oni devas ĝin ŝanĝi» (V, p. 44).

Ankaŭ pioniro de franca esperanta movado L. de-Beaufront argumentis kontraŭ reformado de la lingvo, ĉar «se la legantoj de la gazeto



ĉiam renkontos proponojn de ŝanĝoj, ili pensos, ke la lingvo ne estas ankoraŭ preta, finita» (V, p. 44).

Aŭ iĝis ankaŭ aliaj fortaj voĉoj kontraŭ iu ajn reformo. Estis tiuj de Devjatnin, Ostrovski, Nysten, Lojko, kaj ankaŭ de Grabowski, Kofman, Lemaire. La unuaj kvar estis eminentaj esperantaj literaturistoj, adaptiĝintaj al la evolu-karaktero de esperanto. Ili restis sensanĝe fidelaj al esperanto. Grabowski elmontris pli malfrue certan reformemon, sed poste revenis al esperanto, kies vera poezia majstro li estis. La lastaj—Kofman kaj Lemaire sekvis ekzemplon de Beaufront kaj fariĝis pliposte ĉefoj de la skisma ido-movado (Vidu ĉ. p. VI, p. 45). Voĉdonante en la j. 1893 kontraŭ reformoj, ili agis tiel pro konsideroj taktikaj, celante eviton de esperantoruiniĝo, kaj tute ne pro atento de la ideo pri iompostioma senĉesa kolektivisma formigado de la lingvo.

Dum novembro 1894 okazis la dua fina kalkulo de voĉdonoj pri la reforma demando. Kontraŭ ĉiaj reformoj estis—157; por la reformoj, ellaboritaj de d-ro Zamenhof estis—11; por tute aliaj reformoj—3, kaj diversajn ŝanĝojn en la reforma projekto de Zamenhof postulis—93 voĉdonantoj. Inter la lastaj estis ankaŭ Trompeter—la financa mastro de «Esperantisto», sed la lingvo restis ne reformita.

### Postreforma krizo de esperanto

Jam en julia N-o 1894 j. de «Esperantisto», en kiu aperis unua komuniko pri provizoraj rezultoj de la voĉdonado, troviĝis ankaŭ komuniko, ke la subteno de Trompeter por la gazeto estos ĉesigata ĉe la fino de j. 1894.

En verkoj pri esperanta historio oni ordinaras asertas, ke Trompeter promesis al la gazeto sian subtenon por daŭro de tri jaroj. Tamen nenie oni trovas originalajn citaĵojn, ke tia estis efektive lia intenco en la j. 1891. Tute male, en la januara N-o de «Esperantisto de la j. 1892 Zamenhof skribis, ke por ekzisto de la gazeto «la danĝero pasis por eterne... ĉiuj zorgoj estas por ĉiam forigitaj».

Trompeter sendube ĉesigis sian subtenon al la gazeto ne pro tio, ke finiĝis la tempo, por kiu li promesis la subtenon, sed ĉar li restis mal-kontenta kun la rezultoj de la voĉdonado pri reformoj.

Zamenhof estis ree devigita preni sur sin la ŝarĝon prizorgi eldonadon de la gazeto. La situacio estis por adeptoj de esperanto tre malfacila. Speciale multon malgajnis esperanto en Germanio en sia organizacitadelo. Post la reforma diskut-periodo de la j. 1894 la plejmulto el germanaj volpükistoj, venintaj al esperanto, retiris sin de la movado. Ili konsideris esperanton pli perfekta ol volpük, sed ili volis ĝin ankoraŭ pliperfektigi laŭ siaj personaj preferoj. Ili restis ne komprenantaj la internan forton de la kolektivisma lingvo-kreado. Ĝis la j. 1903 en Germanio eĉ ne ekzistis iu esperanta societo. Schmitt, prezinto de la Nürnberga klubo esperantista (pli frue — volpükista), kune kun siaj klubanoj lasis esperanton kaj aliĝis al I idom-Neutral, por pli poste en la j. 1903 refoje lasi I idom-Neutral kaj aliĝi al ido.



Malfortiĝo de la movado kaŭzis, ke komencis heziti kaj dubi pri vivkapableco de esperanto ankaŭ personoj, kontraŭstarintaj la reformojn en la j. 1894. Grabowski—iama volapükisto, laŭtempe la unua



A. Grabowski

post Zamenhof esperanta verkisto — estis ankaŭ infektita per tiuj duboj. Dum la reforma periodo de la j. 1894 li estis kontraŭ reformoj, sed jam post unu jaro li forlasis esperanton kaj okupis sin pri diversaj reformo-projektadoj. Nur post 9 jaroj, en la j. 1903 li revenis al esperanto, ekkompreninte la kolektivajn karakteron de esperanto-evoluo kaj ĝian ĉiuflankan superecon kompare kun izolita personeca lingvo-reformado kaj eksperimentado.

Perdinte multajn amikojn de sia lingvo, Zamenhof vole-ne-vole povis serĉi subtenon nur inter la idealismanoj, subtenantaj la lingvon ne pro ĝiaj internaj kvalitoj, sed pro la altaj ideoj kun ĝi ligitaj.

Al la j. 1895 rilatas la provoj pli intime ligi esperanto-movadon kun tolstojanismo. Laŭ sekretaj arkivoj de la cara politika polico—ekstis tiutempe ĉe rusaj tolstojanoj projektoj ekuzi esperanton por propagando de siaj ideoj. Sed ĝuste tiuj projektoj donis al la malforta esperanto novan fortan baton.

La cara cenzuro, informita pri la alianco starigota inter tolstojanoj kaj esperantistoj, bonuzis la unan aperon de artikolo de Tolstoj en «Esperantisto» por malpermesi la gazeton en Ruslando. Ĉar la plejmulto de legantoj estis ruslandanoj, tiu malpermeso fakte kaŭzis ĉesigon de la gazeto. Esperantistoj restis sen iu gazeto, organizanta kaj direktanta ilian forton. Sed ree troviĝis altruistaj subtenantoj de la afero.

### La gazeto «Lingvo Internacia»

Post kelkmonata interrompo, en la j. 1896 komencis aperi en Upsala (Svedio) nova gazeto «Lingvo Internacia». Ĝin subtenis grupo de rusaj esperantistoj, gvidataj de V. Gernet. Ĉe la fino de j. 1898 ĝia redaktanto Paul Nylén anoncis, ke li devas ĉesigi sian laboron por la gazeto. Zamenhof ne povis preni sur sin la eldonadon. Tamen troviĝis ankoraŭ unu svedo-subtenanto, daŭriginta la eldonadon de la gazeto en Lulea dum la j. 1899. Sed por la j. 1900 estis kolektitaj nur 216 abonoj. Ree al la gazeto minacis neceso malaperi. Tiam venis Paul de Lengyel el Szeged (Hungario), kiu prenis sur sin la eldonadon de la gazeto. Je la fino de 1901 j. ankaŭ la redaktado de la gazeto estis transdonita de P. Nylén komence al P. de Lengyel kaj poste el Paul Fruictier en Parizo.



Sindonaj batalantoj, malmulte zorgantaj pri la lingvo-formoj, sed ĉefe akcelantaj la altajn idealojn, ligitajn kun efektiviĝo de mondlingvoj ĉiam scipovis savi la movadon el la minacanta pereco.

Esperanto ekzistis jam dekon da jaroj, sed ĝi ankoraŭ ne kolektis ĉirkaŭ si adeptaron tiom fortan kaj multnombran ke estu garantiita senminaca ekzisto por la lingvo artefarita. Daŭris ankaŭ aperi aliaj lingvoprojektoj.

### Provo organizi skriban kongreson mondlingvan

Ankoraŭ unu fojon Zamenhof provis atentigi pri la problemo internacilingva la vastan publikon. En majo 1897 li dissendis ĉirkaŭ 6000 invitojn al gazetoj kaj reprezentantoj de diversaj mondlingvosistemoj por organizi «Skriban kongreson por priparolado kaj decidado de la demando pri L. I.»

Sed jam en julio de la sama jaro evidentiĝis, ke la kongreso ne estos efektivebla. Zamenhof skribis: «Tio estas la lasta provo, kiun mi faris por unuigi ĉiujn personojn, kiuj nomas sin amikoj de la ideo de L.I. Ĉiuj penoj kaj provoj kontentigi niajn kontraŭulojn estis vanaj. Ni forlasu por ĉiam ĉiujn provojn de cedado kaj iradu de nun trankvile vojon ĉiam rekte antaŭen, memorante, ke la vero estas sur nia flanko kaj ke kiu volas kontentigi ĉiujn, kontentigas neniun» («Lingvo Internacia», 1897, p. 83).

Restis al Zamenhof iri sian vojon, serĉante inter la praktikaj propagandistoj de la lingvo.

### La rezultoj de la komenca periodo

Kiaj do estis la rezultoj de la unua komenca periodo de la prosperanta laborado?

La movado trovis adeptojn en plejmulto da landoj. Tiu adeptaro bone kreskis ĝis la reforma ekskuo de la j. 1893. Poste, inter la j. 1895 kaj la j. 1900, la esperantistaro fakte ĉesis plinombriĝi (IV, p. 19). Tamen daŭris kreski ĝia literaturo. Dum tiuj malfacilaj jaroj fortiĝis la kerno de la movado, pluen evoluis la esperantisma interna ideo. Estis foren lasitaj ĉiuj espero pri eventuala rapida solvo de la problemo danke al interveno de iuj aŭtoritatoj eksteresperantistaj. Zorge dorlotata de siaj adeptoj, la lingvo fariĝis por ili vivanta kaj intime necesa ideologia instrumento.

E. Privat prave skribis: «Dek unu jaroj montras, kiel viviĝis la lingvo, kiel ĝi kreis al si propran popolon, propran spiriton kaj tradicion kaj naskis ĉe siaj adeptoj novan senton, iel mistikan kaj nekomprenoblan, kiu plej forte impresis je la literaturo, la stilo, kaj eĉ la tuta movado. Kreiĝo de tiu popolo kaj literaturo plenigas la historion de tiu unua periodo». (I, p. X).





### III. LA PROPAGANDA PRAKTIKISMO DE LA FRANCA PERIODO

#### L. de Beaufront — iniciatinto de nova periodo

Jam inter la unuaj francoj, registritaj en la I-a serio de la Zamenhofa adresaro en la j. 1889, troviĝis nomo de L. de Beaufront, kiu post la jaroj sukcesis preni en siajn manojn celkonscian gvidon de la praktika por-esperanta laboro. Li estis aŭtoro de la unua esperanta lernolibro por francoj, eldonita en la j. 1892. Dum 6 jaroj aperis kaj estis elĉerpitaj 3 eldonoj de tiu lernolibro.



L. de Beaufront (1906)

Bona kresko de la movado en francalingvaj regionoj permesis al Beaufront komenci en januaro 1898 eldonadon de nova gazeto «L' Esperantiste». Ĝis la j. 1908 mem, kiam Beaufront lasis esperanton, tiu gazeto estis plej solida, plej interesa kaj plej efika organo por aktiva defendo kaj propagando de esperanto. En la sama 1898 jaro Beaufront fondis ankaŭ Societon por propagando de esperanto, formale tutmondan, plejparte francalingvan. Jam post unu jaro tiu societo havis membrojn en ĉiuj landoj, kie nur estis esperantistoj.

Beaufront estis la unua celkonscia propagandisto de la lingvo, kiajn bezonis esperanto ĉe la fino de la XIX-a kaj la komenco de la XX jarcentoj. Li ekprovis antaŭenpuŝi la aferon de la L. I. ne per iuj mistikaj akceloj, sed per reala praktika kaj metoda agado.

«De ĉiu mistika aŭ tro homama flanko liberigis de Beaufront la esperantan propagandon. La «internan ideon» li opiniis iom danĝera por la sukceso de la lingvo. Esperanto por li estis artefarita lingvo por internaciaj rilatoj, nenio pli, kaj esperantistojn li eĉ severe admonis ke ili sin gardu de publika konfuziĝo kun pacifistoj» (I, p. 47).

Tia taktiko pleje konformis al la nova propaganda periodo de esperanto-movado, adaptiĝanta al la burĝa socio, ĉe kiu fariĝis jam ĝenaj la plifruaj idealismaj konceptoj de esperantismo.

#### Novaj metodoj de propagando

Tuj de l'unuaj jaroj de sia esperantistiĝo Beaufront zorgis tiri al esperanto novajn eminentajn adeptojn kaj subtenantojn. Mizeriĝinta



posteulo de nobela markiza familio, Beaufront sukcesis tiri en la honoran komitaton de la Societo por propagando de esperanto ankaŭ la grafon Chandon de Briailles, kies infanojn li instruadis. Sed ĉefe li zorgis pri altiro de personoj, havantaj iun influon en la mondo gazetara. Li altiris al esperanto redaktoron de gazeto «L'Etranger» Lombard, redaktoron de «Indépendance Belge» konatan pacifiston Gaston Moch, belgan geografiiston Charles Lemaire, svisan filozofon Naville k. a. (V. p. 61). Per aliaj varbitoj li akiris simpatiojn de la multnombra Franca Touring-klubo, kiu dum sekvontaj jaroj finance helpis fondiĝon de novaj grupoj esperantistaj en Francio (V. pp. 62, 65). Konservinte por si la prezidantecon en la Societo por propagando de esperanto, li sciis elekti, kiel ĝian vicprezidanton ĉefredaktoron de la «Revue des Beaux Arts et des Lettres» H. Hamel. Per tiaj agoj li iom post iom, dank'al personaj interligoj starigitaj, preparis bonan grundon por diskonigo de esperanto en landoj francalingvaj.

Konsiderante, ke sukceso de esperanto dependas grandaparte de la simpatia rilato de vasta publiko, Beaufront unua konsekvence aplikis en propagando de esperanto metodojn de moderna grandkapitalista agitado kaj reklamado, kiam al publiko estas prezentataj ne tiom la novaj ideoj, kiom la aŭtoritatoj kaj famaj subtenantoj de tiuj ideoj. «Li kreis tuj kategorion de aprobantoj kaj tiel akiris helpantajn aliĝojn de tiuj personoj, kiuj ne volis peni por lerni la lingvon, sed volonte donis kelkajn frankojn por esti informataj pri la progresoj de laŭ ili utila ideo» — skribis E. Privat (I, p. 43). Aldone ni devas konjekti, ke tiamaniere Beaufront altiradis al sia societo ankaŭ la personojn, al kiujn certagrade flatis ilia partopreno en tiu aŭ alia honora komitato, honora posteno ktp.

Ĉiuokaze Beaufront sukcesis rekonstrui la movadon sur tute nova bazo. Kaj tiu bazo fariĝis iom post iom tiom ampleksa kaj forta, ke la plua estonto de esperanto fariĝis garantiata. La esperantistoj per la plumo de E. Privat prave konstatis, «ke de Beaufront per sia agado kaj ekzemplo preparis kaj iniciatis en la esperantista vivado eĉ ekster Francujo tiun novan periodon, ĉefe propagandan, kiu malfermiĝis en j. 1900» (I, p. 44).

### La nova esperantistaro

La propagandaj metodoj, ekuzitaj de Beaufront, multe kreskigis la esperantistaron. Tamen tio estis certaparte jam esperantistoj de nova speco, malsamaj al la batalantoj de la unua periodo, ĉar «tre multaj personoj ĉiam restis aprobantoj. Nur la nacilingvan parton de la gazeto ili legis kaj esperanton neniam lernis... Tiel formiĝis en la esperantistaro anaro de homoj ofte tre fervoraj, kiuj ne sciis la lingvon kaj ĝian spiriton kaj kompreneble plej volonte akceptis diskutadon pri ĝi aŭ proponitan iun ajn reformon. Kelkaj el ili estis riĉaj aŭ influaj personoj kaj kelkfoje tre malhelpis la movadon, sin sensperte mikante en ĝiaj internaj aferoj» (I, p. 47).



Oni komencis malpli atenti la internan flankon de la mondligva movado. Samtempe plikreskis la praktikaj tendencoj. Venis al esperanto novaj homoj kun laŭpove praktikaj akceloj. Tio estis afero tute natura por la kondiĉoj de kapitalista demokratia socio de la okcidenta Eŭropo. La poresperanta propagando devis akceli tie aliajn rondojn, ol la idealistan inteligentularon Ruslandan. Konforme al tio la propagando tie devis ankaŭ bazi sin pli sur praktikaj argumentoj kaj ne sur la interna ideo, fremda por la eŭropaj praktike pensantaj homoj.

La saman transformiĝon spertis poresperanta laborado ankaŭ en aliaj landoj eŭropaj post la j. 1900. Oni ĉie komencis atenti ĉefe pri altiro de aŭtoritatuloj. En Anglio la unua simila subtenanto estis fama ĵurnalisto redaktoro de «Review of Reviews» W.T. Stead. En Svisio — filozofo E. Naville. En Italio — grafo Albert Galois.

Prof. Ĵirkov bone karakterizas tiun epokon: «La konsisto de esperantistaro fundamente ŝanĝiĝis en la epoko, kiam la centro de la movado transiris al Francio. La unuaj rusaj propagandistoj de esperanto estis homoj ideologie riĉaj, provintaj ideo fundamentigi la movadon. En Francio tute male apud granda nombro da homoj seriozaj — la amaso da novevarbitaj esperantistoj estis ideo sensignifaj, kun la menso de ordinara mezburĝo». (III, p. 15).

### **La amaso kaj gvidantoj en la nova esperantistaro**

La bonstata kapitalista socio ĉiam konjektas ekzistadon de du gradoj sociaj. La unuan gradon formas homoj el la amaso, sen iniciato, sen forta labor-volo kaj deziro, sekvantaj certajn gvidantojn kaj ĝuantaj la vivon tiaforme, kiaforme tio estas al ili ebla kaj permesata.

La duan gradon formas la gvidantaj personecoj de individualista kapitalista socie — homoj entreprenemaj, organizantaj la aktivecon de la amasoj el la unua grado kaj utiligantaj certacele tiun aktivecon.

La eŭropaj esperantistoj de mez-burĝa nivelo, formantaj la esperantistan amason neniel pretendis sin organizi. Ili ĝuis la servojn de Lingvo Internacia kaj pli aŭ malpli energie propagandis ĝin pro ĝia praktika aŭ kelkafoje ideo valoro. Tamen la burĝa socio ne povas ekzisti kaj evolui sen homoj «seriozaj» (laŭ esprimo de Ĵirkov), superantaj la ordinaran nivelon de la amaso kaj gvidantaj tiun amason konforme al siaj interesoj kaj konvinkoj.

Ankaŭ ĉe la mezburĝa esperantistaro aperis tiaj seriozaj personoj. En sia plejmulto la eŭropa mez-burĝa esperantistaro, utiligante esperanton, ne celis iujn pluajn ĝiajn reformojn, kiuj povus kaŭzi gravajn diskutojn kaj neniel povus garantii ĝeneralan akcepton por L.I.

### **Metodoj de gvidado de la amaso**

Tiu inerteco de la esperanta fidelularo estis plej lerte eluzita de la personoj, celantaj estri tiun amason. Tiam (dum la I-a kongreso esperantista en la j. 1905) estis oficiale akceptitaj specialaj insignoj, himno kaj standardo por esperantistoj, tiam aperis la kulto de «Zamenhof —



«Nia Majstro», karakteriza por la burĝa esperantistaro... Tiu kulto fakte malaltigas Zamenhofon, estas disproporcia kun lia rolo en la mondlingva movado kaj tute malharmonias kun lia modesteco» (III p. 16.).

La personeco de Zamenhof estis farata certagrade la standardo, post kiun sin kaŝis organizantoj de la burĝ-socia esperantista movado.

Unu el la pli postaj kontraŭbatalantoj de esperanto—Ch. Lemaire—plej bone elmontris formojn de tiu, konforma al la epoko kaj al ĝiaj tradicioj, reklamado por Zamenhof. En la libro «Tra Mezafriko» li skribis: «La franca registaro kreis Zamenhof kavaliro de la honora legio. Ni deziregu tutkore, varmege, entuziasme, ke ĉiuj registaroj ordenu siavice nian gloran majstron... Vivu Zamenhof... Vivu Li».

Same, konforme al la epoko, kiam Ch. Lemaire iĝis kaj idisto kaj kontraŭulo de esperanto (v. ĉap. VI), li komencis senhonorigajn atakojn kontraŭ la personeco de la sama antaŭ 2 jaroj de li glorigata Zamenhof.

En la socio kapitalista ekzistas du fortoj, kiuj difinas fortecon de ĉiu movado, laboro kaj progreso. Unu el tiuj fortoj—estas ideoj, akceptataj de certaj amasoj kaj servantaj por tiuj amasoj, kiel iuj voj-kaj cel-montriloj. Estas la ideo forto de ĉiu movado. Kaj la dua el tiuj fortoj estas mono, financoj, per kies helpo oni povas organizi certan bataladon por iuj celoj. Estas la financa forto de ĉiu movado.

En la unua periodo de sia ekzisto esperanto-movado povis ekĝermi, kreski kaj progresi nur per la ideoj fortoj, entenataj en la provo krei lingvon internacian. Tiuj ideoj kolektis ĉirkaŭ la esperanta standardo certajn amasojn. Post la j. 1900, kiam certa nombro de esperantistoj jam ekzistis, venis al servo de esperanto-disvastigo fortoj financaj. Disponis pri tiuj fortoj—apartaj personoj. Tiuj apartaj personoj, donantaj al esperanto-movado plian financan subtenon,—neeviteble ligis la interesojn de la lingvo kun siaj propraj interesoj aŭ konceptoj.

Tute logike, por fortigi siajn tendencojn kaj akcelojn, ili serĉis apogon ĉe la esperantista popolo. Por tion fari—necesis, ke izolaj kapitalrepresentantoj, tiu— aŭ alia—cele venintaj al esperanto kaj celantaj trudi al esperanto sia opinie plej ĝustajn vojojn de plua evoluo,—laŭpove ekposedu la amasojn, prenu ilin sub sian gvidadon kaj patronadon.

Nature, la negocistoj, kaj personoj akcelantaj estradon, zorgis kaŝi siajn verajn konsiderojn kaj plej ofte argumentis idealisme por tiama maniere logi la amasojn.

La kulto Zamenhofa, certagrada uzo de la idealista terminaro de la komenca epoko pri «sankta afero», «kara lingvo» k.t.p. servis al maskigo de la veraj akceloj de la sin mem kreintaj ĉefoj de la esperantista movado.

### La rivalado kaj konkurado inter la gvidantoj

Tamen devis veni momento, kiam ĉiu aparta gvidanto aŭ grupo de gvidantoj provu ekokupi pozicion pli fortan kompare kun la pozicioj de aliaj samkonkurantoj.



---

En la kapitalist-socia movado esperantista ekbrulis la konkuro, ne apartigebla de la socio kapitalista.

La konkurantoj provis direkti kaj gvidi la popolon esperantistan per plej diversaj metodoj: ĉu per iuj vastaj finance subtenataj, organizaj planoj (Sebert, vid. ĉap. V), ĉu per iuj komercaj eldon-entreprenoj (C. Bourlet — Hachette v. ĉap. IV, V), ĉu per logoj de demokratia sinorganizo de la esperantistaro (A. Michaux, H. Hodler v. ĉap. VIII, IX), ĉu per aktiva defendado de la esperantismo kaj de la lingva netuŝebleco (Th. Cart v. ĉap. VIII). Tre subtilaj estis en la komenco la nuancoj inter tiuj diversaj metodoj.

Sed tamen ĝuste la periodo de propaganda praktikismo en kondiĉoj de kapitalista socio kaŭzis aperon de certa hipokritismo en la movado, kaŭzis ekĝermon de multaj diskutoj kaj multaj organizaj bataloj inter la konkurantaj pretendantoj por la gvidado de la esperantista popolo.

Pli klara tio montriĝis jam pli poste, kiam — dum la internaciaj kongresoj esperantistaj kaj dum plia kresko de la esperantistaro — la batalo inter seriozaj personoj, akcelantaj la gvidadon, akiris ĉiam pli klarajn kaj pli akrajn formojn.





**La novaj gvidantoj, anstataŭ-  
intoj de Beaufront**

L. de Beaufront iniciatis novan periodon en la disvastigo de esperanto. Li bone taksis sian propran rolon en la movado, kiam li skribis en «L'Esperantiste» 1902, № 58, p. 120: «sen ni, sen la francoj ĝi ankoraŭ dormus en la regiono de l'esperoj sed ne de faktoj». Li unua konsekvence aplikis la metodojn de socio kapitalista al la esperanto-propagando kaj organizo. Li iniciatis enkondukon de novaj fortoj en esperanto-movadon. Tiuj fortoj sekurigis bonan bazon por esperanto-ekzisto sed samtempe tiuj fortoj puŝis malantaŭen Beaufront, senigis lin po iom de la gvidanta rolo en la esperantistaro.

Ĉu li, ordinara hejma instruisto, povis esperi rivali kun profesoroj, gazetredaktoroj, scienculoj ktp? Ĝis tiuj eminentuloj diversspecaj donis al esperanto nur aprobon, Beaufront povis, utiligante ilian helpon, resti ĉe la kapo de la movado, direkti la movadon laŭ sia bontrovo, zorgi, ke la esperantistaro konsideru lin kiel la duan patron de esperanto. Sed kiam kelkaj el tiuj eminentuloj iom post iom eniĝis memstare en la esperantistan vivadon, kiam kelkaj el ili ĉesis esti simplaj aprobantoj, tiam la novaj aŭtoritatoj neeviteble devis forpuŝi la malnovan aŭtoritaton — taŭgan nur por infana periodo de esperanto, kiam homoj seriozaj pri la afero sin ankoraŭ ne okupis. Pluajn intertraktojn kun novaj aŭtoritatoj pri subteno de esperanto prenis sur sin jam la nove-alvenintoj, pli intimaj kun tiuj aŭtoritatoj.

**Carlo Bourlet**

Inter tiuj novealvenintoj baldaŭ akiris specialan gravecon kaj komencis ludi specialan rolon persono de Carlo Bourlet.

Pri C. Bourlet necesas paroli iom aparte. Al lia laboro kaj memoro estas dediĉita speciala libreto, el kiu ni prenas la necesajn por ni informojn.

«La tuta vivo de Carlo Bourlet estas ekzemplo de energio» (IX, p. 6.). Li estis sendube same talenta, same energia kaj same praktika laboranto. Li estis vera praktikulo-sciencisto de la epoko kapitalisma. Perfekta teoriisto de matematiko, li speciale esploris la problemon pri bicikla mekaniko, partprenis en la bicikla industrio kaj en la reklamado de la lastaj tiufakaj eltrovoj per helpo de Franca Touring Klubo (IX, p. 6.).



En la jaro 1900 li estis varbita por esperanto, kaj de tiam komencigis lia aktiva esperanto-agado. Li pleje helpis al favora akcepto de esperanto per la Touring Klubo, per Sorbonne kaj per la firmao Hachette.



**Carlo Bourlet**

En la j. 1906 li fondis «La Revuo'n» eldonatan de Hachette, kiu fariĝis plej ampleksa gazeto esperantista. Elektita en la j. 1908 viceprezidanto de la Konstanta komitato de la kongresoj, li zorgis, ke ĉiu kongreso fariĝu laŭpove impona demonstracio de la forteco de esperanto-movado por rondoj influaj de la socio.

Li estis lerta kaj konvinkiga oratoro. Liaj «Babiladoj» (en «La Revuo») estis perfekte verkitaj esperanto-legaĵoj kun vere franca briletanta humoro. Siajn kontraŭulojn — ĉu la idistojn (v. ĉap. VII), ĉu la al li opoziciantajn esperantistojn — li vipis sarkasme kaj plej senindulge.

La krono de lia poresperanta laboro devis esti la X-a kongreso en Parizo dum la j. 1914. Tamen ĝuste antaŭ la IX-a Berna kongreso en j. 1913 li mortis, malbonŝance glutinte fiŝoston.

Zamenhof komprenis, ke en la rondoj sociaj influaj personoj similaj al C. Bourlet solaj povis impone reprezenti la esperanto-movadon. Dum la parolado antaŭ la tombo de Bourlet Zamenhof diris: «Li ĉiam staris antaŭ miaj okuloj, kiel homo tiel grava kaj tiel meritplena, ke ĉiufoje, kiam mi pensis pri la sorto de esperanto, pri ĝia progresado, pri ĝia batalado, pri ĝiaj esperoj por la estonteco, ĉiam sur la unua plano staris antaŭ mi la bildo de Bourlet... kiam li aliĝis al nia anaro, en nian aferon enverŝiĝis ia nova energio...»

Zamenhof ĝuste taksis Bourlet, kiel la personon, kiu dank'al siaj ecoj kaj dank' al sia persona situacio — sukcesis tiri al esperanto atenton de rondoj, estrantaj en la kapitalista socio. Tial li finis sian paroladon: «venos la tempo, kiam ĉiuj esperantistoj ekkomprenos, kiel gravega estis la laborado de Bourlet kaj tiam, ho-ve, tro malfrue ili rekompencos al lia ombro tiun sendankecon, kiun li de kelkaj flankoj suferis dum li vivis».

Nunatempe ni bone taksas la rolon de Bourlet. Li estis ĝuste tia persono, kia necesis al esperanto por ke ĝi fortike enradikiĝu en la superaj tavoloj de la socio, por ke tiuj tavoloj komencu rilati pli atente al esperanto. Liaj faroj, liaj agoj estis objektive necesaj. Li agis tiel, kiel postulis la sociaj fortoj de lia tempo.

### **Progreso de esperanto de post la j. 1900**

Ĝenerale la tuta movado dum tiu periodo direktiĝis laŭ metodoj de patronado, kiam oni serĉis bazon por plua disvolvado de la movado ne ĉe amasoj, sed ĉe diversaj aŭtoritatoj.



Tiamaniere, ekzemple, estis fondita la «Internacia Scienca Asocio», sub patronado de multaj eminentuloj. Ankaŭ tiamaniere agis la «Delegitaro por alpreno de lingvo internacia», fondita en la j. 1900 kaj kolektinta pli ol 1000 subskribojn de scienculoj diversspecaj (v. ĉap. VII).

De post la j. 1900 esperanto-movado rapide ekprogresis. Anstataŭ rakenti pri tiuj daŭraj progresoj sufiĉos, se ni prezentos sur la finaj paĝoj de tiu verko grafikajn tabelojn, montrantajn kreskon de la esperanta societaro, gazetaro kaj libraro. Tiuj taleboj atestas tiun fakton plej konvinkige.

### La kontrakto kun firmao Hachette

Plej grandan antaŭenpuŝon ricevis la esperanto-movado tiam, kiam Beaufront per helpo de Bourlet sukcesis logi al esperanto la potencan eldonan firmaon Hachette et C-ie.

En «L'Esperantiste» 1901 j. № 44—45, p. 251 estis publikigita informo pri kontrakto inter Hachette kaj Zamenhof, farita «dank' al pero de s-ro de-Beaufront». Inter esperantistoj aperis famoj, ke tiu kontrakto, pri kiu skribis Beaufront mem, ke ĝi signifas certan «monopolon» — almenaŭ moralan, — devos katenigi pluan evoluon de la lingvo, devos kvazaŭ meti la tutan aferon de la lingvo al la dispono kaj bonvolo de Hachette.

Beaufront sentis sin devigita doni en «L'Esperantiste» pluajn klarigojn pri tiu kontrakto kaj pri «monopolo», akirita de Hachette por esperanta libraro, aprobita de Zamenhof. En la № 48, p. 294 Beaufront proponis al ĉiuj aŭtoroj, dezirantaj vidi siajn verkojn eldonitajn per Hachette, ke ili interrilatu senpere kun li. Li promesis komuniki al ĉiu, deziranta tian eldonon, «kion li devas pagi por d-ro Zamenhof (aŭ por la d-ro kaj mi, se la verko estos traduko de unu el miaj verkoj) kaj mi sendos la manuskripton por la ekzameno kaj la aprobo».

Hachette provis kvazaŭ monopoli publikigon de bonkvalitaj esperantaj verkoj kaj, laŭ kontrakto kun Zamenhof, komencis eldonadon de «Kolekto aprobita de d-ro Zamenhof».

La fakton, ke la kontrakto inter Beaufront, Hachette kaj Zamenhof povis timigi aliajn esperanto-aktivulojn, pravas letero de Zamenhof al Th. Cart de 26—IV 1902, en kiu Zamenhof provas konvinki Cart, ke tiu kontrakto «absolute neniom tuŝas la plenan liberecon de esperanto kaj de la esperantistoj» kaj, ke «ĝi estas nur privata persona kontrakto inter mi kaj s-ro de Beaufront».

Tamen jam la 7—II 1902 j. en nova letero al Cart (VIII, p. 526). Zamenhof sentis sin devigita klarigi la kaŭzojn de tiu kontrakto. Oni lin konvinkis, ke certa forta libro-eldona firmao laŭeble senkonkura povus pli energie subteni esperanton. Tial li «dezirus (sed ne postulas; neniam postulis kaj neniam postulos), ke ĉiu, kiu eldonas ian verkon esperantan, turnu sin antaŭe al la firmao Hachette».



## Monopolemaj tendencoj de Hachette kaj Bourlet

Je la fino de la j. 1902 la laŭkontrakta peranto inter Zamenhof kaj Hachette estis anstataŭigita. Anstataŭ Beaufront tiun rolon prenis sur sin C. Bourlet. En la esperantaj gazetoj aperis neniuj komunikoj pri tiu ŝanĝo okazinta. Evidente pri ĝi sciis nur apartaj personoj.

Laŭ nia peto A. Michaux skribis al ni pri tiu afero la 31-1-30 j. jenon: «Mi havas la kontraktojn de Hachette kun C. Bourlet kaj de Beaufront. Ili estas legaj kaj kutimaj: Hachette ne volis kontrakti kun ruso sen respondeco por estonto kaj postulis francon, korektontan la presaĵojn. Jen kion skribis Cart: de Beaufront ricevis monopolon de aprobo por libroj de Zamenhof kaj siaj propraj; sed C. Bourlet en la j. 1902 puŝis lin de la pozicio de kontrolanto kaj okupis ĝin mem... En la kontraktoj de C. Bourlet kaj Beaufront la profito por ili estis normala, sed povis iĝi granda por Hachette. De-Beaufront abandonis facile siajn rajtojn por labori kun Cart kaj Fruictier en presejo de «Lingvo Internacia», kie ili volis eldoni grandan francan vortaron. Hachette kaj C. Bourlet faris proceson kaj Cart kun Beaufront abandonis la vortaron. Tie iĝas la demando butika».

Samletere Michaux asertas, ke laŭ kontraktoj kun Hachette por siaj propraj verkoj «Zamenhof ricevis dum de-Beaufront 33%, dum C. Bourlet nur 20%».

La lasta fakto pruvas, ke Hachette dum unu jaro spertis ne sufiĉan profitecon de tiu kontrakto por si. Tial estis limigitaj la eventualaj procentoj pagotaj al Zamenhof.

Samtempe, supozeble, post kiam C. Bourlet iĝis porkontrakta anstataŭanto de Beaufront, kreskis la tendencoj de komercistoj de la firmao Hachette, celantaj monopoligi ne nur la eldonon de Zamenhofaj verkoj, sed ĝenerale de verkoj esperantaj. La komercistoj de la firmao Hachette emis pliampleksigi la kontrakton privatan. En la letero de 4—IV—1903, skribita al Cart (VIII, p. 528), Zamenhof «forte miras, ke la granda katolika firmo ne eldonas religiajn librojn en esperanto nur tial, ke Hachette malpermesis». Kaj en la sama letero Zamenhof skribis, ke li estas «en principo ne kontenta kontraŭ Hachette, ke li presas librojn kun mia aprobo, ne demandinte min antaŭe, ĉu mi volas ke la verko portu mian publikan aprobon».

Necesas konstati, ke Zamenhof, celante bonon de la lingvo kaj laŭblan ĝian publikan liberecon, kontraŭstaris monopolajn akcelojn de Hachette. En «L'Esperantiste» 1903, № 62 p. 173—175 estis presita klarigo de Zamenhof — «Pri la mistera kontrakto». Pruvante, ke la kontrakto ligas nur lin persone, neniel ligante esperanton, ke ĝi lin neniel povas riĉigi, ĉar li ricevas krom la honorario por siaj libroj nur 1,6% de la sumprezo de libroj de aliaj aŭtoroj el la «Kolekto aprobata», Zamenhof klarigis kialojn de la kontrakto farita:

«Ni sentis la bezonon havi ian grandan libroeldonan firmaon», ĉar «ni havis nenian eblon venigi niajn verkojn en la manojn de la publiko».



Estante gvidanto de la esperanto-fako ĉe Hachette, C. Bourlet ricevis tre gravan influon sur la tuta esperanto-movado. Ne ĉiam li agis delikate. Verŝajne li kelkfoje sufiĉe krude sentigis sian forton kaj povon. Tion spertis Zamenhof mem. La 14—VI—05 li skribis al Michaux: «Mi scias, ke la karaktero de C. B. estas ofte tre malagrable».

### **Presa Esperantista Societo**

En septembro de la j. 1904 eldonanto de «Lingvo Internacia» P. de Lengyel venis el Hungario al Parizo (vidu ĉap. II). En j. 1905 fondiĝis Presa Esperantista Societo, kies ĉefaj akciuloj estis Lengyel, Fruictier, Th. Cart kaj ankoraŭ kelkaj aliaj sindonaj amatoroj de la lingvo. Multan monon ili ne posedis. La tuta ilia espero por la sukceso de ilia afero sin bazis sur supozebla subteno de la esperantistaro kaj sur sukcesa vendado de libroj eventuale eldonotaj.

Ĝis kiam Lengyel en Szekszard presis nur gazeton «Lingvo Internacia», ĝis tiam mankis materialaj premisoj por konflikto inter Hachette kaj li. Nun tiuj premisoj troviĝis.

Ankoraŭ en la № 1(97) de «Lingvo Internacia» P. Fruictier skribis pri eldono de «Scienca Revuo», efektivigota interkonsente «de firmo Hachette kaj de L.I.». Tiu interkonsento tamen ne realiĝis. Vere, ĝis la j. 1906, kiam Hachette transdonis eldonadon de «Internacia Scienca Revuo» al R. Saussure en Ĝenevo, Fruictier estis redaktoro de tiu gazeto, sed la sola eldonanto iĝis Hachette. P. Fruictier estis samtempe oficiala redaktoro de «Lingvo Internacia» kaj membro de Administrantaro de Presa Esperantista Societo. Sed Hachette, havinta nenion kontraŭ gazet-eldona agado de Presa Esperantista Societo tute ne emis havi konkuranton sur la libre-merkato. El la supre-citita letero de A. Michaux ni vidas, kiel forte ĝi premis kontraŭ publikigo de granda vortaro de Beaufront ĉe la Presa Esperantista Societo. Ĉe la gvidantoj de tiu Societo neeviteble do venis ideoj laŭpove kontraŭstari la monopoleon de Hachette kaj provi eldonon de verkoj esperantaj sen permeso aŭ konsento de tiu firmao. La gazeto «Lingvo Internacia» komencis paroli pri la situacio malfacila («L.I.» 1905 j. № 122 p. 322).

Ankaŭ Beaufront estis nature neamika al Hachette kaj al C. Bourlet, kiuj ŝovis lin flanken de la suprepriparolita monopolema kaj eventuale profitebla kontrakto.

### **Provoj de Zamenhof forigi danĝerojn de la monopolistaj tendencoj**

Zamenhof, kompreninta la kaŭzojn de la milito naskiĝonta inter monopolema Hachette kaj de Beaufront kun la Presa Esperantista Societo, zorgis, ke la tria punkto de la Deklaracio pri esperantismo, prezentota al la I-a kongreso esperantista en la j. 1905 (v. ĉap. V), laŭte proklamu, ke «Esperanto estas nenies propraĵo, nek en rilato materiala, nek en rilato morala».



---

[ Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn, kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj.

Tiamaniere Zamenhof forprenis publike de la militontoj la eblan juran bazon por la milito. Samtempe li ĉesis eldonadi verkojn de la serio «Kolekto aprobita», kiu laŭkontrakte apartenis monopole al Hachette. Tamen restis la kaŭzoj financaj pormilitaj ne forigeblaj. Pli forta Hachette nature daŭris ĝeni evoluon kaj disvolvon de eldonejoj pli malfortaj.

Komenciĝis en la esperanta lando bataloj inter konkurantaj organizoj, celantaj siajn apartajn interesojn. Tio estis tute natura kaj tute konforma al la sociordo kapitalista. Esperanto-movado marŝis sampaŝe kun la koncerna epoko.

Izolita Beaufront, ne povante en tiuj bataloj gvidi memstaran partion, aliĝis al la flanko de kontraŭuloj de Hachette. Venis momento, kiam li sian gvidrolon jam finludis.





## V. LA ORGANIZAJ PROBLEMOJ DUM LA UNUAJ KONGRESOJ

### Demokratiaj tendencoj kaj la organizo de unuaj internaciaj kunvenoj esperantistaj

Kun plua kresko de la nombro de esperantistoj aperis en la movado tendencoj esence etburgaj—batali por certa demokratio en la esperantujo. Tiuj tendencoj estis neevitebla reakcio kontraŭ la tendencoj kaj politiko de esperantaj aŭtoritatoj.

Gravan antaŭpuŝon al la disvolvo de tiuj demokrataj tendencoj donis la unuaj kongresoj de esperantistoj. La ĉiulanda kresko de esperantomovado kaŭzis ideon organizi regulajn internaciajn kunvenojn de esperantistoj. Jam en la j. 1903 okazis internacia renkontiĝo de esperantistoj, organizita de la grupo en le Hâvre. En la j. 1904 simila internacia kunveno estis refoje organizita jam pli grandaskale de la grupoj en Calais kaj Dover. En la j. 1905 la grupo de Boulogne sur Mer organizis la unuan universalan kongreson esperantistan.



A. Michaux

La ĉefa organizinto de la unua kongreso estis prezidinto de la Bulonja grupo esperantista A. Michaux, helpata de siaj samgrupanoj. Sed la nemultenombra Bulonja grupo ne povis ĉion prizorgi. Ĝi do devis intertrakti pri helpo kun aliaj grupoj pli riĉaj kaj pli fortaj. La unuan invitan al la kongreso cirkuleron subskribis Franca societo por propagando de esperanto (L. de Beaufront), Pariza Grupo (C. Bourlet), Bulonja grupo (A. Michaux) kaj la Franca Touring-klubo (Ballif). Tiamaniere tuj ĉe la komenco mem la organizon de la unua kongreso partoprenis ĉiuj plej fortaj personoj de la franca esperanta movado.

Kun la unua kongreso okazonta estis ligataj multaj esperoj kaj atendoj. Dum tiu kongreso esperis reguligi siajn kontojn diversaj mal-



kontentuloj. Oni esperis, ke la kongreso, kiel centra aŭtoritata institucio, solvos ĉiujn problemojn — ĉu organizajn, ĉu eĉ lingvajn.

Post la reforma periodo de la j. 1894 pasis jam dek jaroj. Intertempe venis al esperanto ree multaj personoj, malmulte atentantaj la lingvon kiel vivantan, memstare evoluantan organismon. Komenciĝis ree paroloj pri neceso fari tiujn aŭ aliajn ŝanĝojn en la lingvo.

Ankoraŭ estis unu kaŭzo, instiganta la reformemon. Rápide kreskis la nombro de esperantaj gazetoj kaj la nombro de eldonataj libroj esperantaj. Certan ĝenon por ĉiuloka presado de tiuj eldonaĵoj kaŭzis la speciale supersignita literaro esperanta. Speciale en la komencaj jaroj de esperanta evoluo tiu kaŭzo estis malfacile forigebla. Ĝuste tial la Kanada gazeto «La lumo» faris, pro praktikaj konsideroj, proponon forigi la supersignitan literaron («La lumo» 1904 j. № 1).

La saman problemon pritraktis speciala broŝuro de M. Verema (P. Berthelot) «Fonetiko litera», samjare eldonita. La intenco de la eldonantoj de «La lumo» presi sian gazeton per fonetika alfabeto estis akceptita tre malfavore de la esperantistaj ĉefoj. En № 4 (76) de «L'Esperantiste» de j. 1904 Beaufront «plej formale kaj plej energie» protestis kontraŭ ŝanĝo de la alfabeto, enkondukita de «La lumo». Redaktoroj de «La lumo» devigitaj ĉesigi eldonadon de la gazeto, veturis al la Bulonja kongreso kun preta reform-projekto de esperanta alfabeto.

A. Michaux asertas ke por la diskutado dum la unua kongreso estis entute preparitaj pluraj reform- kaj ŝanĝ-proponoj. Evidente la problemo ŝajnis sufiĉe grava. Zamenhof estis informita pri tiu afero kaj persone montris neniun malbonvolon por diskutado de similaj proponoj.

A. Michaux komunikis al ni ekstraktojn de pluraj nenie publikigitaj leteroj de Zamenhof, adresitaj al li kaj datitaj de la 1905—07 jaroj. El tiuj leteroj oni povas konstati, ke Zamenhof esperis, ke la kongreso efektive solvos diversajn problemojn lingvajn. La 3—II 1905 Zamenhof skribis: «Mi rapidas respondi al vi, ke la diskutadon pri la supersignoj vi povas, laŭ mia opinio, tre kuraĝe akcepti en la programon». La 14—III—1905 li skribis: «La demandon pri la supersignoj decidis la kongreso. Mi mem volonte akceptos ĉion, kio havos por si la plimuton da voĉoj».

### Prokrastigo kaj entombigo de reformaj proponoj

Nek Hachette, nek Presa Esperantista Societo, nek L. de Beaufront—eldonanto de «L'Esperantiste» estis emaj al reformoj. Eĉ iliaj materialaj — financaj interesoj estis kontraŭaj al iu ajn reformado. Iliaj libroj kaj eldonaĵoj estus senvaloriĝintaj ĉe efektivigo de la reformoj. Ĉiu reform-eksperimentado estus malhelpinta la propagandon kaj sukcesan vendadon de iliaj eldonaĵoj. La supersignita literaro servis eĉ kiel certa avantaĝo por tiuj eldonistoj kaj presejoj, kiuj jam havis tiun literaron. Forigo de tiuj literoj devis forpreni de ili tiun avantaĝon.



C. Bourlet krome sentis ke la reformado de esperanto grave kompromi-  
tus lin persone, ĉar li perdis la konfidon de la rondoj influaj kaj de  
Hachette, antaŭ kiuj li estis ĝis nun protektinta esperanton.

La lastan konsideron klare esprimas Michaux, nomante C. Bourlet  
ĉefa kontraŭulo de reformoj.

Konforme al siaj intereso, la gvidantoj faris ĉion, por ke la reforma  
demando estu forigita el la kongresa tagordo eĉ kontraŭ la opinio de  
Zamenhof. A. Michaux rakontas, ke oni kvazaŭ promesis pridiskuti tiun  
demandon dum la sekvonta dua kongreso, sed ankaŭ tie tio ne okazis.  
En gazeto «L'Esperantiste» 1905 j. № 8-91 p. 178 ni trovas rimarkon,  
ke «ĉiuj projektoj koncerne la lingvon» estis post la kongreso transdoni-  
taj al la elektita provizora lingva komitato». La oficiala protokolo  
de la Unua kongreso komunikas pli singarde: «La demando pri supersi-  
gnitaj literoj kun konsento de s-ro Saint-Martin (redaktoro de «La  
lumo») kaj post rimarko de d-ro Javal estas resendata al la lingva ko-  
mitato».

Ĉiuokaze tiu afero kaj tiuj motivoj restis kaŝitaj por la esperanti-  
staro. A. Michaux asertas, ke «tre malmultaj esperantistoj konas nian  
veran historion». Tio estas kredebla, ĉar la historio en la kapitalist-  
demokratia socio ĉiam emas prisilenti ĉion kompromitontan tiun  
socion kaj ĝiajn kutimojn.

Ni ne havas kaŭzon malfidi al la aserto de Th. Cart: «neniu en Bou-  
logne parolis pri reformoj, Michaux ankaŭ ne». Tiu aserto nur pruvas,  
ke ankaŭ Cart povis ne esti detale informita pri la afero, ke C. Bourlet  
scipovis aranĝi la aferon plej kaŝe, kaj ke Michaux mem estis tiutempe  
konvinkita, ke utilas silenti pri la afero. Klaran komprenon, ke tia  
povis esti la ĝenerala situacio antaŭ la kongreso, montras jena citaĵo  
en letero de P. Corret, sendita al ni: «tute ne mirinde estis, se refor-  
memuloj konsideris, ke kongreso estas taŭga propono por reformoj.  
Ankaŭ ne mirinde estis, se ne-reformemuloj opiniis, ke, se la kongreso  
fariĝus reforma diskutejo, la esperantista unueco pereos».

Sed A. Michaux certagrade simpatiis al simila diskutado. Se li eksi-  
lentis, okazis nur pro certa influo flanke de aliaj personoj. P. Corret  
skribis: «Michaux neniam estis bona esperantisto (kiel ofte okazas ĉe  
reformemuloj) nek skribe, nek parole. Lia elparolo estis certe la plej  
granda abomenaĵo de unua kongreso».

Efektive la esperanto-movado ofte spertis, ke ĝuste la personoj,  
ne posedantaj perfekte la lingvon, ne ligitaj kun ĝia spirito, estis emaj  
serĉi mankojn kaj makulojn ne en si mem, sed en la lingvo. Pro tiu kaŭzo  
ili ofte komencis simpatii al diversaj reformaj ideoj.

### **La organiza problemo, prezentita al la unua kongreso**

La dua problemo — apud la reforma, kiu devis esti starigita antaŭ  
la kongreso, estis tiu de la ĝenerala esperanta organizo.



Temis pri jeno—ĉu la esperanto-movado restu ne organizita, sen iu gvida centro aŭ ĉu ĝi kreu por si tian centron. Se oni povis evitigi la diskutadon pri la lingvo-ŝanĝoj, — evitigi la organizan diskutadon estis neeble. Zamenhof prezentis sian projekton por organizi la esperantistaron. Certaj faktoj pruvas, ke tiu projekto estis forte influita de la Parizaj esperantaj gvidantoj kaj unuavice de C. Bourlet. Zamenhof proponis al la kongreso — kreon de Centra komitato kaj de pluaj fakaj komitatoj: agada, lingva, kongresa, cenzurista kaj ekzamenista. La decidoj de la Centra komitato, laŭ lia ideo, devis esti konfirmataj de la sekvonta esperanta kongreso. Plene memstara devis esti, laŭ lia plano, nur la agada komitato, memstare aranĝonta sekciojn de propagando, de informoj kaj de libro-vendado. Tiu agada komitato devis ankaŭ enspezi la tutan monon de la centra organizo.

Multaj esperantistoj, ŝatantaj principojn de demokratia, ŝajne parlamenta organizo, kaj inter ili personoj—esperantaj esti la estontaj gvidantoj de la movado, — subtenis la proponon de Zamenhof. Inter tiuj estis ankaŭ C. Bourlet. Laŭ la projekto prezentita oni povas konjekti, ke C. Bourlet speciale akcelis kreon de aŭtonoma agada komitato, kiu fakte tenus en siaj manoj la financan kaj organizan forton de la movado.

Aliaj esperantistoj, kaj inter ili Beaufront kaj Cart, ĉu ne konsiderante la internacian organizon — necesa, ĉu timante, ke ĉe tia organizo la gvidado de la movado povus trafi en malĝustajn manojn, — estis kontraŭ la projekto de Zamenhof. En № 5-88, 1905 j. de «L'Esperantiste» estis presita rezolucio de la komitato de Franca Societo por propagando de esperanto, kiu subtenis kreon de Centra komitato, kondiĉe ke ĝi havu pure lingvajn taskojn. Iuj aliaj centraj institucioj estis en tiu rezolucio kontraŭparolataj.

Speciale danĝera ŝajnis la aŭtonoma agada komitato.. En № 6(89) de sia gazeto Beaufront skribis pri tiu komitato: «Jes, ni timas, ...ĝi ne estas kontrolata, ĝi povas reale ĉion fari kion ĝi volas... Por ne timi antaŭ tiuj privilegioj estus necese, ke ni forgesu la naturon de la homaj karakteroj kaj la tutan historion de la mondo». Beaufront klare komprenis, ke C. Bourlet, estronta la agadan komitaton, per ĝi povas fariĝi diktatoro de la tuta movado. Tiun konjekton de Beaufront fortigis la fakto, ke la aprobon, kiun ĝis nun donis Zamenhof por la libroj eldonataj, devis nun anstataŭi aprobo de la komitato. Tial G. Moch en «L'Esperantiste» № 8-91, p. 173 skribis: «se oni akceptos tion, oni rekte kreus la netoreleblan aŭtokration aŭ oligarkion, kontraŭ kiu mi tuj energie ribelus». Konsiderante danĝeron de tiu monopolo, G. Moch proponis peti, ke Zamenhof laŭeble mem limigu la aprobon, donotan al verkoj diversaj.

Timante iun ajn suspekton pri sia aŭtokrateco, Zamenhof efektive dum la kongreso deklaris, ke li ĉesas aprobi verkojn por la «Kolekto aprobita», kaj ke tiamaniere li restas nur persone pri siaj verkoj ligita kun la firmao Hachette.



## La preparo de la kongreso kaj parizaj esperanto-ĉefoj

A. Michaux estis partiano de certa organiza centrigo de la movado. Li pensis, ke nur plenrajta organiza centro kapablu garanti esperanton de iu malbona influo flanke de monopolemuloj diversspecaj, kaj ke samtempe ĝi kapablu solvi la demandojn pri eventualaj lingvo-reformoj. Certe, Michaux komprenis fuŝitecon de la projekto de Zamenhof, laŭ kiu ŝajne demokrata sistemo fakte subiĝus al aŭtokrata, sendependa agada komitato. En la leteroj, kiujn interŝanĝis Zamenhof kun Michaux, videbliĝas, ke C. Bourlet insistis, ke Zamenhof antaŭ la Bulonja kongreso nepre venu al Parizo. Laŭ propra konfeso—Michaux, timanta la aŭtokratecon de Bourlet kaj de aliaj parizaj esperanto-gvidantoj kaj ilian eventualan malbonan influon al la doktoro, celis konvinki Zamenhof, ke li ne vizitu Parizon. Sed tiu lasta por ne lasi «impreson pri iu malpaco» tamen iris al Paris (leteroj de Zamenhof al Michaux de 18-V 1905 kaj de 14-VI 1905).

Laŭ rakonto de A. Michaux: La proponojn de Zamenhof por la unua kongreso li legis en Parizo antaŭ la tiutempaj gvidantoj de la movado. Zamenhofaj ideoj timigis tiujn gvidantojn. Oni eĉ projektis malhelpi al lia alveturo. Speciale ili estis malkontentaj, eksciinte ideon de Zamenhof deklami dum la kongreso «Preĝon sub la verda standardo».

Por ili la lingvo estis nur objekto de publika propagando kaj ĉe certa negocado. La malnovajn idealistajn konceptojn de la unua periodo esperanta — ili konsideris malutilaj por serioza propagando en moderna eŭropa socio. Ankaŭ la demokrataj organizaj ideoj de Zamenhof bezonis iliacpinie certan kontrolon. Eble tia kontrolo estis al Zamenhof eĉ trudata.

Tial Zamenhof preferis, ke ĉiuj liaj porkongresaj projektoj kaj artikoloj estu presataj nek en «L'Esperantiste» (eldonata de Beaufront), nek en «Lingvo Internacia» (eldonata de «Presa Esperantista Societo»). La 14-IV 1905 kaj la 9-V 1905 Zamenhof petis Michaux presigi tiujn projektojn en la «Revue de Boulogne» — oficiala kongresa gazeto.

Fine venis la tagoj de la kongreso. Lertaj gvidantoj de Pariza esperanta movado bonuzis la kunvokon de Bulonja kongreso por atentigi la aŭtoritatulojn pri esperanto. Tiu celo, verŝajne, eĉ pli interesis ilin, ol la organizaj bezonoj de la kreskanta popolo esperantista. Zamenhof, alveturinta vagonare triaklase Parizon, estis prezentita al diversaj aŭtoritatuloj kaj ordenita de la Franca registaro.

### La unua kongreso en Boulogne

Certamaniere prilaborita, la idealista doktoro forveturis el Parizo al Bulonjo. Tie lin atendis lia esperantista popolo.

La plej gravaj problemoj, solvitaj dum la unua kongreso estis: 1) akcepto de la Deklaracio pri esperanto kaj esperantismo, entenanta la principon de neŝanĝebleco de la Fundamento de esperanto; 2) fondo de la



Lingva Komitato, havanta taskon «konsiliĝi pri demandoj rilataj al la lingvo»; kaj 3) starigo de speciala Komitato por organizado de sekvontaj kongresoj.

La propono pri internacia organizo estis malakceptita. La Parizaj gvidantoj ne multe batalis por defendi kreon de Centra komitato, kiun elektus la amaso kaj kiu ĉe certaj kondiĉoj, se ne sukcesus starigo de aŭtonoma agada komitato, povus fariĝi por ili ĝena. Ĉiuokaze — estri kaj gvidi neorganizitan amason estis ja pli facile, ol gvidi movadon, havantan siajn proprajn demokratie elektitajn centrajn instituciojn. Provi trudi akcepton de la aŭtokrata kaj aŭtonoma agada komitato montriĝis neeble. La vastaj esperantistaj amasoj, ĝuante uzadon de la lingvo, havis nenian specialan intereson por kreo de iu centro organiza kaj por subteno de la monopolemaj tendencoj de C. Bourlet. Ankaŭ Zamenhof mem komprenis la danĝeron de sia projekto, eventuale utiligota por la celoj de la parizanoj.

Rezulte, dum la kongreso sukcesis la kontraŭuloj de la internacia organizo. Pravis Cart, skribante al ni ke li kontraŭbatalis «la projekton de Zamenhof kaj de Sebert (Bourlet) pri ĝenerala organizaĵo de l'esperantistaro, ĉar kvankam socia fakto estas esperanto, nur lingva ĝi devas esti». La esperantistoj efektive ĉiam konceptis esperanton kiel socian eŝingvan interligan faktoron, sed ne kiel faktoron socie-organizan.

### Fondo de la lingva komitato

Sed la ideo pri kreo de speciala lingva komitato estis principe akceptita de ĉiuj partoprenantoj de la unua kongreso. Parizaj eminentuloj povis esperi, ke tia lingva komitato — sufiĉe multnombra — ne estos laborkapabla kaj pro tiu nelaborkapableco neniel ĝenos ilin.

Vere, Beaufront ankoraŭ pli frue kontraŭmilitis en sia gazeto la ideon — konsideri tiun komitaton, kiel absolutan aŭtoritaton. Li emis rezervi al ĝi nur rolon konsilantan antaŭ d-ro Zamenhof, ĉar lia opinie la ŝanĝoj en la lingvo povos esti fiksataj nur de iu aŭtoritata institucio ne esperantista. Sed L. Beaufront ne ĉeestis persone la kongreson pro malsano, kaj tiamaniere do la problemoj estis solvita pozitive. Vere, la elektita komitato estis nomata ĝis la dua kongreso «provizora», sed post la dua Ĝeneva kongreso en la j. 1906 la provizora komitato daŭris kiel definitiva. Neniujn raportojn pri la ŝanĝproponoj la komitato prezentis al la Ĝeneva kongreso. Same kiel en la j. 1905 ankaŭ pli malfrue la problemoj pri eblaj reformoj ŝajnis esti danĝeraj al la gvidantoj kaj ili zorgis entombigi tiujn problemojn.

Kiel oni povis antaŭvidi, multnombra lingva komitato fakte ne estis kapabla priiskuti kaj solvi iujn pli aŭ malpli komplikajn problemojn. Por iel faciligi la laborojn de la lingva komitato — la IV-a kongreso en Dresden en la j. 1908 aprobis starigon de supera komisiono aŭ Esperantista Akademio, kiu devis esplori la problemojn, submetotajn al la lingva komitato, kaj formuli la demandojn, voĉdonotajn de tiu komitato.



Kiam la ido-skismo postulis plivigligon de la agado de la komitato (vidu ĉp. VII), la 13-IV—1909 per speciala cirkulero al la lingvokomitatoj estis proponite elekti 18 membrojn de la Akademio. Tiamaniere ĝi estis finkonstituiĝinta.

### Centra Oficejo Esperantista

Tuj post la kongreso en Bulonjo kunvenis la organiza komitato por la kongresoj kaj decidis starigi en Parizo specialan Esperantistan Centran Oficejon, servantan kiel sekretario por la lingva kaj la organiza komitatoj. La monon por aranĝi tiun oficejon donis d-ro Javal, riĉa kuracisto, kaj generalo Sebert, membro kaj gvidanto de la ĵus elektita organiza komitato. Post la morto de Javal en la j. 1907 la subtenadon de la oficejo daŭrigis g-lo Sebert sola.


Se C. Bourlet celis iun financon kaj komercan ekspluaton de esperanto-movado, Javal kaj Sebert sendube celis ne iun specialan profiton tujan, sed akcelis per la fondota centra oficejo eventuale gvidi laŭ sia bontrovo la tutan movadon.

La organizo de Centra Oficejo estis luksa kaj multpretenda, similanta al analogiaj internaciaj centroj por diversaj movadoj de la kapitalista socio. Ĉar ĝi estis tro kara por la realaj fortoj esperantistaj, ĝi povis ekzisti nur ĝis kiam ĝi estis subvenciata.

La personoj, timantaj malbonan kaj tro personecan influon de la parizaj gvidantoj, emis vidi en la nove fondita oficejo—esence la saman, nur sub nova nomo, pli frue projektitan Agadan Komitaton. C. Bourlet en franclingva artikolo «Organizu la venkon», presita en franca ĵurnalo «Espéranto» 1905 j., № 15, deklaris, ke privata iniciativo kreis Centran Oficejon, kiu devos ludi rolon de la centra komitato, malaprobata de la Kongreso en Bulonjo.

La 2-I—1903 Zamenhof devis iom mildigi la impreson kaj tial li skribis al Michaux, kiu mem subskribis en Bulonjo la protokolon pri funkciigo de la Centra Oficejo: «La centra oficejo estas nur privata kaj ne havas la rajton fari decidon, tuŝanta la esperantistaron». La 17-II—1903 Zamenhof publikigis specialan samteman klarigon, substrekante pure teknikan helpin rolon de la oficejo.

Post morto de Javal, dum la IV kongreso en Dresden 1908 j., estis iniciatita kreo de speciala societo el subtenantoj, kiu devis per sia helpo daŭrigi funkciadon de la Centra Oficejo sed tiu helpo restis nesufiĉa kaj la ĉefa subtenanto restis Sebert. C. Bourlet estis samjare elektita kiel vicprezidanto de la komitato de la kongresoj (anstataŭ «organiza



Generalo Sèbert



komitato» jam fariĝinta «konstanta»). Do en plua disvolvo de la agado de la Centra Oficejo li komencis ludi gravan rolon senkaŝan. En la sama 1908 j. Centra Oficejo komencis eldonadi «Oficialan Gazeton Esperantistan», kiu celis koncentrigi ĉe si ĉion koncernantan la ĝeneralan organizon kaj evoluon de la esperanto-movado.

### **Porlingvaj rezultoj de la unuaj kongresoj**

La unuaj kongresoj donis potencon puŝon al plua disvastiĝo de la movado. Tiu plua disvastiĝo ĉesis jam esti rezulto de laboro nur de apartaj personoj. Al tiu progresanta disvastiĝo servis jam ne nur la eldona agado de la firmao Hachette. Ĝin helpis vast-publika kompreno pri la ebla rolo de la lingvo internacia.

Multnombraj internaciaj konferencoj komencis voĉdoni favorajn rezoluciojn por esperanto. Plej ofte tiuj rezolucioj ne donis iun praktikan rezulton, sed ili estis grava simptomo, ke la ideo pri lingvo internacia ĉesas esti apartenaĵo de aparta malmultenombra areto mondingvana, ke tiu ideo jam iom post iom fariĝas akceptata de la vasta mondo.

La nombro de esperantistoj kreskis multe pli malrapide ol kreskis inter la vasta publiko ĝenerala kompreno kaj favoro por la L. I. En la popoloeto esperantista daŭris influi la samaj apartaj pretendantoj pri direktado kaj gvidado.

Io tamen ŝanĝiĝis en la antaŭa situacio. Pli klaraj fariĝis tendencoj kaj emoj de apartaj, gvidulojn dezirantaj, izoluloj. Klare elmontriĝis ia monopolemaj tendencoj de Hachette kaj Bourlet. Montriĝis, ke vole aŭ nevole Zamenhof troviĝas sub influo de tiu lasta. L. de Beaufront — la dua patro de esperanto — nek prezidis la 1-an kongreson, nek direktis la Lingvan Komitaton elektitan. Li estis jam difinite puŝita malantaŭen. Eĉ lia prezido, daŭranta en Franca societo por propagando de esperanto, ne povis nuligi tiun fakton.

La pli lertaj kontraŭuloj de Beaufront scipovis eluzi la tendencojn de vastaj amasoj esperantistaj, kiuj emis al la manifestado de la nebula esperantisma ideo. Tiamaniere al aŭtoritateco de praktika Beaufront kun lia pure teknika lingvo-konsidero estis donita forta bato.

Necesas tamen konfesi la bonon, kiun — eble senintence — faris la kontraŭuloj de Beaufront. La novaj gvidantoj de esperanto-movado en la kapitalista socio, deklamante belajn frazojn pri nebuleca interna ideo kaj certagrade ĝin kultivigante, reale servis al fortikigo de la esperantista solidareco, al pli intima ligiĝo inter la esperantistaro kaj la lingvo, al la lingvo entute kaj al la normala lingvoevoluo speciale.

### **Homaranismaj idealoj de Zamenhof**

Zamenhof restis nur ŝirmilo por la gvidantoj de la movado. La movado daŭris pluen, kaj ion ŝanĝi en ĝia evoluo li jam ne povis. Sed, entuziasmigita de la rezultoj de la 1-a kongreso aŭ eĉ simple de la di-



versnacia anaro, ĉeestinta tiun kongreson kaj aklande akceptinta lin—  
aŭtoron de la lingvo, Zamenhof celis doni al la idealisma esperantistaro  
iun pli konkretan idearon anstataŭ la nebula interna ideo.

Al liaj akceloj tiurilataj la tuta praktika esperanto-gvidantaro same  
kontraŭis, kiel ĝi kontraŭis ĉiujn provojn pli fikse formuli la moralan  
esencon de esperantismo kaj de la interna ideo. Zamenhof cedis, sed nur  
por nelonge. Li publikigis siajn koncernajn ideojn en anonima bro-  
ŝureto «Homaranismo-Hilelismo», eldonita en Peterburgo en la j. 1906  
(VII, p. 12) de la Societo «Espero». Publikigon de tiu broŝuro antaŭis  
preso de ĝia enhavo en la gazeto «Ruslanda Esperantisto». Ree la rusaj  
esperantistoj subtenis idealismajn aspirojn de Zamenhof. Tamen la pro-  
testoj daŭrintaj devigis Zamenhof lasi pluajn provojn propagandi  
kaj defendi siajn ideojn. Nur en la j. 1912, kiam Zamenhof publike  
lasis ĉian oficialan rolon en la esperanto-movado, li ree komencis sin  
okupi pri homaranismaj ideoj. Izolaj revemuloj kaj idealistoj subtenis  
la ideojn de sia majstro. En Madrid en la j. 1913 estis eldonita nova  
broŝuro «Deklaracio pri homaranismo». Estis preparata internacia kon-  
ferenco de homaranismanoj dum la jaro 1914. La mondmilito fuŝis tiun  
entreprenon. Kaj la morto de Zamenhof, okazinta en j. 1917, ĉesigis iun  
pluan propagandon por homaranismo.





## VI. LA DELEGITARO POR ALPRENO DE LA LINGVO INTERNACIA

### Organizo de la delegitaro

En la j. 1900 du francaj scienculoj L. Couturat kaj L. Leau fondis, interkonsente kun pluraj scienculoj, ĉeestintaj la tiutempajn internaciajn mondkongresojn en Parizo, la delegitaron por alpreno de la lingvo internacia. La Delegitaro celis: 1) peti Internacian Ligon de la Akademioj, ke ĝi esploru, kiu el la ekzistantaj artefaritaj lingvoj taŭgas plej bone al la rolo de lingvo internacia, kaj 2) en la okazo, se la Internacia Ligo de Akademioj rifuzus fari tiun elekton, elekti mem certan komitaton por esploro de tiu demando. Provizore Delegitaro celis kolekti plej multajn subskribojn de scienculoj kaj de diversaj asocioj diverslandaj sub sian Deklaracion kaj sub la petskribon, prezentotan al la Ligo de Akademioj. Tiuj subskriboj celis samtempe fari la problemon pri mondlingvo impona antaŭ la okuloj de la socio.

La ĉefa iniciatinto de la Delegitaro, Louis Couturat estis, sendube multflanke tre talenta homo. Jam en la gimnazio li estis 34 foje premiita. Li sin okupis pri historio de arto, pri filozofio kaj matematiko (XII, p. 4).

Laboroj super la verkoj de Leibnitz tiris lin al la ideo de la lingvo universala. Organizinte la Delegitaron, Couturat plej energie faris ĉion por garantii bonsukceson al ĝia laboro kaj por atentigi pri ĝi vastan publikon. La Deklaracio de la Delegitaro tiucele fakte ripetis la ideojn, esprimatajn en la Zamenhova artikolo «Esenco kaj estonteco de la lingvo internacia» (Fundamenta Krestomatio, p. 268—316). Lia argumentado servis por igi la diverslandajn esperantistojn—plej bonaj propagandistoj por la Delegitaro.

La daŭranta kresko de esperanto-movado, praktika fiasko de ĉiuj aliaj mondlingvaj projektoj kaŭzis, ke la tuta esperantistaro kredis, ke la Delegitaro devige elektos nur esperanton. Membro de la delegitara patronkomitato prof. W. Ostwald mem skribis: «Persone mi pli kaj pli konvikiĝas, ke esperanto estos elektita» («Mej' unarodni Jazik», rusa eldono, p. 30). Zamenhof mem konjektis la saman. Tamen, homo singarda—li antaŭvidis okazon, kiam la Delegitaro provos enkonduki certajn reformojn en esperanto. Tial la 31-I—1907 j. li skribis al Michaux: «Mi opinias, ke ĉiu esperantisto faros tre bone, se li helpas la delegacion, sed li devas fari tion private ne en la nomo de esperantistaro kaj ne ligante sin blinde antaŭe per promeso. Fari reformojn ni povos, se la komitato de Delegacio havos tre grandan aŭtoritatecon en la okuloj de la mondo».



Ĉiukaze necesas konstati, ke esperantistoj estis plej aktivaj propagandistoj de la delegitara entrepreno kaj plej energiaj varbantoj por ĝi. Inter la esperantistoj troviĝis personoj, finance subtenantaj la Delegitaran agitadon. Unu el tiuj subtenantoj N. P. Evstifeieff, malnova rusa esperantisto, subvenciis laboron de Couturat per sumo de pluraj miloj da frankoj. La leteroj de Couturat, adresitaj al Evstifeieff dum la jaroj 1903—1907, kiujn ni vidis, pravas, ke Couturat plej zorge intertraktis kun ĉiuj esperanto-gvidantoj, ke li zorgis ilin konvinki pri eventuala favora por esperanto decido de la Delegitaro, ke li ironie rilatis al ĉiuj aliaj konkurantaj projektoj kaj nur aludis eblan diskuton inter la esperantistoj konservemuloj kaj la reformemuloj.

La Delegitaro neniam havis karakteron de publike organizita asocio. Ĝiaj sekretario Leau kaj kasisto Couturat estis de neniu elektitaj, kaj fakte ili tenis la tutan aferon aŭtokrate en siaj manoj. Neniu reviziado de ilia agado okazis (X, p. 3). Tia situacio kaŭzis, ke la tuta entrepreno dependis de iniciato, agemo kaj bontrovo de tiuj du personoj, kaj speciale de L. Couturat.

La sociaj fortoj, sur kiuj volis kaj povis sin apogi la Delegitaro, estis la samaj, kiuj jam partoprenis la esperanto-movadon. Novajn imponajn fortojn la Delegitaro ne trovis. Same ĝi malmulte sukcesis en serĉado de novaj aŭtoritatoj. Estis klare, ke la tuta Delegitara entrepreno povas ekzisti nur kiel akcesoraĵo al la esperanto-movado, ke nenian memstaran socie-gravan rolon ĝi ludi povas.

En la j. 1906, kolektinte aliĝojn de 1251 profesoroj, akademiianoj kaj scienculoj kaj de 307 societoj, la Delegitaro sin turnis al la internacia Asocio de Akademioj kun peto preni la difinitan solvon de la mondlingva problemo en siaj manoj. Kiam la Akademia kongreso la 29-V—1907 decidis, ke tiu problemo estas ekster ĝia kompetenteco, la Delegitaro laŭ propono de Couturat elektis 18-membran komitaton por memstare solvi la problemon.

Ĝis la lasta momento esperantistoj subtenis Delegitaron. Couturat zorgis, ke la esperantistaro daŭru konfide rilati al lia entrepreno. Kiel kontrolanto de la balotiloj, ĉe la elekto de la delegitara komitato, funkciis g-lo Sebert, direktanto de la Centra Oficejo esperantista.

### Reformemaj ideoj ĉe Couturat

Filozofia kaj matematika karaktero de lia edukado tiris Couturat al ideo prezenti ankaŭ la lingvon internacian en formoj kvazaŭ matematike-logikaj. De tie venis liaj ideoj pri la derivado, tre valoraj de vidpunkto teoria, sed praktike malfacile efektivigeblaj kaj multe ĝenantaj liberan evoluon de la lingvo, uzata de vastaj popolamasoj. Konvinkita pri sia sciencista supereco, konsiderante sin la unua serioza esplorinto de la lingvo internacia, Couturat volis pensi, ke ĝuste liaj ideoj pravas, ke ĝuste li devas solvi la problemon difinite. Li venis



iom post iom al ideo aranĝi la aferon tiel, ke la Delegitaro enkonduku liaopinie necesajn reformojn en esperanto. Kelkaj faktoj el esperanta historio kvazaŭ montris, ke simila proce estas efektivebla.

Couturat estis informita pri la reforma krizo de la j. 1894. Same li sciis pri la projekto de la Kanada gazeto «La lumo» (v. ĉap. V). Li konatiĝis kun la «Fonetiko litera» de M. Verema (v. ĉap. V), kies dua eldono aperis en la j. 1906. Laŭ A. Michaux — «reformemuloj de la j. 1905 ankaŭ sendis siajn ŝanĝproponojn al Couturat». Ĉi tio sendube povis influi la pensojn kaj agojn de Couturat.



L. Couturat

Ankoraŭ pli devis influi la fakto, ke la ĉefa subtenanto de Esperantista Centra Oficejo d-ro Javal (v. ĉap. V) estis reformema — almenaŭ rilate la esperantan alfabeton. Couturat sciis, ke Javal por logi Zamenhofon al siaj ideoj promesis al tiu senhava kuracisto ŝatindan monsumon da 200.000 frankoj kondiĉe, ke li venos Parizon kaj subtenos la Javal-an reformprojekton.

Zamenhof rifuzis, rigore obeante la deklaron iam faritan, ke esperanto jam ne estas lia propraĵo. Tiam Javal, sen konsento de Zamenhof,

broŝure, reeldonis en la j. 1907 artikolojn de Zamenhof pri reformoj, kiujn li proponis en la j. 1894 kaj kiuj siatempe estis presitaj en la gazeto «Esperantisto». Nur la morto de Javal, okazinta du semajnojn antaŭ apero de tiu broŝuro el la presejo, kaŭzis, ke Javal ne manifestis pli klare siajn simpatiojn al la reformaj ideoj de Couturat. Sed nenio pruvas, ke Zamenhof estis ĝenerale kontraŭ iuj reformoj kaj speciale reformoj de la alfabeto. En broŝuro de Javal «Fonetika skribado por enpresigoj en neesperantistaj gazetoj», datita la 5-I-VII kaj disdonita al la membroj de la Lingva Komitato, troviĝas atesto, ke la 23-XI—1906 Zamenhof skribis al Javal koncerne liaj proponoj pri reformo de la alfabeto: «Mi nenion havas kontraŭ tio-ĉi se vi diros al ĉiu ke vi faris la proponojn kun mia konsento» («Progreso» 1908 № 2 p. 58). Eĉ C. Bourlet volis mem — laŭ aserto de A. Michaux — reformi la alfabeton, sed nur laŭ maniero malsama al tiu de Javal.

Ĉi-ĉio kaŭzis, ke Couturat povis riski prezenti ankaŭ siajn proprajn reformo-ideojn, des pli ke al tiuj ideoj li povis aranĝi formalan subtenon de la Delegitara Komitato.



## Beaufront-reformisto

Ankoraŭ unu eminenta esperantisto estis de Couturat gajnita por la reformaj ideoj. Kaj tiu eminentulo ŝajnis al Couturat plej grava kaj valora.

Kiam L. de Beaufront en la j. 1888 aliĝis al esperanto, liadire, li jam estis ellaborinta plenan projekton de lingvo internacia, nomitan Adjuvanto kaj mirinde similan al esperanto. Por konservi ateston pri sia aŭtoreco kaj pri sia laborado, Beaufront deponis la projekton «al forta kofro de notario».

Post 20 jaroj tamen ekestis duboj, ĉu Beaufront estis efektive ellaborinta tiun projekton, aŭ ĉu estis nur kelkaj ideoj, neniam pliprecizigitaj surpapere. Tiajn dubojn forte subtenas koncernaj artikoloj de ERA en la gazeto «Lingvo Internacia» (j. 1908, № 4 kaj sekvantaj). Oni ĝenerale pridubis honestecon de Beaufront. Eĉ Th. Cart, jarlonga kunbatalanto de Beaufront, skribis al ni, ke «Beaufront estis ĉiam mensogema». Oni citis la fakton, ke dum la Ĝeneva kongreso Beaufront transdonis kison de filozofo Naville al d-ro Zamenhof, kaj poste evidentiĝis, ke Naville nenion similan intencis.

La pozicio kaj la situacio difinas la personecon. Tial ni tute ne kompromitas la personecon de Beaufront, konjektante, ke ambaŭokaze, rilate sian Adjuvanton kaj la kison de Naville, Beaufront iom trograndigis la faktojn, celante per tio nur bonon de la afero. Sendube la historio pri Adjuvanto estis bonega propagando por esperanto, kaj same statis la afero kun la kiso.

Beaufront estis sendube plej praktika propagandisto de la lingvo. Pro konsideroj praktikaj kaj propagandaj — Beaufront estis siatempe kontraŭ ĉiaj reformoj kaj reformo-diskutoj inter la esperantistaro. Plej energie li kontraŭbatalis ĉiujn similajn proponojn en sia gazeto «L'Esperantiste». En la j. 1904 li akre protestis kontraŭ la kanada gazeto «La Lumo», kies redaktoro proponis forigi la supersignitan literaron.

Sed iom post iom ŝanĝiĝis persona situacio de Beaufront en Esperantujo. Th. Cart skribis al ni: «La Pariza konflikto inter esperantistoj (precipe inter Bourlet kaj Beaufront) estis nur persona kaj tute ne rilatis la lingvon, sed la propagandan agadon». Tamen tiu konflikto kaŭzis, ke inter la personoj kaj grupoj, celantaj gvidan rolon en la movado, jam mankis loko por Beaufront.

Tian situacion povis bonuzi Couturat por doni al Beaufront ideon renversi la klasikan esperanton kaj krei novan movadon kun lingvo reformita, ĉe kiu la gvidrolo, sendube, apartenos al la iniciatinto de la reformoj. Per la sama faro Beaufront povis esperi ankaŭ regajni la pozicion, perditan dank'al likvido de lia peranta rolo inter Zamenhof kaj Hachette.

Kiel teoriisto mondlingva Beaufront pleje taŭgis por efektivigo de simila projekto. Publike li jam estis konata kiel aŭtoro de Adjuvanto; kaj, krome, el la esperantistaj lingvo-aŭtoritatoj li estis plej samidea al la raciigaj tendencoj de Couturat.



«La lingvon same kiel la propagandon li volis reguligi per dogmoj» — skribis E. Privat (I, p. 47). «En sia komentario pri esperanto li ne multe analizis la ĝeneralan uzadon de la lingvo, sed pleje montris, kiel oni devas ĝin uzi laŭ logiko. Gramatiko de esperanto fariĝis (laŭ Beaufront) longa kaj malsimpla kolekto da leĝoj kaj esceptoj. Certe, de Beaufront per sia severa juĝado instruadis la adeptojn pri lingva korekteco, sed nemulte pri la spirito de la lingvo» (I, p. 48).

Ankaŭ K. Brüggemann skribis pri Beaufront: «Li estis la unua, kiu ellaboris plenan gramatikon de la lingvo, ĉar kvankam la esperanta gramatiko estas tre simpla kaj mallonga, la naciaj gramatikoj estas malsimplaj, komplikitaj per multnombraj nelogikaĵoj. Tial la rolo de naciaj esperanto-gramatikoj ne povas esti limigata al simpla kurso en esperanta gramatiko» (IV, p. 21).

Similvorte pritraktis la rolon de Beaufront-lingvisto ankaŭ A. Zakrzewski (V, p. 59).

Beaufront provis adaptigi esperanton al la formoj kaj strukturo de eŭropaj fleksiaj lingvoj, ne komprenante ĝian esence aglutinan karakteron kaj neceson, ke ĝi sekvu siajn proprajn evoluvojn. De tiu vic'punkto Beaufront neniam estis vera esperantisto, komprenanta la esencon de esperanto, kiel instrumento de kolektiva bezono kaj uzado, kolektive perfektigota kaj evoluota.

E. Privat skribis pri li: «severa juĝisto li instruadis la esperantistojn kaj korektis samtempe erarojn de gramatiko kaj erarojn de propagando. Kritikantojn de la lingvo li fiere kaj logike rebatis kaj resendis al lernejo, kiel nesciantajn infanojn. Reformemulojn li ridindigis kaj ekskomunikis kiel ofendita episkopo» (I, p. 45).

Beaufront estis por sia tempo vera papo en Esperantujo. Sed aŭdiĝis jam novaj voĉoj de personoj, komprenantaj fuŝajn flankojn de Beaufront-a lingvo-agado. Dum la 1-a kongreso en Bulonjo, d-ro K. Bein publike konstatis, ke «multpeza stilo kaj aliaj Beaufront-ismoj» estas postsignoj de la «periodo franca», en la historio de esperanto. K. Bein antaŭvidis novan internacian periodon, kiam glatiĝos tiuj difektoj.

Do Beaufront — teoriisto de la lingvo — komencis fiaski ĉe esperantistaro. Oni pli atentis jam novajn aŭtoritatojn, ĉu organizajn, ĉu lingvajn. Restis al Beaufront sola eblo — provi restarigi sian pozicion per helpo de la Delegitaro, prezentante al ĝi kompletan projekton pri reformoj en esperanto.

Beaufront plene rajtis tion fari, ĉar li ĉiam asertis, ke esperanton rajtas reformi nur ekster esperantistoj staranta aŭtoritata institucio. Kaj la Delegitaro li volis konsideri kiel sufiĉe aŭtoritatan por entrepreni tian reformadon.

Tamen la agoj de Beaufront estis ne lojalaj (X, p. 18—19). Li ne nur prezentis anonime sian projekton al la Delegitaro. Li samtempe akceptis reprezenti kaj defendi anstataŭ Zamenhof esperanton dum la kunsidoj de la Delegitara komitato. Publika defendanto de klasika esperanto, li estis samtempe ĝia anonima kulpiganto.

Prof. Ĵirkov akceptas la fakton, ke Beaufront, agante tiamaniere, agis bonafide, konjektante ke tiamaniere li servas al la bono de la mo-



vado de L. I. (III, p. 18). Certagrade tio estas ĝuste, ĉar «la bono de movado» ĉe Beaufront psikologie estis nepre ligita kun pure personecaj konsideroj. La bono de la movado devis konsisti, laŭ Beaufront, en tio, ke ĝi iru laŭ vojoj signitaj de Beaufront, ke Beaufront restu ĝia gvidanto, ke esperanto restu ĉe tiuj formalaj teorioj, kiujn li starigis. Kaj ĉi-tio estis realigebla nur per ĝenerala rompo en la esperanto-movado, kiu devis anstataŭi la diversajn gvidantojn de la movado, okupintajn siajn postenojn post la j. 1905,—per nova personeco de la aŭtoro de la reformaj proponoj.

Couturat kaj Leau estis solaj informitaj pri la agoj de Beaufront. Ni rajtas supozi ke eĉ pli: Couturat estis iniciatinto de la tuta tiu komploto. Nia opinio ne pravas L. Ĵirkov, asertante, ke Couturat estis nur teoriemulo kaj ke la sola organizinto de la tuta Delegitara reforma entrepreno estis Beaufront (III, p. 22). Ĉio, kion ni scias pri Couturat, pri lia energio, pri lia talentoplena militiro kontraŭ esperanto post la j. 1908 pravas, ke li estis lerta diplomato kaj organizanto, ke, verŝajne, estis li, kiu konvinkis Beaufront partopreni en tiu reforma afero, kaj ne male. Ĉiuokaze, la aliaj membroj de la Delegitara komitato nenion sciis pri la internaj aranĝoj inter Beaufront kaj la sekretarioj de la Delegitaro. Tion atestas plej kategorie ankaŭ membro de la Delegitara komitato, fama dana lingvisto Otto Jespersen (XI, p. 19). Sed tiu atesto ĝuste pravas la fakton ke certa interkonsento inter Beaufront, Couturat kaj Leau ekzistis. Tiuj lastaj solaj sciis la veran aŭtoron de la reformaj proponoj. Krome, la reforma projekto, prezentita de Beaufront, estis vera sekvo el la «Studo pri la derivado», prezentita al la komitato de Couturat, kaj el la «Konkludoj prezentitaj al la Delegitara komitato de ĝiaj sekretarioj» (Couturat kaj Leau).

### La komitato de la delegitaro

En tiuj laste cititaj verkoj, kiuj kvazaŭ antaŭskizis la agadon de la Delegitara komitato, estis entenata vasta kritiko de tiuj elementoj en esperanto, kiuj—laŭ opinio de Couturat kaj Leau—ĝenis ĝian pli vastan aplikon. Speciala kritiko estis adresita al la supersignitaj leteroj.

Kio koncernas teoriantan valoron kaj neceson de la proponitaj ŝanĝoj kaj reformoj, — bonan analizon tiurilatan donis unu jaron pli malfrue membro de la Delegitara komitato kaj vic-prezidanto de ĝia komisiono Baudouin de Courtenay: «tiu tendencio al la reformoj venas de la inklino serĉi truon sur la tuto bona, t. e. — ofta flikado de esperanto sen sufiĉaj motivoj. La rolo de la Delegacio, de la komitato elektita de ĝi kaj de la konstanta komisiono estas malprosperinta» («Progreso», 1909, p. 114).

La komitato kunvenis en Parizo kaj kunsidis tie inter 15—24 de oktobro 1907. Post detala ekzameno de diversaj lingvo-projektoj — ĝi esploris ankaŭ la projekton de Beaufront, kiu konsistis el gramatiko, ekzercaro, kaj specimena vortaro. Aŭtoro sin kaŝis sub pseŭdonomo — IDO.



La komitato, konforme al raportoj de Couturat kaj Leau, aprobis tiun projekton. Tamen pro konsideroj praktikaj kaj pro forta disvastiĝo de esperanto, la komitato deklaris, ke principe estas akceptata esperanto kun diversaj modifoj. Publikigon de la Delegitara decido oni prokrastis por povi intertrakti kun la Esperantista Lingva Komitato.

### **Esperantistaj rilatoj al la decidoj de la komitato**

Por gvidi tiun pritrakton la Delegitara Komitato elektis specialan komisionon, en kiun ree eniris kiel konstantaj sekretarioj Couturat kaj Leau. Pro lia «speciala kompetenteco» en la komisionon estis elektita ankaŭ L. de Beaufront.

Couturat kaj Leau konsideris la tutan problemon, kiel pure teknikan. Ili skribis: «Ni rajtas aserti, malgraŭ iaj bruaj deklaroj aŭ teatraj manifestacioj, ke la granda plimulto de la esperantistoj akceptus tian modifon... kaj ke tia lingvo (reformita) havus ĉiujn ŝancojn kunigi aparte ĉiujn partianojn ĉu de la ceteraj sistemoj, ĉu de la mondlingvo ĝenerale».

Ili eraris, konjektante tiamaniere pri la eventuala konduto de la esperantistaro. La esperantistaro montris neniun intereson por senrezerva akcepto de la proponitaj reformoj. Multe pli antaŭvidemaj estis tiuj gvidantoj de la «Esperanta Popolo», kiuj, eble ne partoprenante ĝiajn esperantismajn iluziojn, tamen bone taksis tiujn iluziojn kaj serĉis en tiuj iluzioj apogon por batali kontraŭ reformoj, proponitaj de la Delegitara Komitato, kaj povintaj forpreni de ili la ĉefrolojn en la mondlingva movado.

La ĉefoj esperantistaj ne estis emaj al reformoj pro konsideroj negocaj. La esperantistaro, praktikante la lingvon internacian, tute ne sentis iun bezonon ĝin reformi. La esperantaj gazetoj komencis akre kontraŭbatali la decidon de la Delegitara Komitato, komencis pruvi, ke de vidpunkto formale jura ĝi estas senvalora—aŭ, en plej bona okazo, simple ĝin prisilentis. Simila kontraŭbatalo ligita kun diversaj personaj ĉikanoj aŭ kun prisilentado, ja estis tradicio ĉe la gazetaro, kreskinta en la socio, bazita sur plej senindulga reciproka konkurado de apartaj individuoj.

Ĉiuokaze de la komenco mem mankis ia bazo, por ke bonsukcesu la intertraktoj inter la Delegitara Komisiono kaj la Esperantista Lingva Komitato.

### **Malkovro de anonimeco de Ido**

Inter la esperantistoj komencis disvastiĝi famoj, pri stranga konduto de Beaufront, pri stranga parenceco inter la tekstoj publikigitaj de Adjuvanto kaj la formoj de la anonima projekto de Ido. Multaj miris, ke Beaufront iĝis membro de la Delegitara Komisiono. La parizaj esperantogvidantoj bone komprenis, ke se la reformo-projekto de la Dele-



gitaro havus sukceson, — tiam ilia gvida rolo estus minacata. Speciale minaca estus fariĝonta por ili la situacio, se efektive Beaufront, kiun ili iam puŝis de la gvida rolo, nun estus montrinta sin kiel aŭtoro de IDO. Tial tiuj gvidantoj komencis jam antaŭtempe fari ĉion por kompromiti la Delegitaron kaj Beaufront. En tiuj siaj agoj ili sukcesis.

La suspektata Beaufront tuj post fino de la Komitataj kunsidoj solene deklaris, ke «Adjuvanto, nek ĝia aŭtoro neniam estis por io kandidatoj antaŭ la Delegacio» («L'Esperantiste», 1907, p. 194). Ankoraŭ kelkfoje dum duono da jaro Beaufront rifuzis aŭtorecon de la projekto IDO. En februaro de 1908, kiam la intertrakto inter la Delegitaro kaj la esperantistaj gvidantoj jam estis ĉesigita, Beaufront riproĉis «kelkajn flankajn personojn, ellaborintajn la decidojn, kiuj malhumile postulis, ke tiuj decidoj estu akceptataj, ne atendante la esperanto-kongreson» («L'Esperantiste», 1907, № 2).

En la franclingva broŝuro, verkita de Beaufront kaj subskribita de IDO, «La veraj principoj de la lingvo helpa», estis akraj kritikoj, direktitaj kontraŭ «unu el la esperantistaj ĉampionoj—L. de Beaufront». Neiel oni rajtis supozi, ke la anonima aŭtoro kritikis sin mem <sup>1)</sup>.

Nur tre singardeme Beaufront kuraĝis esprimi en sia gazeto la ideon, ke eble estus bone trovi interkonsenton kun la Delegitaro. Tamen li ĉiam daŭris aserti, ke necesas atendi rezultojn de la intertraktoj. Pli senkaŝe, kiel tion atestas Era en la «Lingvo Internacia», Beaufront defendis la Delegitaran projekton en siaj privataj leteroj. Kaj nur en maja № de «L'Esperantiste» aperis deklaro de IDO, pri kiu Beaufront deklaris, ke ĝi estas — la lia.

Se Beaufront estus siatempe kompreninta la internan evoluo-forton de esperanto, li neniam riskus agi, kiel li agis. Li malsukcesis, ne kaptinte la spiriton de la popolo, kies lingvon li ŝanĝi volis, kies gvidanto li revis refariĝi. Same li malsukcesis, esperante, ke la aŭtoritateco de la Delegitaro sufiĉos por ke la mondo neesperantista ekkonsideru la problemon, kiel difinite solvitan.

Eble, Beaufront eĉ antaŭsentis ion similan, kaj nur premita al la muro, unuflanke de esperantistoj kaj aliaflanke de ortodoksaj esperantistaj gvidantoj, — li estis devigita difinite rompi kun esperanto kaj komenci senkaŝan militiron sub la standardo de IDO. Almenaŭ en la № 2-a de «Esperantiste» 1907 j., 9 monatojn antaŭ la kunsido de la Delegitara komitato, kiam la preparoj pri publikigo de IDO-projekto certe jam estis farataj (X, p. 14) — li skribis: «Mi prezentus eĉ kelkajn sistemojn, kiujn la plimulto da homoj kaj precipe la kleruloj proklamus pli bonaj ol esperanto. Tion farinte mi pruvus al ili, ke mi tute simple prezentis al ili veran tromplogilon». Se la entrepreno de la Delegitaro ne estus sukcesinta, ĉu povis esti por okazo iu pli bona pruvo, ke partoprenante tutan tiun aferon Beaufront celis nur trompi la teo-

<sup>1)</sup> Tiu broŝuro aperis en la j. 1908, kiam komenciĝis jam batalo inter la ambaŭ sistemoj. B. Kotzin erare notas aperon de tiu broŝuro al la j. 1907.



riulojn kaj reformemulojn, ke li restis plej konsekvenca esperantisto kontraŭ-reforma, nur uzinta iom-originalan rimedon por moki siajn kontraŭulojn.

La tuta Delegitaro afero estis multfoje pritraktita en la esperantista gazetaro kaj historia libraro. Certe, de Beaufront agis ne lojale, akceptante de Zamenhof la komision reprezenti kaj defendi esperanton, kaj samtempe, partoprenante kun Couturat kaj Leau en ellaboro de plena reformprogramo. Tamen ĉi-tie temas pri certa taktiko, kiu estas pravigata per la celo. Kaj la celo de Beaufront, defendi siajn ideojn kaj metodojn, konservi la movadon sub sia influo—subjektive estis neniel pli malalta ol la celoj, kiujn aspiris liaj kontraŭuloj—fundamentistaj defendantoj de esperanto.

### Zamenhof kaj la Delegitaro

Sendube, Zamenhof estis la persono plej intime ligita kun la lingvo esperanto. La faktoj, kiujn ni scias, neniel pruvas, ke Zamenhof estis kontraŭ reformoj. Sed por li—pli gravis la praktika realigo de la L. I., ol eĉ la plej bonaj liaopinie ŝanĝoj en la lingvo. Li pleje zorgis pri la unueco inter la esperantistaro. Li estis gardanto de tiu unueco, kaj volis neniel helpi al rompo de tiu unueco. Tial li komence serĉis laŭpovan interkonsenton kun la Delegitaro komisiono. Tial li intertraktis kun Couturat kaj provis inokuli al li siajn ideojn pri la Delegitaro.

La 31-I—1903 Zamenhof skribis al Michaux, ke «Couturat... scias, ke mi mem multe klopodis pri kelkaj plibonigoj, ke mi volonte lin helpus, sed kelkaj personoj ne volis agi kun la esperantistaro; ili volas dikti ordonojn al la tuta popolo». Ankaŭ pli poste li esperis eblan repaĉigon. Michaux en sia letero, sendita al ni la 31-I—30 skribis: «Zamenhof deziris, ke mi daŭru la rilatojn kun Couturat, ĉar li esperis kiel mi, ke ĉiuj ribeloj sin klinigos antaŭ l'esperantistaro voĉdonanta. En tia okazo de Beaufront, Schneeberger, Moch, kiuj estis malfeliĉaj pro la rompo, promesis al mi reveni kun mi».

En la «Originala Verkaro de d-ro Zamenhof», eldonita en la j. 1929 (VII) mankas pluraj leteroj de Zamenhof al Couturat, skribitaj inter la jaroj 193—1908 kaj publikigitaj en aparta broŝuro en la j. 1914 per la zorgoj de Couturat (XIII). Nature, Couturat per siaj aldonaj notoj al tiuj leteroj volas kredigi, ke la leteroj de Zamenhof montras, ke tiu lasta ne honeste agis kun la Delegitaro kaj ne plenumis siajn promesojn subigi al ĝiaj decidoj. Tiu klopodo de Couturat restas tamen senefika, ĉar en ĉiu letero, eĉ esprimante simpatiojn por kelkaj reformoj, Zamenhof forte substrekas la nepran premison—por ke la reformoj estu enkondukotaj—necesas, ke la Delegitaro Komitato estu tre aŭtoritata. Tiel, ekzemple, en letero de 4-XII—06 li skribis (XIII, p. 9): «Mi devas sincere konfesi al vi, ke mi forte dubas, ĉu via komitato havos ian aŭtoritaton en la okuloj de la mondo».

Zamenhof konsideris la tutan problemon pri reformoj, kiel dependan de la volo de esperantistaro, kaj li pensis, ke — por fari tiun volon reformema — necesas granda aŭtoritato kaj forto, postulanta tiujn



reformojn. Publikigante koncernan leteron de Zamenhof de 13-I—07 Couturat faras rimarkon: «D-ro Zamenhof ĉiam nur pensis: «kiu estos pli forta — la Delegitaro aŭ la esperantistaro» — kaj neniam li pensis pri la forto, kiun povus havi la Delegitaro kun la esperantistaro» (XIII, p. 14). Multe pravas Couturat en tiu noto; sed ĝuste tiu pensmaniero de Zamenhof montras, ke li konsideris la evoluon de mondlingvo kiel ĉefe dependantan de la amasoj ĝin uzantaj. Zamenhof agis kiel socia publika batalanto; kaj Couturat male — almenaŭ tiutempe — konsideris la aferon, kiel solveblan per iu diplomata intertrakto kaj interkonsento de la Delegitaraj kaj Esperantistaj ĉefoj.

D-ron Zamenhof okupis samtempe du zorgoj paralelaj. Li deziris, ke esperanto estu laŭeble perfekta kaj senmakula, por ke ĝin povu akcepti la tutmondo; kaj samtempe li zorgis konservi unuecon kaj kreskoforton por tiuj amasoj, kiuj jam venis al esperanto.

La duan zorgon li konsideris pli grava. Kiam en la fino de oktobro 1907 Zamenhof ricevis la protokolojn de la Delegitaro kaj la verkojn de IDO, li skribis al Couturat: «Respondon mi povos doni al vi ne pli frue ol kiam mi scios la opinion kaj dezirojn de esperantistoj» (XIII, p. 19). Nur, konvinkiĝinte, ke la plejmulto de esperantistoj restas fremda al la ideoj de la Delegitaro, Zamenhof finfine rompis kun ĝi kaj proponis al la esperantistaro trankvile iri sian vojon.

### Rompo de la intertraktado

La ĉefa organizanto de la Delegitara entrepreno — Couturat volis ignori la inertan kontraŭreformatan amason de la esperantistoj. Li postulis, ke la esperantistaj ĉefoj akceptu senrezerve la decidojn de la Delegitaro. Li sekvis tiurilate la ekzemplon de la prezidanto de la Delegitar-komisiono prof. Ostwald, kiu skribis al Zamenhof, «ke por li la Lingva Komitato kaj la kongreso ne ekzistas» (XIII, p. 21).

A. Zakrzewski skribis (V, p. 133): «mirinde estis, ke la komisiono povis supozi, ke la esperantistoj konsentos laŭ simpla invito akcepti ŝanĝojn faritajn de ia ekstera, de ili ne rajtigita, institucio». Tamen simila supozo ĉe Couturat estis kaŭzita de la konvinko, ke Beaufront same sukcesos tiri post si la amason esperantistan, kiel li sukcesis kuntiri certan nombron de eminentuloj: Lemaire, Schneeberger, Ahlberg, Kofman.

Couturat, supozeble, ne nur ne timis la rompon de la intertrakto, sed eĉ estis ĝin deziranta. Li pensis, ke la amasoj estos sufiĉe propaganditaj per tiuj esperantaj gazetoj, kies eldonantoj favoris al la reformoj kaj al la Delegitaro. Li pensis, ke la kontraŭ-reformaj ĉefoj esperantistaj restos izolitaj. Sed ankaŭ tiuj kontraŭ-reformaj ĉefoj volis rapidigi la rompon. Al ili ŝajnis, ke ĉar plua prokrasto nur kaŭzos senutilajn diskutojn, ĝenos la propagandon kaj instigos multajn lasi la tendaron esperantistan.

Tiun aserton subtenas Michaux, kiu al ni skribis: «C. Bourlef kaj Cart timis la repaciĝon kaj preferis rapidigi aĉefinitivan rompon per ekskomunikoj antaŭtempaj en siaj ĵurnaloj. Aliparte, Beaufront kaj



Couturat rapidigis la postulon de respondo de Boirac (prezidanto de la Lingva K-to), farante malbonan kalkulon psikologian».

Do ambaŭ flankoj estis pretaj por konscie rompi la intertrakton, estante certaj, ke tiamaniere ili pli rapide akiros la venkon absolutan. Sed la reformistoj eraris, farinte malbonan socian kalkulon, kaj ne konsiderinte la inertecon prireforman de la amaso de esperanto-praktikantoj.

En realeco ne nur la tuta Delegitar-reform-entrepreno havis, kiel sian kaŭzon—certajn personecajn aspirojn kaj akcelojn, sed ankaŭ pli poste — la rompo en la traktado inter la esperantistaro kaj la Delegitaro estis kaŭzita de certaj individuoj, sen iuj motivoj profundaj aŭ socie-gravaj.

Ke ne nur ni konsideras tutan tiun skismon, kiel kaŭzitan de certaj personoj pro motivoj personaj, — tion pruvas la opinio de la fama Charles Richet — sendube ne kolektivisme pensanta homo, ke espereble okazos iam repaciĝo de esperantistoj kaj idistoj, ĉar «estas multe pli la demando pri personoj ol pri la principoj» (v. «Progreso», 1914, № 7, p. 447).



**E. Boirac**

La ĉefa amaso de esperantistoj restis fidela al esperanto ne pro ĝia perfekteco, sed pro certaj socialaj motivoj. Tiun aserton plej bone pruvis la fakto, ke al nova lingvo de la Delegitaro aliĝis nur 3—5% de la esperantistaro. Nur inter la gvidantoj — la organizantoj de la movado, kiuj iamaniere profitisaŭ celis estonte profiti la movadon, nombro de lasintaj esperanton personoj — estis pli granda. Laŭ atesto de E. Privat el la gvidantoj tiutempaj al Ido transiris ĝis 20% (II, p. 63).

Pravis E. Boirac — prezidanto de la lingva komitato, kiam li skribis en la letero de 14-XII 1907 j., adresita al prof. Ostwald — prezidinto de la Delegitara komisiono: «laŭ ni esperanto estas lingvo jam ekzistanta, vivanta, simila en tiu rilato al naturaj kaj naciaj lingvoj, angla, franca, germana k. t. p.; ĝi estas konsenkvence kiel ili fakto kaj eĉ fakto sociala, kiu evolucas same, ĉiuj socialaj faktoj per la agado grandparte meminciata de la homaro, kies vivon ĝi siamaniere ebligas...»

Konforme al la propono, farita de la Delegitara komisiono, la cirkulero № 7 de la Lingva komitato, datita 6-XI—1907 j. demandis la lingvokomitatojn,—ĉu ili aprobas elekton de esplora komitato por pri-trakti decidon de la Delegitaro. Post du monatoj la cirkulero № 11 de 7-XII—1908 j. komunikis la rezultojn de la voĉdonado farita. La pli-multo aprobis esploron de la proponoj per speciala komisiono, sed neis rajton de la Delegitaro iel trudi siajn decidojn al la esperantistaro. El la voĉdonantoj—42 anoj de la L. K. estis kontraŭ iuj traktadoj kun la delegitara komisiono. El aliaj 27 voĉdonantoj — 11 subtenis provojn pri interkonsento kun malmultaj ŝanĝoj akceptindaj, 8 — subtenis akcepton de ĉiuj proponitaj ŝanĝoj kaj 8—ne esprimis klaran opinion



(vid. «Oficiala gazeto esperantista», 1908, № 1, p. 5). Tia rezulto sekvis el la inerteco de la amaso kaj el certa malbonvolo kontraŭ reformoj esprimita de multaj gvidantoj esperantistaj. Necesas noti ankaŭ ke la membroj de la Lingva komitato, — grandaparte aŭtoroj de libroj kaj lerniloj esperantaj, — ne vidis iun bezonon por modifi la lingvon, kiun ili tiuokaze devus ree studi kaj lerni.

Provoj de Zamenhof aranĝi iamaniere pacon malsukcesis. Li restis ankoraŭ aŭtoritato konsiderinda por la amaso esperantista. Tamen la sorto de la movado troviĝis jam ne en liaj manoj, sed en la manoj de la novaj ĉefoj, okupintaj lajn poziciojn dank'al certaj negocoj, dank'al eldonado de gazetoj, dank'al partopreno en diversaj institucioj kaj organizoj esperantistaj.

Tiuj ĉefoj ne konsideris utila por si intertrakti cedeme kun la Delegitara komisiono. Tial tiuj ĉefoj subtenis la konservemajn malreformajn tendencojn de la amaso esperantista. Tial okazis la rompo de la traktado, Zamenhof estis devigita nur konfirmi la fakton okazintan. Kaj li tro ŝatis la praktikajn atingajojn de esperanto jam akiritajn, por ke li kuragu pligravigi la skismon per iu sia interveno, ne konforma al deziroj de la plimulto de esperantistoj kaj de la plimulto de faktaj esperanto-ĉefoj.

En la «Cirkulera letero al ĉiuj esperantistoj» la 18-I—1908 Zamenhof skribis, ke la esperantistoj volonte lasus solvi la problemon pri reformoj kaj pri plua evoluo de esperanto al iu granda forto (ekzemple la registaroj de la ĉefaj landoj), sed «se privataj personoj, kiuj havas nek ian aŭtoritaton, nek ian forton, postulas ke ni forlasu la vojon, kiun ni pacience kaj sukcese sekvis en la daŭro de multaj jaroj kaj ni komencu plej danĝerajn rompajn eksperimentojn, — ĉiuj veraj esperantistoj energie protestos». Tiam promeson — akcepti la ŝanĝojn, proponotajn de tre grava aŭtoritato — la ĉefoj esperantistaj povis akcepti sufiĉe facile, des pli ĉar ne estis antaŭvidebla la okazo, kiam tia aŭtoritato povus ekhavi intereson por la problemo internacilingva.

Ne vidante forton en la Delegitaro, kiu male serĉis forton por si ĉe la esperantista amaso, Zamenhof restis kun konservativuloj kaj rompis kun la Delegitaro. Li ne volis lasi «sin entiri en reton» simile al kelkaj scienculoj, subtenantaj senrezerve la individuajn projektojn kaj akcelojn de Couturat.





### Komenco de Ido-movado

Couturat estis absolute konvinkita pri sia praveco. Li certe fidis al tiuj lingvo-formoj, kiujn li elektis. Tio donis al li kuraĝon iniciati, tuj post rompo kun la esperantistoj, fortan movadon por la nova lingvo. Hezitema aŭ tro atendema Beaufront, ĝis majo de 1908 kaŝinta sian aŭtorecon de Ido, estis devigita lin sekvi. Couturat volis komence uzi por la lingvo nova la malnovan nomon de esperanto, jam sufiĉe konatan ĉe la vasta publiko. Tio devis helpi al propagando estonta. Sed Zamenhof rifuzis konsenti doni la nomon de esperanto al la projekto de Ido.

Supozeble, la idistaj gvidantoj estus tion farintaj pro siaj celoj propagandaj eĉ sen konsento de Zamenhof. Ilin retenis nur tio, ke «kelkaj esperantistestroj ne kaŝis sian intencon fari al ni proceson, se ni uzus la nomon Esperanto, sub la preteksto, ke tio domaĝus iliajn komercajn rajtojn», — skribis L. de Beaufront (XII, p. 11).

Tiam la lingvo ricevis nomon de sia anonima aŭtoro — Ido. En februaro de la j. 1908 estis fondita gazeto por la nova lingvo «Progreso». En lokoj diversaj estis fondataj ido-grupoj de ekŝiĝintaj esperantistoj. Pli poste estis fondita internacia «Unio de l'amiki di la lingvo internacia». Estis ankaŭ elektita speciala akademio kun taskoj zorgi pri plua plibonigo de la lingvo kaj pri akcepto de tiuj plujaj reformoj kaj ŝanĝoj, kiuj montriĝis necesaj.

La reformemuloj, aliĝintaj al Ido, tute neis iun kolektivistan ideon pri lingvokreado. Por ili la lingvo internacia ĉiam estis kaj restis nur instrumento por praktikaj internaciaj rilatoj (X, p. 134). Konforme al tiu konsidero la lingvo, ilia opinie, devis kaj povis esti ŝanĝata ĉiam, kiam por tio kolektiĝis sufiĉe da pruvoj teoriaj. Couturat mem laŭte deklaris: «la L. I. de la estonto ne povas esti objekto aŭ frukto de politikaj negocoj aŭ de reciprokaj koncesioj» (vid. «Progreso», V, p. 460). Tial li plej energie batalis por tiuj ideoj kaj formoj, kiujn li konsideris plej bonaj. Li eraris nur konjektante, ke plejan vivo-kapablon al la lingvo artefarita povas doni pleja teoria perfekteco de ĝiaj formoj. Esperanto — laŭ subjektiva teorio — estis eble malpli perfekta ol ido. Tamen esperanto posedis tiun plejan vivo-kapablecon. Tial ĝi daŭris sukcese ekzisti kaj eĉ plua esperanto-ido batalo eĉ venki la novan konkuranton.

Couturat esperis superi la malnovan lingvo-sistemon, entrepreninte vastan kaj bruan propagandon por la nova lingvo. Prezidanto de la Delegitara komisiono tiel abrupte parolinta kun la esperantistaro kaj Zamenhof — prof. Ostwald, ricevinta la Nobel-premion, povis forte



subvencii kaj progresigi ido-movadon. Dank'al tio jam en la j. 1908—1909 aperis multnombraj kaj multampekaj diverslingvaj ido-lerniloj, vortaroj kaj eĉ revuoj. La situacio por ido-disvastiĝo estis en la j. 1908 multoble pli favora ol la situacio por esperanto-disvastiĝo en la j. 1887 kaj eĉ en la j. 1900.

Daŭris brua propagando, provanta sin apogi sur la aŭtoritato de la Delegitaro. El 310 societoj, formintaj la Delegitaron, nur 14 aprobis idon en la j. 1910. La plej gravaj societoj kun pli ol 100.000 membroj, influitaj de la esperantistaj gvidantoj, protestis kaj deklaris, ke ili rajtigis la komitaton nur elekti la plej perfektan lingvon internacian kaj neniel rajtigis ĝin reformi esperanton (X, p. 9).

Ankaŭ esperantistoj daŭre malkonfesis la formalan rajton de la komitato akcepti la lingvon kaj samtempe enkonduki en ĝin iujn reformojn kaj ŝanĝojn.

Sed Couturat pro celoj reklamaj — persistis kaj eĉ anoncis, ke la Delegitaro estis formita de 1250 scienculoj kaj de 310 societoj, tute ne atentante la faritajn aksiĝojn.

Samtempe daŭris personaj atakoj direktitaj kontraŭ la esperantistaj gvidantoj kaj Zamenhof. Lerte verkata idista ĉef-organo «Progreso» eĉiam celis ne tiom varbi adeptojn inter la nemondlingvanoj, kiom tiri al ido jam varbitajn esperantistojn aŭ partianojn de aliaj mondlingvaj sistemoj. Sed nemulte sukcesis Couturat en sia laboro inter esperantistoj. En sia reforma provo Couturat povis apogi sin nur sur malkontentuloj eĉ lingvaj, eĉ organizaj el la esperantista tendaro. Kiel forto socia—tiuj malkontentuloj gravis malmulte. Ankaŭ la plejmultaj individuaj lingvo-projektistoj—ne esperantistoj—restis malkontentaj kun la decidoj de la komitato kaj, anstataŭ subteni la novan lingvon, preferis daŭrigi siajn individuajn lingvo-eksperimentojn.

### Aŭtokrateco persona en la ido movado

En la gazeto «Progreso» kaj aliloke, polemikante kun esperantistoj, Couturat uzis eĉiam plej akrajn esprimojn kaj metodojn, konvenajn por la ordinara sensacia gazetaro bulvarda. Zamenhof estis traktata de li kiel «dupo» kaj la esperantistaro kiel—«amaso da naivuloj, kondukataj de kelkaj friponoj». Sed en la idista organizo mem la fakta aŭtokrateco estis neniel malpli granda ol eĉ esperantistoj. Eble ĝi estis eĉ pli granda (X, p. 127).

La statuto de la «Uniono», celanta unuigon de ĉiuj idistoj, estis ellaborita de la Delegitara komisiono, do fakte de Couturat. Laŭ § 14 kaj § 29 de tiu statuto ne nur simplaj membroj, sed eĉ komitatanoj kaj akademianoj estis eksigeblaj sen komuniko de motivoj. Aŭtokrateco montriĝis ankaŭ en agado de la Akademio. Eĉ la nombro da voĉoj — por aŭ kontraŭ tiu aŭ alia voĉdonata reformo, enkondukota en idon,— eĉesis esti publikigataj, per tiamaniere ĝeni eĉiamajn proponojn pri diversaj rereformoj kaj malreformoj.



Samtempe Couturat kaj Leau starigis por eldonado de lerniloj kaj libroj en ido multe pli severan monopolon, ol la monopolo de la firmao Hachette, kiu devis sin limigi nur je verkaro de Zamenhof. Ĉiuj ideldonaĵoj devis havi propramanan subskribon de Couturat kaj Leau. Ankoraŭ en februaro de la j. 1913 Couturat (v. «Progreso», 1913, p. 48) konsilis «uzi nenian lernolibron, se ĝi ne estas kontrolita de Akademio», do fakte de li.

### La reformado de ido kaj ĝia disfalo

La plua reformado de ido daŭris. Tio ĝenis propagandon kaj donis armilojn al esperantistoj por montri, ke perfekteco absoluta ne estas atingebla. Tio ĝenis vendadon de lernolibroj kaj vortaroj, kiuj baldaŭ malnoviĝis. Pluraj decidoj akademiaj jen por, jen kontraŭ tiu aŭ alia ŝanĝo ofte koncernis la samajn lingvo-formojn pridiskutatajn.



L. de Beaufront (foto de 1925)

Tial la ido-gvidantoj tuj, kiam ili havis post si kelkcenton da adeptoj, devige ekzorgis pri konservo de certa unueco de la lingvo. Rezulte oni proklamis la 15-III—1912 — periodon de stabileco, kiam la Akademio ĉesis voĉdoni pri ŝanĝoj en la lingvo. Tamen parto ŝatinda de la adeptoj malkontentis kun tia stabiligo, kiu ĝenis pluan reformadon kaj rereformadon de la lingvo laŭ iliaj gustoj. B. Kotzin skribis en la j. 1913, ke post ĉeso de reforma eksperimentado «multe da idistoj preferos tute forlasi idon» (X, p. 126). La jaroj sekvontaj kaj la jararo postmilita pravigis tiujn vortojn. Ido, uzata de izolaj teoriuloj kaj reformemuloj, splitiĝis en diversajn dialektojn. Neniu reala forto povis savi idon de tiu splitiĝo kaj disfalo en personecaj individuaj reformoprojektoj.

Vane vokis Couturat al unueco kaj vane li provis konvinki, ke necesas konsenta akcepto de ĉiuj decidoj, farataj de la aŭtoritata Akademio. Jam en la j. 1910 li skribis: «L'unueco de la lingvo povas efektiviĝi nur se la decidoj de l'Akademio estos bonvole akceptataj de tiuj, kiuj preferus aliajn solvojn, cetere tute malsamajn kaj kontraŭajn» (v. «Progreso», 1910, p. 310).



La eminenta dana lingvisto O. Jespersen — membro de la Delegitara komitato kaj vic-prezidanto de ĝia komisiono—skribis, ke «ekzistas ne malmultaj kiuj konfesas la dezirindecon pri komuna helplingvo, sed kiuj ne kredas, ke estas eble realigi la ideon, tial ke oni neniam povos interkonsenti pri la problemo—kiu el la proponitaj lingvoj estas ia plej bona» (XI, p. 29). Tiu koncepto de Jespersen nur montras, ke li neniam konsideris la eblon de simila interkonsento, kiel praktikan rezulton de amasa lingvo-uzo kaj lingvo-kreado. Por li restis nur sola eblo—trovi la plej bonajn lingvoformojn kaj provizi tiujn formojn per aprobo de tiom alta aŭtoritato, ke jam neniu interkonsento estus necesa. Celante tiujn formojn kaj tiun altan aŭtoritaton, Jespersen venis al ido. Celante la samon kaj vidinte nesufiĉon de la Delegitara aŭtoritato, — post dudek jaroj, en la j. 1928 li lasis idon kaj kreis sian propran lingvo-sistemon Novial. Do li bankrotis en siaj serĉadoj, tro personecaj kaj tro individualistaj.

Aliaj reformemuloj, — konstruantaj lingvo-projektojn tute sen atento pri la neceso de iu ĝenerala interkonsento, kaj pli frue ol Jespersen konvinkiĝintaj, ke ne sufiĉa estas la aŭtoritato de la Delegitaro, — lasis idon ankoraŭ pli frue ol Jespersen.

Malsukcesintaj venki esperanton per la malmulte impona por la vasta publiko decido de la Delegitara komitato, ido-ĉefoj en la j. 1911 iniciatis ree novan entreprenon, similan al la Delegitaro. En Bern estis fondita speciala «Kontoro de lingvo internacia» por ree ekzameni la tutan mondlingvan projektaron, kaj por ree elekti la plej perfektan lingvon internacian. Ree anstataŭ apogo sur la amasa laboro oni serĉis apogon ĉe eventualaj aŭtoritatoj. Ankaŭ tiu provo finiĝis senrezulte.

Ido fiaskis en sia provo okupi lokon de esperanto. Malgraŭ ĉiuj siaj—eble bonaj — flankoj ĝi ne povis ne fiaski, pro tio ke ĝi ne logis kaj ne povis logi post si la amason. Estis grandioza kaj perfekte preparita plano por trudi akcepton de ido, kiel lingvo universala helpa. Sed la preparintoj de tiu plano ne kapablis taksu rolon de la amaso esperantista jam ekzistanta, ne kapablis kompreni, ke la «problemo estas ne nur lingva, sed ankaŭ socia».

Analizante la ekskuojn de la epoko de ido-skismo «sine ira et studio», ni konstatas la kialojn de la ido-fiasko kaj trovas la fortecon de esperanto en tio, ke ĝi estis jam ne afero de izolitaj lingvo-amatoroj, sed de certaj amasoj publikaj, utiligantaj siacele tiun lingvon.

Post morto de Couturat en la j. 1914 kaj dum la jaroj militaj—ido ĉesis disvastiĝi. Post la milito estis faritaj provoj restarigi la ido-movadon. Tamen tiuj provoj jam okazis ekster la medio esperantista kaj celis la ĝeneralan publikon kaj ne speciale la esperantistojn. La tempo de konkurado kaj rivalado inter esperantistoj kaj idistoj forpasis. Ido-movado evoluis pluen jam sen speciale intima interligo kun la movado esperantista.

Vere, R. de Saussure ankoraŭ en septembro 1920 prezentis al la kongreso de l'unuiĝo de internaciaj asocioj en Bruselo raporton pri sia nova lingvoprojekto—Esperantido, celante per ĝi reunuiĝon de esperantistoj



kaj idistoj. Tamen tiu provo nek estis, nek povis esti sukcesa. Tia unuiĝo jam tute ne necesis al la esperantistaro, konvinkiĝinta pri uzebleco de sia lingvo. Kaj ankaŭ fortigi iel la movadon tiu unuiĝo ne povis.

### La kontraŭida agado ĉe esperantistoj

Al la aktiva por-ida agitado estis kontraŭmetita ne malpli energia agitado kontraŭ ido.

Inter esperantistoj estis vastigataj plej malbonaj famoj pri Beaufront. La iama dua patro de esperanto nun estis traktata plej malhonorinde. Ĉio malbona estis pri li rakontata. Tiutempe naskiĝis, interalie, neniel pruvitaj onidiroj pri lia aparteno al ordeno de jezuitoj. Kompromitante personon, oni celis kompromiti la konkurantan sistemon, sekurigi siajn poziciojn kaj gardi la popolon esperantistan de iuj bakterioj de idemo.

La kontrakto inter Zamenhof kaj Hachette, ĉe kiu partoprenis Beaufront kiel peranto, estis prezentata kiel pure profitama faro de tiu lasta. Perdo de lia peranta rolo en tiu kontrakto estis klarigata, kiel sola kaŭzo de lia reformemo (vidu «L'Etoile Esperantiste», 1908, № 7, p. 101). Aŭtoro de tiuj lastaj kulpigoj estis—laŭ aserto de Michaux—C. Bourlet mem, kiu sendube povis esti dokumente plej bone informita pri tiuj «misteraj kontraktoj».

Tiamaniere la personaj motivoj estis montrataj kiel kaŭzo de la skismo. Per la samaj profitamaj motivoj oni provis klarigi aliĝon al ido de iu-ajn esperantisto. Kelkfoje tia klarigo estis ĝusta, sed sendube al ido iris ankaŭ homoj sinceraj, ĉu fidantaj aŭtoritatecon de la Delegitaro, ĉu konvinkitaj por idistiĝo de aliaj aŭtoritatuloj ekesperantistaj, ĉu fine persone opiniantaj, ke la ido-reformoj estas plej ĝustaj kaj nepre necesaj.

Sola eraro farita de tiuj sinceraj idistoj estis nur ilia malkomprenemo pri la socia forto, servanta al esperanto-progreso, kaj pri pleja graveco ne de tiu aŭ alia lingvo-formo, sed — de la nombro de la homoj, jam uzantaj kaj praktike evoluigantaj tiun lingvo-formon.

A. Saĥarov en sia rakonto «Superforta ambicio» (Moskvo, 1913) donas bonan skizon de tiuj personaj motivoj, kiuj instigis kelkfoje la personojn, kiuj vidis tiujn aŭ aliajn mankojn en la movado kaj ne komprenis esencon de esperanto-movado, veni al ido. Tamen neniam la esperantistoj ortodoksaj kuraĝis serĉi la samajn ambiciajn kaŭzojn ĉe la defendantoj de la senreforma fundamenta esperanto.

Nature, la idistoj male trovis la ambiciajn motivojn ĉe la gvidantoj de la esperantista fidelularo.

Kaj, propradire, pravis ambaŭ flankoj. Certe la motivoj personaj ĉu konscie, ĉu senkonscie — plej ofte ĉifinis sintenon de ĉiu aktivulo kaj eminentulo ĉe disvolvo de esperanto-ido interbatalo.

Prof. Ĵirkov opinias (III, p. 15), ke la ideo inertaj tavoloj esperantistaj servis, kiel garantio por esperanto ĉe disvolvo de la ido-krizo. Eble li certagrade pravas, sed ankaŭ tiu servo de ideo inertaj tavoloj estis pure inerta. Aktivan kontraŭstaron al ido-skismo ili ne montris.



Ili sekvis la plejmulton kaj la gvidantojn. Tial la reala batalo por esperanto estis gvidata de la oficialaj movado-ĉefoj, estintaj propra-interese kontraŭ la reformoj, kaj la aktivaj esperantistoj, heredintoj de la frutempaj ideoj de Zamenhof. La motivoj, kial la ĉefoj kaj la esperantistoj kontraŭstaris al la reformoj estis malsamaj. Tamen ilia kuna agado formis tiun rezisto-forton, kiun akceptis la inertaj esperantistoj, kiel savilon kontraŭ iuj plujaj reformo-skuloj.

### Reformistoj kaj demokratoj en la esperantistaro

Inter esperantistoj troviĝis tamen certa nombro de personoj, — ĉu akceptantaj, ĉu neakceptantaj la reformojn de la Delegitaro en ilia tuteco, — sed ĉiuokaze konsiderantaj, ke la rifuzo pridiskuti la proponojn de la Delegitaro estis farita ne demokratie kaj ne de aŭtoritatoj plenrajtaj. Inter tiuj personoj troviĝis partianoj de la ortografia reformo, ne diskutita kaj flanken ŝovita dum la 1-a kaj la II-a kongresoj.

La gvidanto de tiuj malkontentuloj iĝis Michaux, jam dum la 1-a kongreso subteninta la ideojn pri internacia demokratia organizo de esperantistoj kaj konjektinta, ke necesas nur elekti internacian esperantistan kvazaŭ-parlamenton por ĉiujn kontentigi kaj por solvi ĉiujn problemojn — ĉu organizajn, ĉu lingvajn. Li estis eĉ certa, ke, agante tiamaniere, oni forprenus de idistoj la eblecon paroli pri aŭtokrateca regado en Esperantujo; oni helpus al repaciĝo kaj al ĉesigo de la skismo.

En grado, kiom tio estis por ili utila, la idistaj gvidantoj subtenis iluziojn de Michaux. Vidinte, ke ne estas eble tiri lin tute al sia flanko ili utiligis Michaux, kiel certan semanton de malkontento inter la esperantistaro.

Tamen Michaux malsukcesis en sia militiro por esperanta demokratio kaj kontraŭ la ĉefoj aŭtokrataj de esperantistoj (vidu ĉap. VII).

Bone kompreninte la karakteron de esperantista oligarkio tiutempa, bone kompreninte la personajn kialojn de certaj agoj flanke de tiu oligarkio — li ne sufiĉe komprenis, ke similaj personaj motivoj antaŭenpuŝis ankaŭ la agamecon de la ĉefoj idistaj.

Al idistaj gvidantoj li veni ne volis. La esencon de la esperanta evoluo li ne komprenis. Esperantan demokration starigi li ne povis. La ĉefoj esperantistaj kaj inter ili Carlo Bourlet faris ĉion por kompromiti la organizinton de la I-a kongreso en okuloj de la esperantista publiko. Ili eĉ aludis lian partoprenon en komploto de Couturat kaj Beaufront (vidu «Lingvo Internacia» 1906 j. № 6 p. 268). Ili provis prezenti lin kiel simplan lukilon en la manoj de Beaufront (vidu «L'Etoile esperantiste», 1908 j. № 7, p. 103).

A. Michaux restis izolita kaj senhelpa. Vere li similis al demokratia Don-Kiĥoto, ĉie renkontata nur kun rideto kaj ĝuanta subtenon de neniu flanko. Ni havas leteron de A. Michaux de 3-I-1930 j., en kiu li esprimas sian miron ke la fundamentistoj esperantaj nuntempaj «kuraĝas kritiki la misteran kaj religian celon de la esperantismo, kiu permesis al niaj eminentuloj mensogi kaj trompi la popolon por triumfi siajn proprajn



interesojn de butiko aŭ de ambicio». Michaux, intime ligita kun la historio de la movado, bone komprenis aŭ divenis la kaŭzojn, kial la gvidantoj de esperanto-movado kontraŭstaris al reformoj kaj al demokratia organizo de la movado, sed li ne komprenis kial la inertan esperantistan popolon povis tiutempe logi nek reformoj, nek iu speciale perfekta demokrata organizo.

### Th. Cart — esprimanto de la idearo esperantista

Esprimanto de la opinio de tiu vasta inertia esperantista popolo estiĝis tiutempe Th. Cart — prezidanto de la Esperantista Presa Societo.



Prof. Cart

Bonsukcese, li ne estis ligita kun iu grava komerca firmao, li ne havis necesajn monrimedojn — por povi fariĝi mecenato de esperanto-movado, por provi krei iun institucion, kiu influus certamaniere la esperanto-movadon. Cart posedis nur viglan labor-deziron. Kaj tiu labordeziro kaŭzis, ke pli ol iu alia gvidanto de la movado li intime ligiĝis kun la sentoj, aspiroj kaj akceloj de la esperantistaro. Eble estus eĉ pli ĝuste diri, ke Cart ne nur estis esprimanto de tiuj sentoj kaj aspiroj, sed li ankaŭ sukcesis ilin ofte formuli, antaŭ ol la popolo esperantista klare ilin eksentis.

La ideoj de Cart estis tiuj pri sociala graveco de la mondlingva problemo, — pri tio, ke malmulte gravas iuj reformoj, ke pleje gravas lingva unueco, kiu siavice

helpas al kreskado de la esperantistaro kaj kiu alproksimigas la momenton, kiam vastaj neesperantistaj amasoj komencos konsideri esperanton kiel seriozan, reale ekzistantan socian faktoron.

Tial Cart opoziciis al la monopolemaj tendencoj de Hachette kaj Bourlet (vidu ĉap. V), kiuj en favora por ili momento estus povintaj trudi al la lingvo siajn ultimatajn postulojn. Tial li kontraŭstaris al la centralizaj ideoj de g-lo Sebert, el la Esperantista Centra Oficejo. Tial li kontraŭbatalis idon.

En la j. 1907 dum Kembriĝa kongreso, kiam la minaco de estonta skismo apenaŭ komencis kolektiĝi sur la ĉielo esperantista, — li laŭte deklaris: «Ni fosu nian sulkon». Li invitis la esperantistojn uzi la lingvon, apliki ĝin kaj ne diskuti pri ĝi. Li invitis la esperantistojn fari tion, kion ili en amaso sia pleje emis. En la «Lingvo Internacia», Th. Cart presigis malgrandajn felietonetojn, ofte alegorio- kaj fablo-similajn, en kiuj li defendis sian vidpunkton pri la libera evoluo de la lingvo, pri la rolo de la nuntempaj esperantistoj, dorlote kreskigantaj kaj vivigantaj tiun lingvon, pri sociala kaj ne nur lingva karaktero de esperanto k. t. p.



Kiam oni nun trafolum as tiujn felietonetojn, represitajn en la j. 197 en libro «Vortoj de Th. Cart», oni intime ligigas kun la modestaj, sed sole eblaj kaj valoraj por tiutempo, ideoj, per kiuj estis konservita por ni esperanto kaj per kiuj estis gardita tiutempe la esperantistaro de disfalo.

El la vortoj de Cart la esperantistaj amasoj ĉerpis pravigon por sia inerta pasiva konduto rilate al la lingvo-reformoj. La esperantistaro lernis pleje ŝati liberecon de la lingvo. Ĝi lernis kompreni, ke la lingvo povas jam ekzisti eĉ sen iu subtenata monopolema firmao. Ĝi kune kun Cart konstatis ke por praktika uzo kaj utiligo de la lingvo tute ne necesas iuj centraj oficejoj. Cart instruis al esperantistoj, ke la lingvaj reformoj gravas malmulte kompare kun la fakto, ke la lingvo artefarita estas uzata kaj uzebla praktike.

Ankaŭ Zamenhof subtenis tiujn ideojn de Cart. Li bone memoris el la sperto de la reforma jaro 1894, kiom diversaj estas la reformo-deziroj kaj kiom malfacile estas ilin kontentigi. Tial, respondante al la postuloj, venintaj el diversaj lokoj tuj post la publikigo de la Delegitaraj decidoj, ke la Lingva Komitato ekagu kaj komencu plibonigi la lingvon, Zamenhof diris eĉ la fino de sia kongresparolado en Dresden en la j. 1908, ke la Lingva Komitato «dependante de neniu mastro— havas plenan rajton kaj plenan povon esplori kaj prezenti al la sankcio de la esperantistaro ĉion, kion ĝi volas. La bulonja Deklaracio malpermesas nur, ke apartaj personoj rompu la lingvon arbitre; ĝi estas kreita nur por gardi la ekstreme necesan kontinuecon en nia lingvo. Se iu el vi trovos ke ni devas fari tion aŭ alian, prezentu vian deziron al la Lingva Komitato. Se tiu Komitato ŝajnos al vi tro konservativa, tiam memoru, ke ĝi ekzistas ne por la plenumado de diversaj personaj kapricoj, sed por la gardado de la interesoj de la tuta esperantistaro; ke pli bone estas, ke la komitato faru tro malmulte, ol ke ĝi facilanime faru ian paŝon, kiu povus malutili al nia tuta afero».

Tia estis la admono, kiun Zamenhof trovis necesa doni al la publiko esperantista, kiel konkludon el la historio kun la projekto de la Delegitaraj reformoj.





## VIII. LA ĜENERALA ESPERANTO-MOVADO POST LA JARO 1908

### Ĝenerala vastiĝo kaj progreso de la lingvo

Post la ekskuoj de la ida krizo, la ĝenerala esperantista movado daŭris evolui pluen. Zamenhof restis kvazaŭ reĝo de la popolo, sed la faktan gvidadon de la movado celis alproprigi Parizo. En tiu urbo — apud la Esperantista Centra Oficejo grupiĝis personoj, celantaj prezenti sin kiel gvidantoj de tiu movado. En tiu urbo la eldona firmao Hachette disvolvis vastegan agitadon kaj propagandon kaj provis, esperante pluan progreson de esperanto-movado, monopoligi eldonadon de plej gravaj verkoj esperantaj. Anstataŭ «Kolekto aprobita de Zamenhof» komencis aperi «Kolekto de La Revuo» — la serioza gazeto eldonata de Hachette. Ĉe Hachette monopole daŭris aperi novaj klasikaj tradukoj de Zamenhof. Dum la ĉiujaraj kongresoj internaciaj Hachette organizis specialajn konkursojn de «La Revuo», dank'al kiu en manojn de Hachette povis trafi plej valoraj literaturaĵoj esperantaj. Hachette eldonis ampleksajn vortarojn de Kabe (K. Bein), de Verax kaj de aliaj lingvaj eminentuloj. Tiamaniere la komerca firmao scipovis finance ligi la gvidantojn de la movado al si. Eĉ emaj al sendependeco partoprenantoj de la Esperantista Presa Societo — P. Fruictier, P. Lengyel estis tiamaniere, per eldonoj de iliaj verkoj, kvazaŭ tirataj al Hachette.

La demokrata organizo de esperantistaro malmulte gajnis de tia situacio, sed sendube profitis la lingvo, provizata per fundamentaj libroj kaj, kio pleje gravis, per vortaroj ĉu ĝeneralaj, ĉu kelkaj jam specialaj — fakaj.

La tutmonda esperantistaro al kutimis konsideri Parizon, kiel sian centron. Ankaŭ la vasta publiko, speciale la franca kaj la pariza, komencis iom post iom konsideri esperanton, kiel movadon atentindan kaj ĉiuokaze havantan post si certan financan bazon. Ankaŭ ekster Francio esperanto faris certajn progresojn. Tiuj progresoj speciale montriĝis en rapida ĉiulanda kresko de la esperantista societaro kaj gruparo, kaj en plinombriĝo de la nomaro de eldonitaj verkoj esperantaj.

Kelkloke aperis pure esperantaj libro-eldonejoj kaj vendejoj. Antaŭ la mondmilito jam en ĉiuj eŭropaj ĉefurboj ekzistis similaj esperantistaj librejoj. Kelkloke aliaj, ne esperantistaj firmaoj sekvis ekzemplon de Hachette kaj komencis eldoni kaj disvastigi esperantaĵojn.

Ĉio-ĉi lasis senduban impreson pri daŭra kresko kaj fortikiĝo de la anaro esperantista.



## Konsisto de la esperantistaro

Tiu esperantistaro ne estis plu unuforma, kiel tio eblis en la komenca periodo. Hector Hodler ĝuste traktis en la decembra № de gazeto «Esperanto» de la j. 1913 la diversspececon de homoj aliĝantaj al esperantomovado, kiun partoprenis liavorte samtempe: «elementoj progresaj kaj idealistaj, homoj kun utopia mentaleco, stranguloj, maniuloj kaj aliflanke malkontentuloj, ambiciuloj aŭ simple amatoroj» (XIV, p. 62).

Daŭris veni al la lingvo idealistoj kaj idealismanoj de pura speco. Multaj, amatore ekinteresiĝintaj pri la lingvo, poste estis kaptitaj per la «ideo interna». Tiu unua parto de esperantistoj estis sendube plej fortika kaj plej fidela por la lingvo. Tiuj personoj estis plej konstantaj legantoj, kunlaborantoj kaj abonantoj de la esperanto-gazetaro. Ili estis aĉetantoj de la libroj. Ili estis la ĉefaj konservantoj de la lingvo.

Al esperanto venis jam ankaŭ aliaj personoj, celantaj tujan aŭ eventuale estontan bonuzon aŭ profiton peresperantan. Tiuj personoj, trovinte en esperanto ion, kio ligis ilin al la lingvo, estis lojalaj, inertaj, kontraŭreformemaj. Ili formis la rezistan povon de la esperantista popolo. Tiu dua parto de esperantistoj enhavis veran miksaĵon, respegulantan ĉiujn socio-tavolojn kaj tendencojn. Al ĝi apartenis filatelistoj, korespondantoj, utiligantoj de esperanto por propagando de iuj aliaj ideoj, entreprenistoj diverspecaj, eldonantoj de certa parto de ĉiujare naskiĝantaj kaj malaperantaj esperanto-gazetoj k. t. p. Inter tiuj personoj troviĝis kandidatoj por organizi novajn societojn, ligojn, asociojn—ĉu naciajn, ĉu internaciajn. Ili ofte emis al bruaj titoloj kaj al brua agado. Ili ofte ellaboradis plej grandiozajn projektojn. Ili luktis inter si por gvidoroloj.

Se personoj de tiu dua kategorio komencis disreviĝi en esperanto, se ne estis por ili ligiloj ĉu ekonomiaj, ĉu moralaj, retenantaj ilin ĉe la lingvo, tiuokaze ili aŭ iris for el la movado, aŭ ekokupis sin pri rezonado, reformado, lingva eksperimentado k. t. p. Por la praktika esperantomovado ili perdiĝis. Bonan ekzemplon tiurilatan prezentas R. de Saussure, ne sukcesinta en praktika uzigo de esperanto inter la scienculoj, malsukcesinta en daŭrigo de la gazeto «Internacia scienca revuo», kaj fine sin okupinta nur pri ellaboro de sennombraj diversaj reformo-projektoj.

Ĉiuokaze la nombro de la restantoj ĉiam superis la nombron de la forirantoj. La esperantistaro kreskis.

## La metodoj de propagando

La esperantistaj gvidantoj daŭrigis agitadon kaj varbadon inter la eminentuloj. Ĉiuatingo tiurilata estis vaste reklamata en la tuta mondo.

Kiam la fabrikanto Michelin en la j. 1912 donacis kelkmilojn da frankoj por premii la bonsukcesajn esperanto-abiturientojn—li sendube ĝuis pli vastan reklamon, ol li tion estus atinginta per la sama sumo, pagante reklamanoncojn en gazetoj.



Ĉiu kongreso esperantista celis esti laŭpove brila kaj aŭtoritata per la nomoj de altaj protektantoj kaj subtenantoj. Ministroj, korteganoj komencis esti registrataj kiel honorkomitatoj de la kongresoj. Samcele estis invitataj al la kongresoj reprezentantoj de diversaj ŝtatoj. Nombro de tiuj reprezentantoj kreskis de jaro al jaro, eĉ se rezultis el tio nenio speciale favora por esperanto en koncernaj landoj. Oni multe fanfaronis pri ĉiu saluta kaj danka telegramo de koneerna reĝo, en kies lando okazadis la vica kongreso. La anglan, saksan, kaj hispanan reĝojn, la rumanan reĝinon oni konsideris—preskaŭ esperantistoj pro kelkaj vortoj bondeziraj al la kongresoj.

Al esperanto estis logataj diversaj potencaj internaciaj institucioj. Estis aranĝataj favoraj voĉdonoj por esperanto dum diversaj kongresoj internaciaj. La internacia oficejo de internaciaj societoj en Bruselo favoris esperanton. Esperantista Centra Oficejo, sub gvido de g-lo Sebert entreprenis eldonadon de la esperanta bibliografia sliparo, aranĝita laŭ la decimala sistemo.

Ĉiuj-ĉi faroj praktike ne multe grandigis aplikon, uzon kaj vastigon de esperanto, sed ĉiuj ĉi faroj servis al plia diskonigo de la mondlingva ideo, al tio, ke la kompreno pri la lingvo artefarita komencu jam esti trankvile akceptata, tolerata.

### Utiligo de esperanto por celoj praktikaj

Daŭranta kresko de esperantistaro, ĉiam kreskanta diskonigo de la lingvo en la mondo—kaŭzis, ke esperanto iom post iom komencis esti aplikata ankaŭ praktikacele de diversaj aplikaj institucioj. Multiĝis la eldonoj de gvidlibroj kaj gvidfolioj. Negocaj, reklamaj kaj turistaj firmaoj komencis uzi esperanton, presi esperant-lingvajn reklamilojn, prospektojn k. t. p.

En la komenco oni uzis tiamaniere la lingvon nur por diskonigi iun aferon inter la esperantistaro, tiri senpere nur la esperantistojn al tiu aŭ alia negoĉo. Pli malfrue esperanto jam estis bonuzata, kiel perilo, kiel rimedo por atingi per esperanto iujn landojn kaj popolojn, prepari por kiuj ilialingvaj eldonaĵojn aŭ priservi kiujn ilialingve estis neeble.

Aperis provoj eldoni esperantlingve fakajn revuojn. Certe tio estis nur unuaj eksperimentaj paŝoj sen iu grava praktika rezulto. Kelkfoje oni jam provis per esperanto servi al bezonoj de monda merkato, al certa kategorio de negocistoj kaj homoj aferemaj. Tiu praktika ekuzo de esperanto por celoj aplikaj—jam ne esperantistaj—kreskis de jaro al jaro ĝis la komenco de mondmilito mem.

### La regado en Esperantujo

Kresko de la esperantistaro, malsameco en ĝia konsisto, vastigo de esperanto-uzo igis ĉiam pli komplika la problemon pri konservo de ĝia gvidado en la manoj de la centraj personoj, troviĝantaj en Parizo.



Dube estus sukcesintaj la provoj konservi tiun gvidadon sensanga, se la ĉiujaraj kongresoj esperantistaj fariĝus aŭtoritataj plenrajtaj reprezentantoj de la esperantista popolo. Cetere por tion atingi mankis ankoraŭ forto al la movado. La kongresojn ja vizitadis ordinare—ĉu personoj monhavaj, ĉu esperantistoj, loĝantaj proksime al la kongresa urbo. Sendi al la kongresoj rajtigitajn delegitojn kaj pagi iliajn elspezojn lokaj grupoj esperantistaj ne povis.

Do restis sole ebla influi la esperantistaron per la samaj metodoj aŭtokrataj, kiuj estis praktikataj dum la periodo antaŭa. Oni zorgis per belaj paroloj, per konstantaj alvokoj pri la nebula, senenhava «sankta afero» k. t. p. — teni la esperantistaron en tia stato, ke ĝi simulu energie batalantan armeon, kiu tute ne demandas siajn estrojn, kiel kaj kiacele ili bonuzas ĝian energion kaj entuziasmon. La popolo devis agiti kaj kreski. Al la gvidantoj ĝi devis lasi la zorgon pri sia priservo per la bezonaj institucioj kaj bezonaj eldonaĵoj. La popolo estis gardato de iuj reformaj ideoj, ĉar tio ne konformis al intereso de tiuj gvidantoj. Cetere, eĉ sen tiuj zorgoj—la esperantistaro en sia amaso, uzante la lingvon, malplejgrade interesiĝis pri iuj reformoj.

Por logi la esperantistojn, por ebriigi ilin per konstantaj sukcesoj eĉ la aŭtoritatoj — oni klopodis aranĝi brilajn festenojn, kunsidojn, diservojn, florldojn k. t. p. Samacele oni laŭpove kreskigis la kulton de la Majstro. Jam dum la III-a Universala kongreso en Kembriĝo oni aranĝis al Zamenhof preskaŭ reĝan akcepton. Dum la VII-a kongreso en Antverpeno oni prezentis eĉ scenon, kiam de la kaleŝo de Zamenhof estis forjungitaj la ĉevaloj kaj la kaleŝon ektiris entuziasmigita esperantista popolo.

Moŝta Zamenhof sola restis ne entuziasmigita — same pro la eminentuloj, subtenantaj esperanton, same pro la eminentuleco al li atribuita. Li sentis nur ĝenon kaj multfoje pri tio parolis kaj skribis. Li eĉ petis eviti la titolon «Majstro», kiu estis por li «persono tre malagraba». Li sentis, ke malgraŭ konstantaj sukcesoj de la lingvo—ne ĉio estas bona en esperantujo. Sed ligita al Hachette, al C. Bourlet kaj g-lo Sebert, li sentis sin senpova ion fari kontraŭ volo de tiuj personoj, kiuj malgraŭ ĉio tiel bonsukcese prezentadis la lingvon al la kapitalista socio.

### La opozicioj al la aŭtokrata regado

Estis en esperantujo du fluoj opoziciantaj. La unua — kies idea reprezentanto estis prof. Cart — respegulis la organizan inertecon de la esperantistaro (vidu ĉap. VII). La dua — kies idea gvidanto estis kaj restis de la I-a kongreso A. Michaux — batalis por adaptigo de la ĝenerala esperantoorganizo al certa demokratia parlamentisma principaro.

La unua fluo rezistis kaj ignoris ĉiujn provojn organizi la esperantistaron. Ĝi konsideris tiajn provojn nenecesaj por evoluo de la lingvo kaj ĝi timis, ke simila organizo povus ĉu doni formalajn rajtojn al la



Centra Oficejo kaj al la jam ekzistantaj monopolemuloj, ĉu ĝi entute metus la tutan aferon en manojn de apartaj personoj. Tiu opozicia fluo estis plej forta kaj ĝi pleje malhelpis al la ekzistantaj institucioj formale akiri leĝon rajton super esperanto kaj super esperantistoj. Ĝi ignoris tiujn instituciojn, kaj tiu ignoraĵo estis la plej efika batalimeĵo.

La dua fluc—male—emis trograndaĵi la rolon de tiuj institucioj. Ĝi vidis kaŭzon de ĉiuj malbonoj, okazantaj en esperantujo, ĝuste en tio, ke esperantujon gvidas ne iuj demokratie elektitaj organoj, sed institucioj organizitaj private, sen partopreno de la esperantistaro.

Ĝis la j. 1911 kaj la okazinta tiujare kongreso en Antwerpen — A. Michaux daŭris batali por siaj demokratiaj ideoj. Li daŭre militis—kontraŭ la oligarkiaj tenencoj de Bourlet, Sebert kaj aliaj, esperante, ke demokratie elektita Centra Komitato forigus ĉiujn organizajn malbonojn. Laŭ iniciato de A. Michaux la Bulonja esperantista grupo en la j. 1911 venis al la Antverpena kongreso kun propono krei centran organizon esperantistan. Ankaŭ Zamenhof subtenis la saman ideon.

Formale ĝis la VII-a Antverpena kongreso la kongresdecidoj ne estis devigaj por la esperantistaro kaj por iuj ĝiaj institucioj. Por tiu kongreso estis entreprenita nova aranĝo, kiam la kongreson partoprenis specialaj rajtigataj delegitoj, elektitaj de diverslokaj grupoj. Tiu aranĝo signifis certan venkon por la ideoj de Michaux kaj Zamenhof. Eble ĉe akcepto de tiu aranĝo ludis rolon ankaŭ la konsidero, ke tiu ŝajna demokratiigo povus kontentigi la malkontentulojn opoziciajn.

Starigo de instituto de rajtigita delegitaro devis ŝanĝi la senjuran rolon de la kongresoj, sed fakte nenio estis ŝanĝita. Neniu Centra Komitato estis elektita.

La kaŭzoj restis la samaj, kiel en la j. 1905: unuparte ne eblis demokratie centriĝi la gvidadon de movaĵo monampleksa kaj samtempe malriĉa je homoj kaj mono; duaparte vere demokratian gvidadon kontraŭstaris kelkaj el la gvidantoj kaj organizantoj de la movaĵo. La gvidantoj emis bonuzi la instituton de la rajtigataj delegitoj por fortigi siajn poziciojn, sed neniel por meti siajn poziciojn sub ia vere demokrata kontrolo.

Do la demando pri starigo de centra organizo estis fuŝita laŭ la sama maniero kiel en la j. 1905. C. Bourlet proponis elekti specialan komisionon, kiu neniam venis al iuj finkonkludoj pri tiu temo.

Michaux malsukcesis en sia provo. Li estis tro malmulte kompreninta la verajn movfortojn de esperanto-movaĵo. Pli lertaj ol li—liaj kontraŭuloj komprenis la inertan kolektivisman lingvo-senton, antaŭenpuŝanta la esperanto-movadon kaj tute malatentanta la problemon organizan.

Tiam dum sia kunveno de 8-IX—1911 la Bulonja grupo deklaris, ke ĝi malakceptas aŭtokratan regadon de senrajtaj estroj, ke ĝi protestas kontraŭ fuŝado de la problemo dum la kongreskunsido kaj ke, rezulte, ĝi ĉesigas sian ekziston. Per la sama decido la grupo proponis al siaj eksaj membroj aliĝi al UEA, la sola esperanta organizo, «demokrate kaj laŭrajte administrata».



Tiun deklaron subskribis A. Michaux, sed baldaŭ li mem foriris ne nur de la movado organizita esperantista, sed ankaŭ de la lingvo esperanto. Ne akceptante idon kaj vidante siaopinie mankojn en esperanto, li preparis propran projekton de la lingvo Romanal, nek pli bona, nek pli malbona ol multnombraj aliaj individuaj lingvo-projektoj.

La rolo de A. Michaux estis per tio en esperantujo finludita. Restis la sama inertia amaso esperantista kaj la samaj senrajtaj ĉefoj, efektivigantaj sian rolon nur dank'al inercio kaj dank'al tiuj financaj rimedoj, per kiuj ili disponis.


Dum la VIII-a kongreso Universala en Krakow — laŭ propono de C. Bourlet estis decidite, ke de post la 1-I—1913 j. la Centra Oficejo ne plu estu subtenata per monoferoj de privataj personoj (g-lo Sebert), sed ke la esperantistaro ĝin subtenu kaj administru per speciale elektota Administra Komitato. Estis sola demokratia rezulto de la «rajtigita delegitaro». Tamen ankaŭ tiu decido neniam estis plene efektivigita ĉar neniam la esperantistaj organizoj sukcesis doni necesan sumon por plene garantii ekziston de la Oficejo.

### Zamenhofa foriro el la oficiala esperanto-movado

Lastan fojon provis Zamenhof konduki esperantan movadon laŭ vojo demokrate publika, ne dependa de iu privata influo. Dum la Antverpena kongreso li subtenis ideon pri leĝdonantaj ĉiujaraj kongresoj de rajtigitaj grupdelegitoj. Li esperis, ke tiamaniere ĉesos interlukto de aŭtoritatuloj diversaj en la esperantistaro: «Diversaj institucioj, kiujn ni kreis, ĉesos havi karakteron de ia privataĵo, kiun neniu subtenas kaj kontraŭe multaj atakas... Estas necese, ke ili povu diri al esperantistoj, se ni estas bonaj, respektu kaj subtenu nin, se ni estas malbonaj reorganizu aŭ forigu nin. Se el niaj laboroj rezultos enkonduko de preciza ordo en nian aferon, tiam la Antverpena kongreso estos unu el la plej gravaj».

Se eĉ formale tiuj ideoj de Zamenhof estis dum la kongreso kvazaŭ akceptitaj, tamen fakte nenio ŝanĝiĝis. Restis same inertaj por tiu problemo la amasoj kaj la gvidantoj, kvankam la motivoj estis por ambau partioj tute malsamaj.

Ankoraŭ pli ol en tiu provo—malsukcesis Zamenhof en siaj provoj ricevi rajton paroli al esperantistoj pri siaj etike-moralaj ideoj. La



L. Zamenhof (foto de 1906 j.)



gvidantoj de la movado kontraŭstaris ĉion, kio povus ligi esperanton kun iu klare fiksita socia ideo. Speciale ili kontraŭstaris al ĉiuj provoj de Zamenhof paroli pri iu ideismo aŭ agi por ĝi. Tiel agante ili argumentis per la konsidero, ke lia persono estas tro ligita kun la movado.

Eble ankaŭ ĝuste tial, por ricevi klarajn elmontrojn de la volo de la esperantistaro, Zamenhof en la jaro 1911 subtenis la ideon pri libera elekto de gvidantoj pli energie, ol li tion faris en la j. 1905.

Ĉiam prokrastata enkonduko de demokratia gvidado ĉagrenis d-ron Zamenhof, kiu vidis, ke, malgraŭ ĉiuj elmontroj de persona estimo,— multaj el la gvidantoj tute malatentas liajn organizajn ideojn. Fine dum la VIII-a kongreso en Krakow Zamenhof decidis rezigni iun ajn oficialan postenon en la esperanto-movado. Per tio li akiris personan liberecon kaj samtempe prenis de si respondecon pri la okazonto en la esperantistaro. Li diris dum tiu sia lasta kongres-parolado: «Estas necese, ke la mondo sciigu, ke esperanto povas havi aŭ ne havi siajn libere elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan majstron». Tiuj paroloj, malgraŭ sia retenemo, sonis kiel riproĉo direktita al la foresto de laŭrajta demokratia sistemo en la internacia organizo esperantista.

### Laŭlanda organizo kaj movado

Se malsukcesis starigo de iu laŭrajta internacia organizo de esperantistoj, des pli sukcesis ilia laŭlanda organizo. Baldaŭ en ĉiuj preskaŭ landoj ekzistis landaj esperanto-asocioj, unuigintaj apartajn grupojn izolitajn. En kelkaj landoj malbonŝance aperis eĉ po du konkurantaj organizoj, rivalintaj inter si—ĉefe pro konsideroj personaj. En diversaj landoj oni komencis kunvoki naciajn aŭ landajn kongresojn esperantistajn. Tiuj kongresoj ofte estris kaj difinis pluan organizan evoluon de la landaj societoj.

Tamen tiuj elementoj de demokratia sistemo ne ŝanĝis la ĝeneralan karakteron de la movado, de ĝia enhavo, de ĝiaj propagando- kaj organizo-metodoj. Tiuj landaj organizoj, kreskintaj en epoko, kiam en esperantujo pleje influis la aŭtokratemaj kapitalist-sociaj tendencoj kaj metodoj,— agis per la samaj metodoj, kiel la Centraj institucioj esperantistaj en Parizo. Same estis ĉie substrekata absoluta neŭtraleco de la esperanto-movado. Same oni komencis eviti la parolojn pri iuj klare difinitaj «internaj ideoj». Same oni uzis la nebulan terminon pri «interna ideo» por influi la esperantistajn amasojn kaj por subtenadi en ili la por-lingvan entuziasmon. Same oni klopodis tiri aŭtoritatulojn al si kaj bonuzi iliajn parolojn favorajn, eĉ en la okazoj kiam krom paroloj nenio por esperanto de tiuj aŭtoritatuloj estis farata. Resume— en pli aŭ malpli granda skalo ripetigis en ĉiuj landoj la sama historio de poioma esperanto-progreso, kiel ĝi evoluis en Francio.

Dum la kreskado de la movado al ĝi pli ofte ol antaŭe venis diversaj aventuristoj, celantaj utiligon de esperanto por siaj ambiciaj aŭ poŝaj celoj. Similaj personoj havis ŝancojn kelkloke kaj por kelka tempo eĉ estri kaj direkti la tutan movadon.



Tiel, ekzemple, en la j. 1909 venis al esperanto rusa gvardia kapitano A. Postnikov, baldaŭ fondinta Tutruslandan Ligon esperantistan, kaj provinta krei bruon propagandon. En la j. 1910 li aldone kreis novan internacian asocion «Universala Ligo». Ambaŭ vegetantajn Ligojn li subtenis finance kaj ĉefe zorgis pri akiro de favoro por de li gvidata esperanto-movado ĉe la ŝtataj aŭtoritatoj. Li sukcesis iĝi reprezentanto de la Rusia ministro por komerco ĉe la VI-a kongreso Universala en Washington. Sed jam en la j. 1911 li estis arestita, kiel kulpinta je ŝtatperfido kaj spionado kaj kondamnita al multjara malliberejo. Kvankam temis nur pri mirubla ricevo de Aŭstria agento kaj kvankam tiun sumon superis la subvencio, donita de Postnikov al la Ligo Tutruslanda, tamen, nature, ne per tiaj rimedoj povis esti progresigata esperanto. Dank'al renverso de carismo en la j. 1917 Postnikov estis liberigita el la malliberejo. Li tuje rekomencis sian agadon en la tiutempe ŝvelanta socia kaoso. Li proklamis pluan ekziston de sia Universala Ligo, delonge jam mortinta. Li alinomis ĝin «Universala Socialista Ligo» kun tre nebula politika programo. La Universala Ligo multe bruas kaj eĉ kuragis prezenti siajn kandidatojn por la Tutrusia Konstitucianta Kongreso. La reala nombro de ĝia membraro estis tamen apenaŭ kelkcenta. Post la Oktobra revolucio 1917, Postnikov proklamis, ke lia Ligo solidariĝas kun bolŝevikoj. Sed post kelkaj jaroj li estis ree kulpigita je ŝtatperfido de Sovetio kaj kondamnita.

Similajn aventuristojn ni povas trovi en preskaŭ ĉiuj esperanto-organizoj. En Ĉeĥo-Slovakio famigis sin tiurilate Kühnl, kontraŭbatalinta la malnovan Boheman Esperanto Union, kaj kaŭzinta grandan skandalon dum la II-a Tutaŭstria esperanto-kongreso en la j. 1911 en Praha.

En Germanio famiĝis Fr. Stephan, kreinta novan organizon, paralelan kaj konkurantan al la malnova Germana Esperanto-Asocio. Post fiasko de siaj provoj kaj post sia veno antaŭ tribunalon pro kelkaj faritaj trompoj Fr. Stephan lasis esperanton kaj sub pseŭdonomo Stelzner kreis novan lingvon, kiun li sensukcese provis propagandi.

Troviĝis inter esperantistoj ankoraŭ pli senskrupulaj praktikuloj kaj friponoj. Ekzemple, la elektita direktanto de Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio d-ro Thalwitzer, enkasiginte en la j. 1911 abonpagojn por «Internacia Medicina Revuo», ĉesigis ĝian aperon post la unuaj du numeroj. Al la samaj faktoj rilatas la historio pri fondo de Parkurbo Esperanta, permesinta al kelkiu lerte ekspluati bonfidon de diversaj esperantistoj.

Necesas entute konstati, ke, konforme al la epoko kaj la socio, ekzistas en la esperanto-propagando certa aventurismo. Apud klarvidaj kaj praktike konsekvencaj propagandistoj kaj organizantoj — similaj al Beaufront (vidu ĉ. III), — la socio kapitalisma ĉiam enhavas premiojn por ke aperu aventuremuloj, esperantaj hazardon kaj bonŝancon kaj entreprenantaj iun faron tute sen atento de la normalaj ebloj. Kiel modelon de similaj aventuremuloj ni citu eks-redaktoron de «La verda standardo» A. Marich el Budapeŝto. Sendube, dekon da revuoj li fondis diverstempe, kaj el tiuj — kelkaj aperis nur po unu numero. Same sen-



zorge li malatentis la plendojn de abonintoj kaj la plendojn pri malbonuzo de sumoj pli grandaj, ricevataj subvencie por plua eldonado de la gazeto. P. Robiček, kiu estis devigita post Marich daŭrigi eldonadon de «La Verda Standardo», rakontis al ni pri la eminenta metodo, uzita de Marich por vasta diskonigo de esperanto. Li venadis al urboj hungariaj, anoncis kursojn, registris kursanojn, akceptis pagon kaj... gvidis la kurson, ĝis kiam sufiĉis al li la mono ricevita. Tiam (ordinare post 2—3 semajnoj) Marich veturis for al nova urbo. Sama afero ripetigis poste en nova urbo. Tiamaniere esperanto estis plantita tra la tuta Hungario. Multaj sciis pri similaj agoj kaj taktiko de Marich. Sed malmultaj trovis necesa riproĉi lin. Ankoraŭ en № 4 de la j. 1930 de gazeto «Hungara Heroldo» (p. 3) ni trovas konstaton, ke A. Marich «meritus jam dumvive monumenton» pro lia propaganda agado.

Marich estis tamen leono inter la aventuremuloj esperantaj. Pli malgrandajn lupojn kaj vulpojn enhavis la esperantistaro ĉiulanda.

### La gazetaro esperantista

Apud la oficialaj centraj institucioj en Parizo kaj la senideaĵaj naciaj propagandaj societoj, plej ofte regitaj de la samaj «oficiale inspiritaj» tendencoj, — kreskis la gazetaro esperantista.

Kelkfoje la gazetoj naciaj estis eldonataj de la naciaj societoj. Kelkfoje ili estis propraĵo de sendependaj eldonantoj kaj redaktoroj. En la lastaj okazoj — la gazetoj sentis sin pli liberaj, ne estis ĝenataj per iuj kadroj oficialaj, kaj pli respegulis la interesojn, akcelojn de la progresema, ideologie pli riĉa parto de esperantistoj. Iliaj redaktoroj kelkfoje havis bonajn ideojn kaj bone tiujn defendis.

Se ni intencas paroli pri evoluo de la lingvo dum tiu epoko, nepre necesas atenti pri la rolo de la gazetaro esperantista, kiu per siaj interne-esperantistaj polemikoj, — ofte spritaj, krudaj, malicaj — pleje vivigis la lingvon kaj elprovis ĝin kiel perfektan diskutilon. Tiuj polemikoj — ĉu defendantaj, ĉu kritikantaj la sintenon de la centraj institucioj, ĉu aprobantaj, ĉu malaprobantaj tiujn aŭ aliajn faktojn el la vivo esperantista — anstataŭis per si la inspirajn ideo-plenajn gazet-artikolojn de la komenca periodo. Samtempe ili pleje pruvis, ke la lingvo jam taŭgas ne nur por predikado kaj esprimado de certaj ideoj, sed ankaŭ por publika uzado kaj diskutado. Tiuj polemikoj, eĉ ne kreskigante la lingvo-formojn kaj ilian riĉecon, tamen kaŭzis kiel sian sekvon, — plian rafinitecon de la lingvo kaj de ĝia esprimo-povo.

### La lingvo-evoluo

Ĉiu lingvo kreskas en ĉiu periodo konforme al la bezonoj de personoj ĝin uzantaj, konforme al la ideologia kaj mensa riĉeco de tiuj personoj. Dum la komenca periodo tiun lingvo-kreskon difinis certa ideologia bezonateco, kiun sentis la unuaj esperantistoj kaj kiun ili kontentigis, uzante certajn formojn de la nova lingvo. Dum tiu periodo la lingvo esperanto rimarkinde kreskis kaj pliriĉiĝis.



Kiam esperanton komencis apliki kaj uzi la eŭropa burĝe-kapitalista socio, tiu lasta havis neniun konkretan idean bezonon por la lingvo internacia. En plej bona okazo esperanto estis konsiderata de ĝi, kiel certagrada varo. Ankaŭ la sfero de la lingvo-apliko dum tiu tempo vastiĝis ne multe. Tiurilate la lingvo restis ĉe malnovaj siaj pozicioj. La tuta tiu periodo malmulte servis al plua pliriĉigo de la lingvo, eĉ malgraŭ tio, ke aperis tiaj novaj lingvo-majstroj, kiel Kabe (d-ro K. Bein), nomita dum la konkurso de «La Revuo» — la plej bona esperanta stilisto. La burĝe-socia medio donis tre malmultajn personojn, kiuj sin ligis intime kaj senrevene kun la lingvo. Tiel, ekzemple, ankaŭ K. Bein lasis esperanton kaj laŭ niaj scioj eĉ preskaŭ tute forĝesis ĝin.

Same, kiel la gazetara enhavo — servis al plua fleksebligo de la lingvo, al plia ĝia rafiniteco, same la esperanto-verkistoj tiutempaj helpis al certa stila prilaboro de la lingvo-formoj kaj la lingvo-enhavo, akirita dum la antaŭirinta periodo.

Lingvo esperanto fakte daŭris ekzisti per tiuj fortoj internaj, kiuj estis al ĝi oferitaj dum la komenca periodo de la unuaj ideismaj esperantistoj. Per la samaj fortoj estis kune tenata la esperantistaro. Nur tiujn fortojn povis utiligi tiutempa esperanta gvidantaro, por ke daŭru ekzisti la lingvo kaj por ke daŭru ekzisti la esperantistaro.

Sed ĉiu periodo faras sian servon al la lingvo. Kaj la periodo pri-skribata instruis esperantistojn, kiamaniere plej bone, plej trafe uzi tiun lingvo-materialon, kiu estis heredita de la periodo antaŭirinta. Esperanto dum tiu periodo montriĝis jam kiel lingvo uzebla ne nur de apartaj idealismanoj, sed kiel lingvo plene taŭga por kontentige esprimi la ideojn de koncernaj verkoj diverslingvaj kaj diversaŭtoraj, kiel lingvo plene taŭga por vasta publika uzado, diskutado kaj argumentado. Fakte jam antaŭ la mondmilito esperanto povis esti konsiderata, kiel venkinta sur la konkur-areno de la lingvo internacia artefarita. Ĝi estis ne nur uzebla. Ĝi fariĝis jam uzata. Neniel oni povis paroli, ke esperanto jam plene almilitis ĉion, kio necesas por ke esperanto fariĝu universala internacia lingvo. Tamen prave rimarkas prof. Ĵirkov, ke unu el la plej gravaj venkoj tiurilate jam estis atingita: «tiu venko konsistas en tio, ke la aperon de esperanto postsekvis aliaj projektoj internacilingvaj, pli bonaj laŭ vidpunkto de detalaĵoj kaj la sistemeca lingvo-karaktero; al tiuj projektoj aliĝis multaj el la gvidantoj de la esperantistaro — kaj tamen esperanto konservis sian pozicion kaj ne lasis la venkan pozicion al iu alia» (III, p. 7).

Tiu grava venko bonsukcesis nur tial, ke apud la lingvoj artefaritaj uzeblaj — esperanto jam estis lingvo uzata. Tiu fakto solvis la problemon. Tiu fakto konservis la plejmulton de esperantistoj por esperanto. Kaj tiu fakto estiĝis plej bona argumento por esperanto ĉe la vasta publiko.

### Falo de aŭtokrata regado

La lingvo pliformiĝinta jam estis bone provizita por daŭrigi sian venkan antaŭenmarŝadon. Kaj tiam venis la tempo, kiam falis la kate-



noj organizaj, aŭtokrataj, monopolemaj kaj ideaj—kaŭzitaj de plena senideeco, la katenoj—per kiuj la burĝe-kapitalista periodo de esperanto-evoluo estis ĉirkaŭiginta la esperantistaron. Tiu falo estis natura sekvo de la ĝenerala krizo en la socio kapitalista, kiu sekvis la mondmiliton.

Restis la gvidantoj de centraj institucioj esperantistaj en Parizo, sed mankis al ili la gvidata popolo. La idealistaj esperantistoj ĉiulandaj havis eblon praktike sperti la realan senenhavon de la nebula, nedifinita interna ideo. En ĉiu lando inter esperantistoj la burĝaj gvidantoj faris la saman ŝovinistan pornacian propagandon, tute kontraŭan al la idearo de Zamenhof.

Hachette trovis pli profita por si eldoni patriotismajn verkojn francalingve, ol daŭrigi la eldonadon de verkoj esperantaj. Esperantista Centra Oficejo neniel povis gvidi la tutmondan esperantistaron. Ĉesis periodo de Pariza superregado en esperantujo. La esperantistaro reakiris sian organizan liberecon, sian laŭnaturan staton de absoluta organiza amorfeco. Kaj el tiu amorfa stato komenciĝis aperi jam novaj kristaletoj de novaj esperantistaj organizoj.

Post la fino de la milito estis faritaj provoj ree veki al la vivo la Centran Oficejon kaj la centrajn instituciojn. Sed mankis la financa subteno kaj influo de Hachette, forestis C. Bourlet kun siaj centralizaj akceloj, mortis Zamenhof—ĝis nun bonuzita liel ŝirmilo por la veraj gvidantoj. La tuta socio travivis gravajn skuojn kaj la malnovaj gvidantoj devis retiriĝi.

Eĉ la plej obskurantaj, plej konservativemaj elementoj de la malnova esperantujo tion komprenis. Kiel en ĉiuj fakoj de la socia vivo, ankaŭ en esperantujo komenciĝis post milito nova periodo de ŝajna demokratiigo kun belaj paroloj kaj kun absoluta ideo senpoveco.





## IX. LA ESPERANTA DEMOKRATIO

### Hector Hodler

La historio de la amasa internacia esperantista organizado estas nedisigeble ligita kun la nomo de Hector Hodler.

H. Hodler estis filo de fama svisa pentristo Ferdinand Hodler. Informoj, kiujn ni posedas pri lia infanaĝa tempo, montras, ke ĝi estis sufiĉe peza, komence pro cirkonstancoj ekonomiaj kaj poste pro certa familia disharmonio inter la gepatroj.

En la j. 1903, estante gimnaziano, Hodler konatiĝis kun esperanto. Depost tiu tempo li plene donis sin al la afero de la lingvo internacia. En la j. 1907 li, lasinte siajn studojn gimnaziajn, prenis sur sin eldonadon de la gazeto «Esperanto». Lia klero estis nature ne sistema kaj ne sufiĉa. Tre ŝargita per diversaj esperantaj laboroj, nur post la j. 1914 li ricevis eblon pligrandigi siajn sciojn, speciale en la kampo de sciencoj sociaj (XIV, p. 47).

Nin speciale devas interesi konceptoj de Hodler, rilatantaj la internacilingvan movadon. Hodler ne apartenis al tiuj esperantistoj, kiuj taksas la mondlingvan problemon sendepende de aliaj problemoj sociaj. En decembro 1913 li skribis: «por taŭge juĝi nian aferon, ni ne devas ĝin izoligi for de la ekstera mondo» (XIV, p. 61). Li bone taksis la fakton, ke esperanto kiel lingvo progresas per si mem eĉ sen iuj specialaj organizaĵoj kaj gvidaj institucioj. Sed ankoraŭ pli alte li taksis la fakton, ke «multloke oni ne plu ridas je nia celado, sed serioze konsideras ĝin» (XIV, p. 63). Per tuta sia laboro li pleje volis akceli, ke laŭeble kresku kvanto da homoj «serioze konsiderantaj» la movadon. Li kreis idealon de modesta esperanta laboranto «s-ro Laborulo», kiu malmulte sin oku-



HECTOR HODLER



pas pri esperantista politiko, sed plenumas certajn farojn, gvidas kursojn, faras servojn al eksterlandanoj kaj tiamaniere formike sukcesigas la movadon (XIV, p. 68).

Li volis, ke la lingvo ne haltu en sia evoluo, ke ĝi «adaptiĝu je la nuntempaj bezonoj de la penso» (XIV, p. 80). Tial li kritikis la malmulte valorajn literaturajn tradukojn el lingvoj naciaj. Tial li instigis traduki verkojn gravajn kaj aktualajn — anstataŭ la klasikaĵoj ne tiom valoraj por la nuntempaĵo.

Tia estis la fondinto de Universala Esperanto Asocio (UEA), la sola, sur certaj sociaj bezonoj sin apoginta, internacia organizo de esperantistoj.

Hector Hodler estis pli reala ol Zamenhof, sed ankaŭ lia realemo havis kiel sian devenon profundan idealismon. Prave skribis E. Privat pri li: «Al tio, kion iniciatis la genio de Zamenhof sur la kampo lingva, li aldonis la necesan bazon sur la kampo socia» (XIV, p. 11).

### Organizo kaj laboro [de UEA

La ideo pri aranĝo de organiza praktika servaro, kiun povus utiligi siacele ĉiu esperantisto estis ne nova. Jam en la j. 1904 pri tiu ideo skribis A. Carlos al Zamenhof (XIV, p. 25). La saman ideon porbatalis en la j. 1906—1907 Th. Rousseau. Neniel aŭ malmulte interesis sin pri tiu ideo la tiutempa pariza gvidantaro, okupita por desupre organizi la movadon kaj ĝian gvidadon. Tiuj ideoj devis ŝajni al ili tro demokratiaj kaj ĉiuokaze ne konformaj al ilia taktiko.

Vere, en la j. 1907 estis organizita speciala servo de esperantistaj konsuloj, elektataj laŭ iniciato de lokaj grupoj esperantistaj, sed tiuj konsuloj estis nek respondecaj antaŭ iu centro, nek unuigitaj en sia agado per iu centro.

Kiam en fino de la j. 1907 grave ekminacis al la movado esperantista la krizo, kaŭzita pro la decido de la Delegitara komitato (v. ĉap. VI), tiam la problemo pri centralizita organizo de praktika servaro peresperanta akiris specialan gravecon, ĉar tiamaniere oni povis esperi veni ankaŭ al fakta demokratia organizo de ĉiuj aktivaj esperantistoj, kiuj povus tiamaniere esprimi sian volon kaj opinion pri la vojoj de la lingvo-evoluo.

La intertraktoj kun la Delegitaro estis ĉesigitaj, sed la ideo pri neceso kaj ebleco konstrui vere demokratian internacian esperantistan organizon restis. Tiam venis al la batalareno esperantista kun siaj proponoj Hector Hodler. Li pensis, ke neniu el ekstere rajtas trudi teoriaĵojn al uzantoj de la lingvo. Li ĝuste taksis la internan forton de la esperantomovado. Li samtempe kontraŭstaris al la oligarkiemuloj, celantaj monopoligi esperanton. Li revis, ke la esperantistaro, utiligante la lingvon, mem difinu — kiamaniere devas esti organizata kaj administrata la movado.

Por ne iĝi minaco al la ekzistantaj en Parizo centraj institucioj kaj por ne naski en esperantujo novajn diskutojn organizajn — necesis, ke la nova organizo sin limigu per praktika apliko de la lingvo. Konforme al



tio en februaro 1908 Hodler kaj kelkaj liaj samideanoj disenc'is cirkuleron pri fondo de «Internacia Organizaĵo Esperantista», kiu celis: «1) puŝi nian aferon en la vojon de praktikaj aplikaĵoj per kreado de diversaj internaciaj servoj per esperanto kaj 2) krei fortikan ligilon de solidareco inter diverslandaj samideanoj kaj doni al nia afero praktikan fundamenton».

La 1-an de majo 1908 aperis en la gazeto «Esperanto», unua informilo pri «Universala Esperanto Asocio», kies kreon subtenis 57 grupoj diverslokaj. Kiel bonvola aparato por plenumo de diversaj praktikaj servoj la membroj de U.E.A. estis utiligitaj diverslokaj kaj diversurbaj volontulaj delegitoj de UEA, kies nombro baldaŭ superis unu milon. Ankaŭ la membraro de UEA kreskis rapide, superinte ĉiujn asociojn mondlingvajn, ĝis tiam ekzistantajn.

Fondo de UEA, kiel skribis Hodler mem, vekis «ĉe kelkaj tiamaj gvidantoj de la movado nur tre moderan entuziasmon. Iuj timis, ke tiu nova organizaĵo sin okupos pri lingvaj demandoj; aliaj, ke ĝi volas direkti la propagandon kaj anstataŭi la ekzistantajn societojn» (XIV, p. 36). Citante koncernajn dirojn de Hodler, E. Stettler rimarkas: «senpartia ekzameno devigas rekoni, ke diversaj timoj ne estis senkaŭzaj».

Komence Hodler—la ĉefa iniciatinto de la nova organizo eble efektive revis pri koncentrado de la tuta movado en UEA. Tamen iom post iom la komplikaj organizaj ŝarĝoj devigis lin limigi sian agadon nur per starigo de UEA-servoj, per administro de lokaj delegitoj, konsuloj k. t. p. Anstataŭ iuj pluaj vastaj planoj Hodler komencis zorgi nur pri konservo de UEA, kontraŭstarante la monopoligajn tendencojn de la centraj institucioj parizaj—en tiu grado, en kiu tiuj tendencoj ŝajnis danĝeraj por UEA.

Hodler nature klopodis, ke kresku kaj fortikiĝu UEA. Li nature kontraŭstaris, kiam iuj aliaj institucioj volis profiti siacele kaj sen interkonsento kun UEA la servojn de la delegitoj de UEA. Tial UEA protestis en la j. 1912 kontraŭ publikigo de la listo de siaj delegitoj en la «Tutmonda jarlibro esperantista», eldonata de la Esperantista Centra Oficejo. Tial samjare ĝi malkonsentis publikigon de la sama listo en la esperantista Poŝkalendaro, eldonata de Berlina eldonejo «Möller kaj Borel». Sed ekster tiuj protestoj — ĝi zorgis labori en plej intima kunligo kun la naciaj propagandaj kaj novenaskiĝantaj fakaj asocioj esperantistaj.

Estante liberala en la organiza problemoj kaj fidante tiurilate nur al la laboro, farata de la esperantistaj amasoj, Hodler restis same liberala rilate la lingvon. Li bone taksis la praktikan valoron de neŝanĝebla lingva fundamento, sur kiu kreskas la lingvo, sed li ne pensis, ke tiu fundamento devas ĝeni pluan liberan kreskon de la lingvo kaj de ĝiaj elementoj (II, p. 88).

Kiam dum la jaroj 1911—13, post grava kresko de UEA, venis provoj reorganizi la gvidadon de ĝenerala esperanto-movado sub iu ŝildo de demokrateca kongresa regado, tiam Hodler kaj aliaj gvidantoj de UEA batalis same kontraŭ la pseŭdo-demokrataj aranĝoj de aliaj esperantogvidantoj, kiel kontraŭ la proponoj de A. Michaux (vidu ĉap. VIII). Hodler argumentis ke eĉ pli ol la kunvenantaj dum la kongresoj rajti-



gitaj delegitoj—valorus koncernaj decidoj de la delegitoj de UEA, fakte reprezentantaj ĉion plej valoran kaj aktivan, kio estis en esperantujo. Kaj li estis prava. UEA estis en okuloj de ĉiuj praktikaj esperantistoj la sola demokrate-aŭtoritata internacia organizo. La servoj farataj de ĝi ankaŭ pleje imponis por la propagando de la lingvo. Ĝis la komenco de mondmilito UEA daŭris progresi. Nur la milito ekmalhelpis al ĝia plua kreskado. Dum la jaroj militaj UEA, profitante bonŝancon, ke ĝia centra sidejo troviĝis en neŭtrala Svisio, en Ĝenevo, restis la sola standardportanto de la iama internacia esperantista movado. En ĝia, sole daŭrinta dum tiu tempo, internacia gazeto «Esperanto» sonis paroloj alt-inspiraj, kiuj prezentis eble malmultan realan forton, sed kiuj kvazaŭ daŭrigis la idealismajn akcelojn de idealistaj esperantistoj el rondoj intelektaj, liberalaj, pacifistaj kaj similaj.

### Hector Hodler dum la milito

Edukita en socio burĝeca, Hodler praktike lernis ŝati varoron de kolektivismaj principoj dum organizado kaj laborado de UEA. La mondmilito instigis lin studi la kaŭzojn de internacia ŝtata malkonkordo kaj la kaŭzojn de okazantaj militoj. En la j. 1915 li verkis specialan ampleksan traktaĵon pri paca organizo de la popoloj. La konkludoj, tirataj el tiu verko montras, ke Hodler bone komprenis malbonajn flankojn de la ekzistanta sociordo, kiu povis kaŭzi tian grandiozan homekstermadon. Sed li ne trovis kaj nur palpetis la verajn kaŭzojn forigendajn. Li skribis: «La ĉefa kulpulo estas la internacia anarĥia malordo, de kiu la milito estas ne apartigebla. Kiel malmoralaj, kiel senigataj je konscienco estis certaj politikistoj, ili ne estus povintaj malutili, se la civilizita mondo estus organizita favore al paco anstataŭ por la milito».

Li komencis kompreni, ke la leĝoj de la socio kapitalista devas esti ŝanĝotaj. Li komencis kompreni, ke necesas apliki certajn batalajn metodojn por forigi la ekzistantan malbonon. Li finis sian verkon pri forigo de la militoj per jenaj vortoj: «La ideoj nek estas netuŝeblaj, nek eternaj. La batalo de la volo kontraŭ blindaj povoj estas la esenco de l'historio». Tiuj bone komprenitaj vortoj evidente devis servi kieliu gvidsignalo por Hodler post la mondmilito, kiam de li gvidata UEA restis sola reprezentanto de la malnova antaŭmilita esperantistaro.

Hodler, sola el la nombro de aliaj esperanto-gvidantoj, persistis dum la milito resti ĉe la esperantismaj idealoj. Li sola provis rezisti. En rimarkinda artikolo, presita en «Esperanto» dum julio-aŭgusto 1918 j., «La socio post milito» — Hodler parolis pri la esencaj «transformoj, kiujn la milito realigos en la strukturo de la socio». Li antaŭvidis en ĝi necesan kreskon de la «kolektivismaj tendencoj». Li antaŭvidis pliakrignon de klasbataloj kaj tion, ke la laboristoj, trompitaĵoj de siaj ŝovinistemaj gvidantoj, aliĝos al novaj pli radikalaj ideoj, kaj serĉos por si novajn gvidantojn. Sed vane li havis eĉ ioman esperon, ke la aŭtoritatoj elmontros komprenemon por la ŝanĝoj okazontaj. Homoj de malnova ordo povis revii nur pri restarigo de la antaŭmilita situacio.



Ni ne povas antaŭvidi kio estus okazinta kun Hodler, se li vivus pluen. Eble ĝuste tiu de li neantaŭvidita kontraŭstaro de la kapitalist-ŝtataj registaroj al formigo de novaj soci-rilatoj—igus lin finpensi siajn ideojn kaj konstati, ke la batalo por ŝanĝo de la socia ordo devas kaj povas esti gvidata nur de malsupre, nur de la amaso, nur de tiuj soci-tavoloj, kiuj vidas nenion bonan por si en la ekzistado kaj kiuj solaj povas «kolektivisme» akceli pli bonan, pli justan estonton.

Ne kompreninte la ĉefajn fortojn sociajn, kiuj influas la mondhistorion, Hodler tamen komprenis, ke ne eblas al li klare antaŭvidi ĉiujn ŝanĝojn sociajn, okazontajn post la milito. En februaro 1919 li skribis: «La mondo nun eknaskas novan ordon, sed ĝia formo klare aperos nur post multaj skuoj kaj disputoj» (XIV, p. 71). Li volis, ke esperanto servu al tiu nova ordo, kiel ŝatinda, valora ĝia elemento. Li estis de tiu vidpunkto plej bona el la «esperantistaj neŭtraluloj», ĉar li volis per la lingvo servi al la novo, fidante tiun novon kaj tute ne pretendante, ke tiu novo adaptiĝu al liaj personaj deziroj aŭ preferoj.

Akre li skribis pri eminentuloj, kiuj, sekvante la ĝeneralajn tendencojn, «ne aŭdigis la moderigan voĉon de la eterna homa saĝo» (XIV, p. 105). Tial li volis trovi esprimilon por tiu saĝo en la organizita socio. Li estis tre proksima al konsekvenca kompreno de la novaj venantaj fortoj historiaj kaj de la fortoj malnovaj kontraŭbatalindaj. Li volis, konforme al siaj ideoj—kelkfoje ankoraŭ nebulecaj, neprecizigitaj,—gvidi la pluan agadon de UEA.

Post milito li pleje substrekis la fakton, ke malsuksesis ĉiuj aŭtokrate starigitaj esperanto-institucioj, ke vana estas la espero, ke la ŝtataj aŭtoritatoj akceptos esperanton pro iuj konsideroj moralaj, eĉ plej konvinkigaj. Li vokis al persista daŭrigo de la laboro: «Ni devas ĉion fari kvazaŭ la registaroj ne interesiĝus al ni, tio estos la plej bona rimedo por ke ili estu kun ni iam» (XIV, p. 92).

Hector Hodler mortis 31/III—1920 j. Post lia morto la ankoraŭ malfortika movado trafis sub gvidadon de aliaj homoj, kiuj eble kelkfoje uzis la saman kiel Hodler—frazaron, sed kiuj zorgis, ke la movado ne aliĝu iun difinitan socian idearon, kiuj ĉefe zorgis adaptigi la renaskiĝantan esperanto-movadon al bezonoj kaj intereso de malnovaj soci-fortoj, provantaj regi la mondon en malnova maniero, se eĉ per novaj rimedoj.

### **Agitado antaŭ la ŝtataj aŭtoritatoj post la mondmilito**

La novaj oportunistemaj estroj de UEA komencis fari ĉion por for-tigi sian situacion kaj por pravigi sian poresperantan laboron ĉe la aŭtoritatoj de la postmilita kapitalista socio.

UEA entreprenis vastan konsekvencan agitadon, kiu celis ricevi aprobon kaj subtenon de la kapitalist-ŝtataj aŭtoritatoj. La 11/XI—20 j. estis farita tiurilata propono al la Ligo de Nacioj. Sudafrika, brazila, belga, ĉina, ĉilia, kolumbia, hinda, haitia, itala, persa, rumana, finlanda, albana, japana, venezuela kaj ĉeĥoslovaka delegitoj ĉe la Ligo de Nacioj subskribis tiun proponon en la jaroj 1920—21. Estas



komprenoble, ke ĝuste la reprezentantoj de ŝtatoj, kies lingvoj ne ĝuis oficialan internacian akcepton, subtenis tiun proponon. Ili flanko tio estis certa elmondo de opozicio rilate al la mondpotencoj, kies lingvoj tradicie ĝuis tutmondan hegemonion.

Tamen por tiuj mondpotencoj kaj speciale por la supera gvidanto de la venkinta Entento, Francio — allasi la internacian demokratian esperanton al oficiala internacia apliko — signifis certan rezignon de siaj rajtoj, eventuale plifortigitaj per la lasta mondmilito. Tiuj mondpotencoj kontraŭstaris la proponon faritan kaj en la jaro 1923 ĝi estis entombigita.

La fama filozofo Bergson, antaŭ 10 jaroj espriminta siajn simpatiojn al esperanto, faris nun la bezonatan de li servon al la registaro de Francio. Bergson montris plej klare, ke la scienco en socio kapitalista neniel povas kaj kapablas kontraŭstari al la reala celkonscia politiko de la financistaj registaroj. Bergson prezidis en la Internacia Komisiono por intelekta kooperado dum aŭgusto 1923 en Ĝenevo kaj li argumentis sofiste: «Sendube la adopto de arta lingvo, kiel esperanto, povus fari tre grandajn servojn. Sed ĝi havas ankaŭ malavantaĝojn. Por scii, ĉu la avantaĝo superas la malon, ni lasu la intelektajn kaj moralajn fortojn decidi per la evoluo de la faktoj... La celo de la Ligo estas proksimigi la popolojn, sed ne mekanike per faciligo de la komunikoj... La disvastiĝo de artefarita mondlingvo igos la lernon de fremdaj lingvoj ne necesa. Tiam oni ne plu lernos ilin kaj oni perdos tiun alproksimigon de animoj trans la limoj» (II. p. 146).

La tuta morala mensa korupteco de la financist-oligarkia socio montriĝis en tiuj paroloj. Tutkonforme al tiuj paroloj estis redaktita la fina rezolucio. La oportunist-reformista UEA, sukcesinte ĉe la etaj mondfortoj, similaj al la Albana registaro, malsukcesis ĉe siaj klopodoj antaŭ la grandpotencoj imperialistaj.

La burĝa sciencularo bone, kvankam iom cinike, malkaŝe, plenumis la ordonon de siaj mastroj. E. Privat, partopreninta persone tiujn okazaĵojn konstatis, ke «ne nur la plimulto de tiuj scienculoj rifuzis studi aferon kaj aŭdi spertulojn antaŭ ol decidi pri ĝi, sed la plimulto eĉ ne legis la raporton, akceptitan de la Ligo».

Ne sukcesinte ĉe Ligo de Nacioj, UEA daŭris klopodi ĉe apartaj ŝtatoj kaj ŝtataj institucioj. Ĉiu plej malgranda atingiĝo tiurilata estis prezentata, kiel grava venko. Tiel oni fanfaronis pri poŝtkartoj kun teksto esperanta, eldonitaj de la libera urbo Danzig. Oni same bruis pri simila decido de mikroskopa princlando Lichtenstein. Tiuj bagatelaj sukcesoj devis pruvi, ke agitado inter aŭtoritatoj estas utila por esperanto, ke per ili estas pravigebla ekzisto de koncernaj centraj institucioj esperantistaj.

### Rilato de la ŝtatoj al esperanto

Rezistema rilato de la ŝtataj aŭtoritatoj al oficialigo de esperanto estis kaŭzata ĉefe pro konsideroj naci-ŝovinistaj. Tamen necesas konstati, ke pluaj du kaŭzoj de tiu rezistemo estis: 1) ne sufiĉa ankoraŭ aŭtoritateco de la lingvo, ne sufiĉa ĝia vastigo — por ke la registaroj



komencu trakti tiun aferon kiel necesan realaĵon kaj 2) elmontri de tendencoj de plua esperanto-evoluo kaj praktika apliko en rondoj revoluciaj kaj laboristaj.

Tiuj lastaj tendencoj ŝajnis kelkfoje eĉ speciale gravaj al la reakciaj registaroj. L. Berard—ministro de popol-klerigo en Francio eĉ la registaro de Poincare en la j. 1922 — trovis necesa malpermesi instruon de esperanto en ŝtataj lernejoj kaj liveron de publikaj ejoj por kursoj esperantaj.

Tiaj agoj plene konformis al la nacionalista ŝovinista reĝimo de postmilita Francio, celanta subpremi ĉiun liberalan, pacifistan, internacian penson.

Ankaŭ en landoj aliaj la registaroj ofte timis ŝajnan intimecon inter la revolucia movado kaj esperanto. Tute nature en landoj, similaj al Italio kaj Hungario, estis ĉiel malpermesata kaj persekutata la agado de laboristaj esperanto-organizoj. Tiurilate la laboristaj esperantistoj ĝuis en tiuj landoj la saman sorton, kiel aliaj laboristaj klasorganizoj.

Ofte samtempe kun la laboristaj esperantistoj estis speciale observata, atentata kaj malhelpata la agado de esperantistoj entute. La neŭtralaj burĝecaj esperantistoj tion ne povis toleri. Kaj efektive tia rilato al ili neniel konformis al iliaj konceptoj kaj agoj. La neŭtralaj esperantistaj gvidantoj zorgis klarigi, ke esperanto principe estas neniom identa kun la revolucio, ke la ĝenerala neŭtrala esperanto-movado neniom volas helpi aŭ servi al revolucianoj.

La agente de hungara polico A. Marich, pri kiu ni jam parolis pli frue (vidu ĉap. VIII), de post la j. 1922 uzis ĉiujn fortojn por krei fortan internacian organizon de esperantistoj-policistoj. En la j. 1922 li komencis eldoni eĉ specialan gazeton «La Policisto». Tiuj faroj devis speciale influi la diversŝtatajn registarojn kaj montri al ili atentindecon de la fakto, ke esperanto, uzata de certaj revolucianoj, same bone povas esti uzata ankaŭ de elementoj, defendantaj la nunan sociordon.

Por ankoraŭ pli bone pruvi socian fidindecon de la neŭtrala esperanto-movado, la hungariaj esperantistoj aranĝis dum la j. 1929 en Budapeŝto la XXI-an Universalan Kongreson Esperantistan. Tiu kongreso per siaj manifestoj, ekskluzive esperantistaj, bele montris al koncernaj aŭtoritatoj senkaŭzecon de iliaj suspektoj. Ankaŭ la Internacia Centra Komitato de la Esperanto Movado en la sama jaro publikigis specialan deklaron pri esenca neŭtraleco de la movado.

Dubinde, ĉu tio influis al la ŝtataj institucioj, informitaj pri la peresperanta agitado de revolucianoj. Tamen venis al ili la kompreno, ke certaj personoj, uzante esperanton, povas esti ne malamikaj al la nuna sociordo kaj kelkfoje eĉ esti bonaj por ĝi servantoj.

### **Agitado en fakoj aplikaj**

La ekzistinta kontraŭstaro de ŝtataj aŭtoritatoj al esperanto ne malhelpis enpenetron de esperanto en pluraj fakoj de praktika uzado.



La gvidantoj de postmilita neŭtrala esperanto-movado zorgis serĉi jam subtenon ne ĉe izolaj aŭtoritatoj individuaj, sed ĉe iuj gravaj institucioj kaj organizoj. Tio estis pli konforma al la epoko; kaj tio estis jam pli sukcesa, ĉar intertempe kreskis kaj vastiĝis apliko de la nova lingvo.

Potencaj estis la atingoj de esperanto en Radiofonio (II, p. 152). Depost la j. 1922 la uzo de esperanto en tiu kampo ĉiam pli kaj pli kreskis. La 1-a Internacia Radio-Kongreso en la j. 1925 en Parizo rekomendis aplikon kaj uzon de esperanto. Tiun sukceson helpis ne interveno de iu aŭtoritato ekstera, sed elmonro de certa volo de multnombraj radioamatoroj, jam uzantaj esperanton.

Post kelkaj ripetitaj proponoj tiurilataj ankaŭ la Ligo de Nacioj devis la 20-IX-24 rekomendi al ĉiuj ŝtatoj allason de esperanto, kiel «lingvo klara» ĉe la telegrafaj kaj radio-telegrafaj rilatoj. Koncerna decido, permesanta tiun allason, estis farita en la j. 1925 de la Universala Telegrafa Unuiĝo.

Malmultan aŭtoritaton inter la amasoj ĉiulandaj ĝuis la Ligo de Nacioj, fondita post la milito. Bone tion pruvas la aserto de E. Privat, ke la plejmulte disvastiĝinta liga raporto temis ĝuste pri «Esperanto kiel Mondlingvo» (II, p. 143). Ĉiuj aliaj raporto de la Ligo de Nacioj ĝuis ankoraŭ pli malmultan atenton. Malmulte interesiĝis la amaso ankaŭ pri la laboro, farata de la Ligo.

Por laŭpove altigi sian aŭtoritaton la Ligo faris ĉion eblan. Speciale tiun taskon—altigi popularecon de la Ligo inter la amasoj—havis la fondita en la j. 1920 en Genevo, Internacia Laboroficejo. Kaj tiu Oficejo ekuzis vaste esperanton por tiamaniere utiligi la esperantistan favoron por ĉiulanda diskonigo de siaj laboraĵoj.

Ankaŭ en la kampo de aplikaj sciencoj daŭre kreskis la rolo de esperanto. Ekzistantaj fakaj asocioj esperantistaj, eĉ ne farante iun speciale utilan laboron per esperanto, helpis tamen al ellaboro de specialaj fakaj terminaroj, al apero de teknikaj verkoj en esperanto.

Speciale bonsukcesis esperanto post la milito en rondoj komercaj—ĉe foiroj, diversaj komercaj ĉambroj kaj firmaoj, utiligantaj depost la j. 1918 ĉiam pli vaste la internacian lingvon (II, p. 120—122).

En la j. 1925 en Parizo estis kunvokita «Internacia konferenco por uzado de esperanto en sciencoj puraj kaj aplikitaj» (II, p. 162). Samtempe kaj samloke okazis konferenco por la uzado de esperanto en komerco kaj industrio. La amplekson de tiu peresperanta movado montris plejbone la partoprenintoj de tiu lasta konferenco mem, el kiuj 10 reprezentis diversajn registarojn, 171—diversajn komercajn ĉambrojn kaj industriajn korporaciojn, 14—foirojn kaj 208—diversajn firmaojn (II, p. 163). Ankaŭ la samtempan teknikan konferencon partoprenis reprezentantoj de 230 sciencaj kaj teknikaj societoj el 37 landoj.

En tiu kampo aplika kaj praktika esperanto do progresis tute kontentige, progresis speciale pro kreskanta anaro esperantista, pro ĝia diversloken direktita agitado.



## Postmilita organizo de la neŭtrala esperantistaro

Daŭris kresko de publika kompreno pri ebleco kaj pri akceptebleco de la lingvo artefarita. Tamen al tiu rapida kresko de publika favoro ne konformis relative malrapida kresko de la nombro de esperantistoj, unuigataj en neŭtralaj-propagandaj kaj fakaj-aplikaj societoj. Same ne multe impona restis la nombro de membraro de UEA, apenaŭ superinta 8.000.

Antaŭ la milito la esperantista movado povis esti klare dividita en du ĉefaj sekcioj. La unua estis UEA, laboranta per metodoj demokratiaj kaj celanta ĉefe la praktikan aplikon de la lingvo. La dua estis formata de diversaj naciaj propagandaj asocioj, kiuj laŭpove aplikis en sia laborado metodojn de kapitalisma reklamado kaj agitado. Tiu dua sekcio obeis la ideojn kaj principojn de la parizaj centraj institucioj.

Post la milito tiuj du sekcioj kvazaŭ unuiĝis, same kiel okazis en ĉiuj landoj la kunkresko de la kapitalist-ŝtata aparato kun certaj—tiel nomataj—demokrataj publikaj organizoj. Eĉ pli, la aŭtokrataj esperantistaj centraj institucioj, kreitaj de apartaj personoj, kiuj celis gvidi la movadon, — ĉesis ekzisti. Hachette ĉesis havi intereson por esperantaj negocoj. Esperantista Centra Oficejo apenaŭ vegetis. La Konstanta komitato de la kongresoj ne elmontris iun realan vivopovon.

En la komenco de la j. 1920 UEA pretendis resti sola konserviĝinta internacia esperanto-centro. H. Hodler esperis, ke nun fine efektiviĝos liaj demokratiaj idealoj, ke UEA prenos en siaj manoj pluan direktadon de la tuta movado. Simile al multaj intelektuloj-revemuloj li ankoraŭ esperis, ke eĉ la malnovaj esperanto-gvidantoj fariĝos nun pli cedemaj por certa demokratigo de la movado. Sed sensukcese li proponis al g-lo Sebert prezidantecon en UEA (II, p. 99).

La kunvokitaj post la milito esperantistaj kongresoj, la XII-a en Hago (1920) kaj la XIII-a en Praha (1921), jam ne estis influataj de parizaj aŭtokratoj. Eble, se iu provo influi de tiu flanko estus montrita,—ĝi ricevus rebaton pli energian ol iam ajn antaŭe.

Multaj esperantistoj memoris la bonfaran por esperantismo rolon de UEA dum la milito. La naciaj propagandaj asocioj bezonis iun demokratian internacian centron por unuecigi siajn laborojn kaj por fari ilin pli efikaj. Do la situacio estis favora por ke UEA sukcesu kiel nova centro de la movado.

## Internacia Centra Komitato de esperanto-movado

En la j. 1922, post kiam ĉesis ekzisti la Centra Oficejo, U.E.A., gvidata de E. Stettler kaj de E. Privat, fine realigis la formalan unuigon kaj alcentrigon de la movado — laŭ projekto delonge revita. Dum la Universala Kongreso en Helsinki (1922 j.) estis starigita speciala tiusenca kontrakto inter UEA kaj la naciaj propagandaj asocioj esperantistaj.



La Universalaj Kongresoj daŭris esti kunvokataj ĉiujare, sed ili jam havis neniun organizan kaj administran valoron. Ili daŭris funkcii nur kiel festoj, solenoj, regule aranĝataj. La tuta povo—gvidi la movadon iris formale al la nove kreita Internacia Centra Komitato, kiun pleje influis, subvencianta ĝin, UEA.

Tamen ankaŭ post la j. 1922 la movado fakte restis ne ĉentrigita. Fortaj fakaj asocioj, kaj inter ili la Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT, vidu ĉap. X), restis ekster kadroj de tiu nova organizo. Kaj ankaŭ la naciaj neŭtralaj propagandaj asocioj ne ĉiam emis aliĝi al la kreita I. C. K. Necesas aldone rimarki, ke multaj aliaj el la aliĝintaj naciaj asocioj zorgis pri formala plimalmultigo de sia membraro por tiama maniere transpagi pli malmultajn sumojn al ICK.

La Lingva Komitato kaj la Akademio, kies prezidanto — post morto de E. Boirac — iĝis Th. Cart, ankaŭ zorgis pri sia absoluta sendependeco de ICK, konsiderante la problemojn lingvajn, kiel tute sendependajn de la problemoj organizaj.

Kaj entute en la postmilita kapitalista socio aperis neniun novo, kiu faciligus organizan centralizon de la movado. La ĉefa malbono konsistis en tio, ke la tuta organiza elspezo devis esti kovrata nur de etaj membrokotizoj. La plej grava fonto, kiu povus nutri per siaj financaj sukcoj la organizon de la movado — la eldonado restis en la manoj de apartaj posedantoj privataj. La kondiĉoj kaj tradicioj de la kapitalista socio kaŭzis, ke la fortaj naciaj esperanto-asocioj, ekzemple—la germana kaj la franca, neniam zorgis pri eldonado de koncernaj esperanto-lerniloj, lasante tiun profitan fakon al ekspluato de apartaj individuoj kaj firmaoj. Same la centraj institucioj neniam zorgis pri utiligo de organiza forto de la gazetaro. La oficialaj organoj estis palaj, literaturecaj, malofte aperantaj, sen organizaj instigoj kaj lastatempe eĉ sen kronik-informoj. La pli viglaj, pli aktualaj presorganoj restis ekster la oficiala organizo. Plej granda el tiuj private eldonataj gazetoj «Heroldo de Esperanto» entute sin okupis pri profitserva sensacio, pri rapida informado, senigita je iu organiza gvidado.

Ĉi-ĉio nature ne favoris al kresko de aŭtoritato kaj de rolo de la nova ICK, kies prezidanto estis E. Privat, estanta samtempe prezidanto de UEA. Tiam naskiĝis en esperantujo pluraj bataletoj, memorigantaj la tempon pasintan — antaŭmilitan, kiam izolaj gvidantoj batalis inter si por akiri dominantan rolon en la movado.

Unuavice necesis kompromiti en la okuloj de la esperantistaro la semajnan gazeton «Heroldo de esperanto», eldonatan en Köln de privata entreprenisto Teo Jung. Gvidanto de UEA kaj ICK kaj samtempa redaktoro de la gazeto «Esperanto» E. Privat lerte ekriproĉis en la j. 1928 T. Jung pri kelkaj reformistaj tendencoj. La lerta riproĉo samtempe ĵetis certan makulon ankaŭ sur la prezidanton de la Lingva Komitato kaj de la Akademio Th. Cart, konsekvenca lingvan konservativulon, kiu riproĉis kelkajn lingvo-novaĵojn, enkondukitajn de la gazeto «Esperanto» (vidu «Esperanto» 1928 № 1 p. 1).

La publikaj riproĉoj de E. Privat ricevis tute ne atenditajn sekvojn. T. Jung protestis kontraŭ tiu atako. Same publike protestis Th. Cart,



(vidu «Esperanto», 1928 № 3 p. 64). Al la vasta esperantista publiko estis montritaj postkulisaj intrigoj en la esperantista gvidantaro.

Tiun momenton eluzis la malamikoj de E. Privat. Li, unuiganta en sia persono gvidadon de ĉiuj centraj esperantistaj institucioj, havis multajn malamikojn — ĉu personajn, ĉu principajn — pro metodoj de la gvidado. Multaj aliaj timis ĝenerale tian troan personecan koncentrigon de la movado.

E. Privat ne posedis riĉecon de Sebert, de Javal kaj li estis devigita, laborante en ICK kaj UEA, ricevi salajron de tiuj institucioj. En la j. 1928 pariza ĉefdelegito de UEA Delahoue publikigis vastajn cirkulerojn, kulpigantajn E. Privat pri plej diversaj pekoj. Speciala enketa komisiono estis starigita por esplori la aferon, kiu minacis fariĝi granda skandalo. Tiu komisiono dum la XX-a kongreso en Antwerpen (1928) publike deklaris, ke la gvidantaro de ICK kaj de UEA kaj speciale E. Privat agis ĉiam senripoĉe. Tia estis la deviga tradicio ĉe la kapitalista socio, kiam oni evitas kompromiti la gvidantojn, ĉar per tio kvazaŭ povus kompromitiĝi la tuta movado aŭ institucio.

Tamen samjare estis akceptita eksiĝo de E. Privat el ofico de la prezidanto de ICK. Lin anstataŭis angla negocianto Merchant. E. Privat estis elektita kiel honorprezidanto de ICK por tiamaniere refoje substreki senmakulecon de liaj agoj. Samjare li eksiĝis ankaŭ kiel prezidanto de UEA, restinte nur redaktoro de la gazeto «Esperanto».

### **E. Privat — publika aganto**


Foriro de E. Privat el la superaj gvidaj roloj de esperantujo memorigas similajn okazaĵojn ankaŭ en aliaj kampoj de postmilita socia vivo.

Post la milito necesis, ke la publikaj organizoj akiru certan demokratian aspekton. Por tiu rolo pleje taŭgis — E. Privat. Li estis lernejkamarado de liberala kaj profunde-pensa H. Hodler. Li estis perfekta oratoro de la esperantaj kongresoj ankoraŭ antaŭ la milito. Li ne partoprenis en diversaj aranĝoj de parizaj eminentuloj antaŭmilitaj. Li ĉiam substrekis la tezon, ke esperanto ne povas esti de iu ajn monopoligata, ke ĝi estas «vivanta lingvo de vivanta popolo». Li partoprenis en laboroj de la Ligo de Nacioj. Kondutis li multe pli demokrate ol la iamaj Sebert, Bourlet kaj aliaj. Fine, li estis membro de Svisa social-demokrata partio. Ĉe komenco de SAT-movado (vidu ĉap. X) E. Privat eĉ kunlaboris en la «Laborista Esperantisto» kaj tiamaniere ankoraŭ plie montris sian demokratecon. Do Privat estis la ĝusta persono, per kiu la burĝaj sociaj rondoj esperantistaj ekprovis direkti kaj administri la universalan neŭtralan esperanto-movadon. Por tion atingi tiuj rondoj estis pretaj eĉ havi certajn elspezojn kaj ĝenojn.

Sub gvidado de E. Privat en la neŭtrala movado aperis dum la lastaj jaroj kelkaj novaj tendencoj. Paralele kun klopodoj ĉe aŭtoritatoj estis faritaj provoj de propagando de la lingvo senpere ĉe la amasoj. Por tiu celo estis pleje utiligataj la amasaj diverslandaj kursoj, organizataj de katolika pastro, iama SAT-ano, sekretario de ICK—Ĉe. En



tiuj kursoj la centra efiko estis tiu de la frapanta lingva uzebleco, studata preskaŭ lude. La pedagogia metodo de esperanta instruado dum tiuj kursoj, kaj ne la «interna ideo», fariĝis la ĉefa varbilo kaj agitilo.



Edmond Privat

Samtempe kun la Ĉe-kursoj estis organizataj amasaj peresperantaj vojaĝoj. Tie-ĉi la neŭtrala movado prunteprenis la propagandan metodon de la laborista esperantomovado kaj uzis la peresperantan agadon kiel metodon de poresperanta agitado.

Tamen pasis la tempo kaj ŝarĝiĝis bezonoj de la burĝa esperantistaro. E. Privat ne sukcesis unuigi ĉiujn esperantistojn, starigi unuecan movadon, logi al la neŭtrala movado la laboristajn esperantistojn. Tiuj lastaj restis memstare organizitaj en Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), bojkotis kaj ignoris ICK kaj UEA. Samtempe Privat jam plenumis sian rolon.—solidigi kaj firmigi poziciojn de neŭtralaj esperanto-

organizoj. Li povis nun foriri kiel maŭro, plenuminta sian faron. Kaj li foriris. Lin anstataŭis homoj, eble formale ne apartenantaj al iu politika partio, sed estantaj sendubaj partianoj de la grandkapitalista politiko, konsiderantaj esperantomovadon kiel certan grandkapitalistan entreprenon, kiu bezonas por sia plua direktado jam metodojn aferemajn kaj ne parolemajn.

Tiuj novaj tendencoj ricevis ankoraŭ pli klare precizigitan formon dum la XXI-a Universala kongreso en Budapeŝto en la j. 1929, kiam estis ellaborita vasta programo pri centrigita esperanto-organizo, kiun direktus eĉ ne necese esperantistoj, sed bone pagataj organizo-kapablaj personoj. Sed tiuj ideoj de koncentrigita agado, plene konformaj al la ideoj de grandskale organizita kapitalista socio, neeviteble devis ricevi kontraŭstaron de tiuj rondoj esperantistaj, kiuj pensis pri memstara, individua laborado sur la kampo esperantista, kaj kiuj neniel volis sin subigi al decidoj kaj postuloj de iu monopola centro. La ellaborita projekto estis kaŝita kaj nur kelkajn monatojn post la kongreso informoj pri ĝi penetris en la esperantan gazetaron.

Same kiel oni ne povas esperi efektivigon de monopolist-koncentrigita kapitalista mastrumado en la tutmondo, — same oni ne havas ŝancon por esperi efektivigon de tiu projekto, eble perfekta de vidpunkto organiza kaj de vidpunkto de apartaj gvidantoj, sed ne trovonta subtenon en la amasoj esperantistaj kaj neniel ligita kun iu ideo, povanta entuziasmigi la amasojn.



## Ideismo en esperanto-movado

Senduba ideologia malfortiĝo de la, tiel nomata, neŭtrala esperanto-movado, neeviteble sekvanta la vojojn de socio kapitalista, kaŭzis, ke apartaj personoj provis reveki la malnovan internan ideon sub nova formo, pli konformiĝanta al la moderna socia situacio. En la gazeto «Heroldo de Esperanto» esperanta poeto J. Baghy kaj aliaj komencis en la j. 1928 ardan propagandon por la nova interna ideo, nomata de ili «ideismo». Tiu ideismo devis iliapoinie anstataŭi la malnovan nebulecan idearon de Zamenhof.

Nature, tiu propagando ne povis havi sukceson, ĉar tian ideismon reale bezonas nek la gvidantoj el la mondo kapitalista, nek la revoluciemaj klaskonsciaj laboruloj, venintaj al esperanto.

Krome, tiu ideismo estis esence same nebula kaj same ne klara, kiel la antaŭmilitaj altinspiraj paroloj pri la «kara lingvo» kaj la «alta ideo».

La konsideroj kaj metodoj, per kiuj la gvidantoj de la esperanta movado provis labori kaj konkuri, estis en la postmilita kapitalista socio esence la samaj, kiel en tempo antaŭmilita. Se antaŭ milito rivalis firmao Hachette kaj la Esperantista Presa Societo, nun rivalis novaj homoj kaj novaj eldonejoj. Tiun rivaladon partoprenis same la oficialaj gvidantoj de la movado kaj ankaŭ izolaj, inter si konkurantaj, entreprenistoj. Posedanto de Berlina esperanta librejo kaj redaktoro de «Germana Esperantisto» Fr. Ellersiek konkuris kun Teo Jung, eldonanto de la «Heroldo de Esperanto» en Köln. Tiu konkurado kaŭzis agojn kaj parolojn ofte tute ne konformajn al iu ajn ideismo. La movado fakte daŭris evolui kaj la lingvo kreski — sen iu ligo kun iu speciala «ideo».

Tamen necesis, ke esperanto retrovu iun idearon, sub kies protekto ĝi povus doni pluan impulson al progresigo de movado, al pliintensigo de esperantista agado. Tian idearon ne povis doni al esperanto la malnova antaŭmilita socio kapitalista. Tian idearon ne posedis ankaŭ la socio kapitalista postmondmilita. Do esperanto progresis iom post iom same, kiel normale progresas kresko de iu ajn planto plantita, sed speciale ne zorgata. Novaj fortoj, novaj ideoj rapidigantaj tiun kreskon, troviĝis en aliaj sociaj tavoloj.





### Esperanto inter laboristoj antaŭ la mondmilito

En la tempo, kiam la nombro de esperantistoj komencis rapide kreski, kiam la esperantistoj komencis propagandon inter diversaj profesioj kaj fakoj, komenciĝis ankaŭ speciala agitado por esperanto inter la laboristoj.

La laboristoj plej ofte partoprenis socian vivadon en organizoj, apartigite de aliaj sociklasoj. Tial esperanto-propagando inter laboristoj povis pleje efiki nur kondiĉe, ke tiu agitado estu efektivigata per specialaj laboristaj esperanto-organizoj. Tial la intelektuloj esperantistoj — de la unua tempo, simpatiantaj al la laborista movado, iniciatis kreon de specialaj laboristaj esperanto-organizoj. Jam en la j. 1903—05 fondiĝis unuaj laboristaj esperanto-grupoj. En la j. 1906 dum la Ĝeneva esperanto-kongreso okazis la unua internacia kunveno de «ruĝuloj-esperantistoj». Samjare en Parizo komencis esti eldonata speciala biblioteko de revoluciemaj esperantistoj — «Paco-libereco».

Ĉe la komenco de la mondmilito, apud pluraj fakaj, profesiaj esperanto-unuiĝoj kaj uzolitaj diverslokaj laboristaj grupoj, — ekzistis naciaj laboristaj organizoj en Holando, Bohemio, Germanio kaj Francio. Vigle laboris la internacia laborista unuiĝo «Liberiga stelo», regule eldonanta sian gazeton «Internacia Socia Revuo». Ankaŭ la suprecititaj naciaj laboristaj esperantistaj organizoj havis siajn proprajn presorganojn.

Ne multaj estis ankoraŭ la laboristaj esperantistoj, sed ili prezentis jam certan organizitan anaron. Ili ne estis logitaj per iu interna ideo. Ili pretendis meti la internacian lingvon al dispono kaj bezono de siaj klasidealoj. La gvidantaj centroj de la 2-a Internacio kaj same la naciaj socialistaj partioj malmulte atentis esperanton kaj ignoris laboradon de esperantistoj. Nur plua persisto povis ŝanĝi tiun rilaton, same kiel persista laboro en kampoj aliaj ŝanĝis rilaton de alifakaj aŭtoritatoj al la internacilingva movado.

Komenciĝis la mondmilito. La grupoj laboristaj daŭris ekzisti, sed tute ĉesiĝis iu internacia laboro kaj kunligo. La laborista esperantista movado ĉesis kreski kaj elmontri sian vivkapablecon.

### Renaskiĝo de laborista esperantomovado post la mondmilito

Tamen revigliĝis agado de laboristaj esperantistoj tuj post ĉeso de la milito. Pliakriĝinta interklasa malkonkordo ankoraŭ pli, ol



antaŭ la milito, postulis, ke la laborista esperanto-movado apartigu de la movado neŭtrala, sole celanta sian pacan evoluon en la kadroj de burĝa socio. La uragano de revolucioj, skuintaj la malnovan mondon, ŝajne promesis ŝanĝon de la tuta soci-ordo, promesis, ke baldaŭ la laboristaro fariĝos kondukanto de la nova socio. Tio sendube devis certamane influi ankaŭ pluajn vojojn de esperanto-evoluo. En la komenco de la kreskanta revolucia ondo — multaj esperantistoj ekpensis, ke ilia lingvo pleje povos servi ĝuste al la ribelantaj laboristaj amasoj.

Tiam en la esperantista movado oni komencis pli atenti la laboron faratan inter la laboristoj. En la ĉapitro IX ni jam vidis, ke eĉ E. Privat estis inter tiuj, kiuj, atendante alvenon de la nova soci-mastro, partoprenis koketadon kun la revoluciemaj laboristaj esperantistoj. Inter la atendantoj de la socia ŝanĝo estis ankaŭ Krestanov, pioniro de bulgara esperanto-movado, kiu dum la j. 1921 aktive kunlaboris en la gazeto «Laborista esperantisto», kaj poste en la jaro 1928 trompis la esperantistan laboristan asocion per pluaj agoj nelojalaj. Tia ja estas la ĝenerala kutimo inter diversaj akompanantoj de la laborista movado — esti kun ĝi ĉe ĝia kresko kaj lasi ĝin ĉe ĝia halto aŭ malantaŭeniĝo.

Plua kresko de la revolucia ondaro instigis al plia apartigo de la movado laborista, al eltrovo de novaj formuloj, taŭgaj por unuigi kaj gvidi la laboristan kaj revoluciemaman esperantistaron.

### **E. Lanti kaj Sennacieca Asocio Tutmonda**

Tiutempe venis al la laboristaj esperantistoj E. Lanti el Parizo.

E. Lanti estis persono devenanta el la popolamasoj. Per persista laboro li atingis certan gradon de klereco. Dum la mondmilito li konatiĝis kun esperanto. Baldaŭ li estis fervora kaj bona esperantisto. Post la fino de mondmilito li komencis eldonadon de la gazeto por francaj laboristaj esperantistoj. En la j. 1921 tiu monata gazeto akceptis nomon de «Sennacieca Revuo», kaj ankoraŭ pli poste ĝi fariĝis ĉiusemajna sub la nomo «Sennaciulo».

Komence Lanti celis ĉefe propagandon de esperanto ĉe laboristoj. Li grupigis ĉirkaŭ si la malnovajn membrojn de la antaŭmilita «Liberiga Stelo». Pliakrigo de klasa antagonismo postulis tamen pli klaran difinon de celoj kaj taskoj, ol tio estis ĉe la Liberiga Stelo. Tial jam en la jaro 1921 la laboristaj esperantistoj, kunvenintaj dum la XII-a kongreso universala en Praha fondis novan «Sennaciecan Asocion Tutmondan» (SAT), tute sendependan de la tiel nomata neŭtrala esperantomovado. Nur per tia apartigo iĝis ebla pli sukcesa, pli komprenebla por laboristoj propagando de esperanto en la rondoj laboristaj.

Jam kiel sekvo de tiu apartiĝo — estiĝis, ke la laborista esperanta movado komencis ĉiam pli kaj pli el la movado poresperanta fariĝi movado peresperanta.



Ĉe la fondo de SAT estis proklamite, ke esperanto estas por SAT ne celo — sed rimedo, ke SAT celas esti unuavice organizo klasbatala.



E. Lanti

Kun ĉiu jaro tiu proklamo fariĝis el simpla vortdeklaro ĉiam pli serioza socia realaĵo.

La nomo Sennacieca, donita al la nova asocio, estis kvazaŭ prenita el la antaŭmilita idearo de la «Liberiga Stelo», principe neanta por la avangarda laboristaro iun ajn neceson organizi sin en kadroj naciaj aŭ landaj.

SAT kreskis rapide kaj baldaŭ havis siajn membrojn en ĉiuj landoj de la mondo. Speciale en Sovetio ĝi estis la sola internacia esperantista organizo, havanta konsiderindan kvanton da adeptoj. Ĉiujare estis aranĝataj specialaj kongresoj de SAT, kiujn partoprenis centoj da SAT-anoj. Direkcio de SAT estis elektata laŭ metodoj demokratiaj de la tuta SAT-anaro. Same estis fiksataj §§ de la Statuto de SAT kaj ĝiaj taskoj.

La apogeo de revolucia situacio en Eŭropo en la j. 1922—23 kaŭzis, ke plej maldekstraj partoprenantoj de SAT kaj, inter ili certa parto de Sovetiaj SAT-anoj, ekvolis preni SAT fakte kaj eĉ formale sub la gvidadon de Komintern.

Tiam E. Lanti, estinte anarkisto kaj estante membro de franca komunista partio kontraŭstaris al tiaj intencoj. Atentante malfortecon de la laborista esperantistaro, li insistis, ke SAT restu, almenaŭ por la nuna tempo organizo sendependa de iu ajn politika partio.

Malgraŭ tio, ke la SAT-anaro tiutempe estis en sia amaso pleje, se ne organizitaj membroj de komunistaj partioj—tiam simpatiantoj al ili,—la argumentoj de E. Lanti estis atentitaj. SAT daŭris ekzisti kiel politike-neŭtrala laborista organizo, celanta per sia ekzisto kaj laboro servi al internaciaj bezonoj de sia klasbatala membraro.

SAT daŭre kreskis kaj je la j. 1929 atingis ŝatindan nombron da 7 000 membroj. Ankaŭ kreskis la eldonagado de SAT. Krom multaj valoraj tradukoj, SAT entreprenis ankaŭ gravan por la tuta esperantistaro eldonadon de Plena esperanto-esperanta vortaro.

SAT fariĝis atentinda faktoro en la movado mondlingva, ne nur pro sia ideologia proksimeco al la plej avangardaj sociaj movadoj, sed ankaŭ pro sia organiza forto, pro discipliniteco de sia rapide kreskanta membraro.



## Sennaciisma celado de SAT

Venis tempo, kiam la ribelaj ondoj inter la eŭropa laboristaro komencis malkreski, kiam post la j. 1924—25 oni ekparolis pri stabiliĝo de kapitalismo, pri sanigo de kapitalisma ekonomio. Parto de laborista klaso, senesperiginta pro siaj malvenkoj, pro perfidoj de siaj gvidantoj, — akcelis retiriĝon el aktivaj klasbataloj. Certaj laboristoj pensis, ke tio estas ebla, ke tia interrompo estas necesa por reorganizi siajn fortojn kaj por plialtigi la klerecon kaj la kulturan nivelon de laboristaro.

Tiam ankaŭ la SAT-gvidantoj komencis pleje akcenti sian kultur-laboron. SAT pretendis esti ĉiam organizo supernacia. Gvidantoj de SAT laŭte proklamis ĉiam, ke la laboristoj ne havas patruon. Sed dum la Göteborga kongreso de SAT (1928 j.) Lanti deklaris, ke SAT ne devas insisti pri tiu punkto, ĉar al social-demokratoj, akceptantaj la ideon pri patruo, — tiu punkto ŝajnos neakceptebla. Tiamaniere estis farita riverenco antaŭ la dekstra alo en la laborista movado.

Kiam apud tiu ŝanĝo de la pozicio en SAT-organoj estis ĉesigita aktiva por-revolucia propagando, — tiam SAT ricevis subtenon de ortodoksaj social-demokratoj. Ankaŭ la aŭstria social-demokratoj, membroj de Aŭstria Laborista Ligo Esperantista, ĝis nun ne partoprenintaj en SAT, decidis aliĝi ĝin kaj partopreni en ĝiaj laboroj.

Tia laso de krudaj klasbatalaj pozicioj devis efiki kvazaŭ bonfare por SAT en multaj kapitalistaj landoj. Dum la unuaj jaroj de sia agado SAT en siaj eldonaĵoj kaj gazetoj elmontris tian gradon da revoluciemo, ke ĝi estis malpermesita en multaj landoj: Hungario, Italio, en Balkanaj landoj ktp. La plifortiganta reakcio povis kaŭzi similajn pli aŭ malpli krudajn sekvojn por SAT ankaŭ en landoj aliaj. Tio devis ĝeni, malfortikan eĉ sen tio, ekonomian bazon de SAT. Ĉio-ĉi kaj eble ankaŭ kelkaj privataj konsideroj signalis neceson de rapida retiriĝo. Lanti estis francŝtata instruisto, kaj sendube la burĝe-ŝtata registaro kapabla lin finfine maldungi, por tiamaniere per persona bato suferigi la tutan movadon.

Dum longaj jaroj E. Lanti estis membro de la franca komunista partio. Tio ne malhelpis ke en SAT partoprenu anoj de diversaj politikaj tendencoj. Tio ne malhelpis al la fakto, ke SAT-estraro neniel provis trudi la komunistajn ideojn kaj konceptojn al siaj membroj. SAT estis kaj daŭris esti eksterpartia klasbatala organizo. Nun, kiam en la j. 1928 Lanti iris for el la komunista partio, ĉio tamen ŝanĝiĝis.

Necesis argumenti kaj pravigi sian reiran taktikon. Ne eblis klare deklari pri kaŭzoj de tiu reiro, pri la hezitoj kaj duboj kreskantaj. Kaj tiam la SAT-gvidantoj komencis, laŭ sia gusto, teorie fundamentigi la sennaciismon.

Siatempe en la j. 1923, dum la brule-revolucia situacio, esperantistoj — partianoj de Komintern akre riproĉis tiun terminon sennaciismo. Ili asertis, ke ĝi enhavas ŝatindan parton de idealisma koncepto. Ilia opinio — sennacia socio estos efektivigita nur per ekonomiaj sociaj ŝanĝoj kaj neniel per akcepto de lingvo universala, kiu mem kapabla univer-



saliĝi nur dank'al ŝanĝo de la socia ekonomio. Tamen la komunistemaj esperantistoj ne iris for el SAT. Ili ĉesis insisti pri tiu punkto, ĉar la ĉefaj anaroj laboristaj esperantistaj trovis en la ideo «sennacia» tiun organizan forton, kiu anstataŭis por ilia agado la neŭtralecan «internan ideon». Kaj por la komunistemaj esperantistoj la problemo de sennaciismo mem prezentiĝis kiel la ordinara marksane komprenata «internaciismo» plus aldonata «lingvo internacia».

Dum tiu komenca por SAT periodo sennaciismo estis direktita kontraŭ «internaciismo» de la II-a Internacio, fakte bonuzanta naciisman ideon kiel ŝimilon kontraŭ iu ago internacie revolucia. Dum certa tempo sennaciismo do estis movado — esence revolucia kaj klasbatala.

Nun la situacio ŝanĝiĝis. Kulturiga batalo por sennaciismo devis, laŭ opinio de SAT- gvidantoj, ne enhavi plu iujn elementojn de klasbatalo revolucia. Lanti — fariĝis teoriisto de sennaciismo. En siaj verkoj «La laborista esperantismo», «Naciismo» k. t. p. li penis eltrovi la historian kaŭzon de la nacieca ideo, ĝian danĝeron por nuntempo kaj speciale — por la klaso laborista. Lerte argumentante, li prezentis la faktojn tiel, kvazaŭ batalo kontraŭ nacia ideo estas tiom grava, ke jam al tiu sola ideo devas esti de iĉataj ĉiuj fortoj de SAT-anoj. Anstataŭ klare esprimita monisma koncepto de la historia evoluo — li provis pruvi, ke la mondon influas du ligitaj, sed tamen memstaraj fortoj — la ekonomio kaj la socia idearo. SAT-anojn li vokis batali speciale en la kampo de la ideoj, lasante tute la kampon politikan kaj ekonomian.

Vere ankaŭ pli frue Lanti kelkfoje esprimis similajn ideojn, sed ĝis tiu tempo tiuj ideoj neniam estis prezentataj kiel certa detale argumentita teorio. Aldone en tiuj liaj teorioj bone respeguliĝis tendencoj de dekstremaj politikistoj en laborista movado — limigi la klasbatalon nur per kampo strikte ekonomia, celanta nur altigon de salajro por laboruloj.

Tiuj novaj ideoj de Lanti estis plene akcepteblaj por ĉiuj malnovaj esperantistoj, por ĉiuj timantaj senperan klasbatalon, por ĉiuj malesperintaj je sukceso de tia batalo. Lanti estis same subtenata de reprezentantoj de tiuj politikaj partioj, kiuj ĝenerale celis eviti iun senperan batalagon kaj kiuj konjektis, ke ŝanĝo kaj evoluo de la nuna socia ordo okazos iom post iom en maniero de ideoj kulturaj bataloj.

Sed ne povis akcepti la idearon de Lanti — revolucianoj, necelantaj ligi esperanton kun iu speciala ideo, ne akceptantaj la dualisman teorion de Lanti, — la konsekvencaj monistoj kaj klasbatalaj marksanoj. Dum la IX-a Leipziga kongreso de SAT en la j. 1929 estis laŭte proklamita tiu malkonsento. Depost la j. 1929 tiuj esperantistoj komencis elmontri certan retenemon kontraŭ la SAT-organizo kaj idearo.

### Splitiĝo de laborista esperanto-movado

SAT-organizo, SAT-eldonaĵoj komencis perdi iom post iom sian karakteron de aktuala klasbatalo. Tamen tiuj elementoj de klasbatalo ankoraŭ en pli akra formo montriĝis en la agado de aliaj laboristaj



esperanto-organizoj. La laborista esperanto-movado komencis elmontri samajn tendencojn de frakciigo, kiel la ĝenerala laborista movado.

En la j. 1929 el Hungara laborista esperanto asocio estis eksigitaj pli ol 100 anoj — ne ortodoksaj social-demokratoj. Pluraj grupoj de laboristoj esperantistoj el la tuta mondo protestis kontraŭ tiu ago. Same disfalis la Berlina laborista esperanto-grupo, el kiu foriris la social-demokratoj, tuj kiam ĝia gvidado trafis en manojn de komunistoj.

Dum la VIII kongreso de Germana Esperanta Laborista Asocio en Essen en la j. 1930 okazis batalo inter komunistemaj kaj social-demokrataj membroj, kiu difinis karakteron de plua direktado kaj de plua laborado de tiu Asocio.

Inter SAT-membroj ekagis specialaj frakcioj — komunistaj kaj socialdemokrata, preparantaj sin por estonta luktado pri la gvidado de SAT. Membroj kun anarkistema tenenco forlasis SAT ankoraŭ en la j. 1925 kaj jam tiujare fondis sian apartan Tutmondan societeton.

Ĉe tia grupigo de esperantistoj-laboristoj laŭ la partiaj tenencoj — fariĝas senvalora eventula rolo de ĉiuj batalantoj por iu speciala esperanta «sennaciismo». Vole aŭ ne vole, ne povante formi iun fortan anaron, ne povante doni bone argumentitan idearon, tiuj batalantoj estos devigitaj aliĝi al unu el batalantaj frakcioj. Logiko de batalo instigos ilin aliĝi al la pli pacema, dekstra alo, al la social-demokratoj, en kies senforma kulturprogramo trovas ĝustan lokon ankaŭ la kulturaj sennaciigaj ideoj, praktike realigotaj nur dum malproksima estonto.

Evidentas, ke la unueca laborista esperanto-movado splitiĝas, kaj ke el la rezultintaj splitoj de antaŭe unueca movado plej multe sukcesos tiu, kiu ligas sian estonton kun la estonto de sukcesonta politika laborista partio. Kaj la aliaj splitoj — ili perdos sian valoron, ĉar ili perdos iun ligon kun la idearo antaŭenpuŝanta la modernan socian evoluon.

Dum la tuta paso de la mondhistorio estis ĉiam nur du vojoj libere elektotaj — ĉu antaŭen, ĉu malantaŭen. Nek halton, nek flankiron la historio povas pravigi.

## Esperanto-movado en Sovetio

Necesas diri kelkion pri la movado esperantista en Sovetio, en Rusio — la iama lando de la unuaj esperantistoj.

Ĝis la j. 1917, kiam estis renversita la carismo, — esperantismo estis suspektata de la registaro. Esperantistoj estis konsiderataj kiel homoj ne fidindaj. Ilin atentis la politika polico. Ankoraŭ unu monaton antaŭ la februara revolucio de la j. 1917 — la petrograda guberniestro trovis necesa malpermesi preson de esperanto-gazeto. Kaj ĝuste tiu-kaŭze — ĉiu esperantisto en tiu lando premegita, sen iu ajn elmontro de politika libero, estis certagra de idealisto, revanta pri iuj altaj idealoj, malsamaj al la ĉirkaŭa krua realeco. Rusiaj esperantistoj staris plej malproksime de tiuj luktoj demokratiaj, aŭtokrataj monopoligaj, kiuj efektiviĝis en Okcidenta Eŭropo. Ili uzis la lingvon. Ili dorlotis ĝin,



kiel internan apartenaĵon de sia idearo. Kaj tial speciale en Ruslando plej longe daŭris ekzisti portantoj de la interna ideo esperantisma.

La konsisto de la esperantistaro ruslanda estis multe pli unuforma ol en landoj eŭropaj. Ĝi konsistis ĉefe el intelektuloj trovantaj en esperanto certan ripozon de la nube griza socia vivado en la cara despotio. Personoj similaj al A. Postnikov (vidu ĉap. VIII) estis inter rusiaj esperantistoj — afero neofta kaj escepta.

Kiam okazis la rusiaj revolucioj de la j. 1917, ĉiuj fortoj sociaj kaŝitaj ekbrulis per ardeco neniam vidata. Pasioj politikaj kaj klasa antagonismo malantaŭenpuŝis problemojn kulturajn, malpli gravajn. Inter ili ankaŭ esperanto estis malatentita. Certe estis eĉ politikaj organizoj, formale deklarintaj sian simpatian por la lingvo internacia, sed la kruda realaĵo instigis la popolajn tavolojn kaj la registaron zorgi pli pri milito, pri pano kaj karbo ol pri esperanto.

Dum pezaj jaroj 1917—1921 la neorganizita ruslanda esperantistaro daŭris ekzisti, daŭris dorloti sian lingvon, esperante ke tiu lingvo ĉe internaciaj tendencoj de la nova revolucia registaro siatempe trovos akcepton, komprenon kaj favoron.

Kelkaj koncernaj administraj decidoj kaj agoj de lokaj ŝtataj kaj politik-partiaj aŭtoritatoj kvazaŭ promesis pravigon de tiuj atendoj.

En la j. 1921 dum la III Tutruslanda kongreso esperantista estis proklamita fondo de Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU). Sed la malfacila ekonomia situacio, multkomplikaj politikaj problemoj — ĉu enlandaj, ĉu eksterlandaj — multe ĝenis la movadon kaj ne permesis, ke la ŝtato aŭ vasta publiko komencu pli serioze okupiĝi pri la lingvo internacia.

Nur en la j. 1925 komenciĝis ŝanĝo de la situacio.

Tiujare la aŭtoritataj institucioj proklamis neceson de starigo de konscie gvidata internacia eduklaboro por la amasoj laborulaj.

Tiu eduklaboro ne estis efektivebla sen internacia korespondado. Por internacia korespondado necesis lingvo. Kaj siajn servojn al la vasta publiko proponis la esperantistoj. Laboro, kiun ili faris ĝis tiam nur por si mem, fariĝis nun publika bezonaĵo. Granda parto de korespondadoj interŝanĝataj estis en esperanto. Tio tiris atenton de la aŭtoritatoj al esperanto kiel al atentinda kultura faktoro.

Kiam en la j. 1928, kun plua kresko de tiu internacieca kulturkleriga laboro estis proklamita la neceso, ke ĉiu laborulo studu fremdajn lingvojn por tiamaniere povi pli intime ligiĝi kun eksterlandanoj — ree estis la sovetiaj esperantistoj, kiuj atentigis la aŭtoritatojn kaj la publikon pri esperanto.

La esperantistoj ne pretendis, ke la laborularo studu esperanton anstataŭ fremdaj lingvoj, sed ili konstatis multoble pli facilan ellernon de esperanto kompare kun fremdaj lingvoj naciaj, kaj ili atentigis, ke esperanto-studo estas ŝatinda ponto por pli facila pliposta ellerno de aliaj lingvoj eŭropaj.

Tia taktiko estis plej efika. En multaj lokoj diversaj aŭtoritatoj — ĉu ŝtataj, ĉu sindikataj, ĉu partiaj — komencis subteni esperanto-



movadon, helpi al ĝia gvidado kaj organizado. La movadon prenis sub kontrolo kaj gvido jam ne izolaj aŭtoritatuloj sed certaj publikaj vastamasaj institucioj.

Tio okazis unuafoje dum la tuta historio de esperanto-evoluo kaj tio povos doni plej belajn rezultojn dum estonto. Esperanto ĉesis esti propraĵo nur de esperantistoj. Ĝi fariĝis publike taksata kultura valoro.

### **Rolo de sovetia esperantistaro en la ĝenerala esperanto-evoluo**

Tiujn favorajn elmontrojn por ĝenerala akcepto de la ideo de lingvo internacia ĉe aŭtoritatoj, same kiel ĉe la amasoj sekvis bonsukcesa organizo de la jam ekzistantaj fortoj esperantistaj.

La tuta movado estis centralizita, kio ebligis koncentrigon de ĉiuj realaj fortoj de la movado, laŭplanan agmanieron kaj ŝparadon de la resursoj. Al SEU venis multaj fortoj kulturaj kaj intelektaj el la vicoj de antaŭaj ruslandaj esperantistoj. Dank'al tiuj fortoj SEU, akceptanta la principojn de revolucia klasbatalo, — fariĝis intelekte plej forta inter la aliaj landaj laboristaj asocioj. Same en SEU — kompare kun tiuj pliaj asocioj troviĝis plej kompetentaj konantoj de la problemo internacilingva. De post la j. 1926 Centra Komitato de SEU komencis grandan laŭplanan eldonon de efika science bazita propagando kaj lerna literaturo. Dum kvin jaroj laŭkvante aperis en Rusio pli da verkoj pri esperanto ol estis aperintaj dum la tuta daŭro de esperanto-ekzisto. Fortoj devige dormintaj dum la epoko carisma nun brile disvolviĝis.

SEU sukcesis efektiviĝi en Sovetio la saman por kio batalis en antaŭmilita periodo la parizaj esperanto-gvidantoj (vidu ĉap. IV, V). Ĝi efektivigis plenan monopoligon de esperanto-eldonaĵoj, kiun akcelis Hachette. Ĝi kreis Centron absolute aŭtoritatan por gvidado de propagando kaj de organizo, kiun akcelis krei Bourlet kaj Sebert. La diferenco estis nur tio, ke la parizaj gvidantoj celis ĉi-ĉion efektiviĝi pro siaj apartaj interesoj, kaj SEU ĉi-ĉion efektivigis por la interesoj de publika organizo esperantista, unuiganta ĉiujn aktivajn fortojn de la Sovetia esperantistaro.

Per sia centrigita organizo, per siaj konceptoj socie kaj lingvo-science senriproĉaj, per sia dialektika argumentado, per la lernolibroj ellaboritaj laŭ statistika scienca metodo (Rublev) — SEU ne nur ricevis certan atenton ĉe la sovetia publiko. Ankoraŭ plie — ĝi trudis sian idearon, siajn konceptojn kaj siajn labormetodojn al la organizitaj laboristaj esperantistoj eksterlandaj.

SAT inter siaj eldonaĵoj presis ŝatindan nombron da verkoj, apartenantaj al plumoj de sovetiaj esperantistoj. Ankaŭ la gazetoj de SAT grandparte estis plenigataj per verkoj de sovetianoj.

Kiam SAT-gvidantoj komencis elmontri diversajn emojn — revizii la klasbatalan esperantisman kaj la kulturen esence-esperantistan problemon ŝovi antaŭ aliaj aktualaj soci-problemoj — SEU-anoj estis la unuaj protestintoj.



Tamen SEU ne apartiĝis de SAT, sed daŭris kunlaboron, celante inter la eksterlandaj laboristoj esperantistoj konservi elementojn, uti-geblajn por la vaste-gvidata internacieca eduklaboro, kaj samtempe helpi al plia levo de kultur-nivelo de tiuj elementoj, nuntempe reprezentantaj en la Okcidenta esperantistaro la monistan revolucie materialistan mondkoncepton.

Ĉi-ĉio vole aŭ ne vole instigas konjekti, ke esperanto, naskiĝinta en Rusio dum pezaj jaroj de carismo, kolektinta kaj konservinta ĝuste tie siajn ideajn trezorojn, — nun en la sama lando, kvankam alinomita, eniras novan fazon de sia evoluo.

La idearo esperanta fariĝas nun—ne nur en Sovetio—poseŝaĵo de vastaj amasoj. Esperanto ne nur en Sovetio jam estas konsiderata de tiuj amasoj kiel certa komune-homa kultura instrumento. Sed kio gravas ankoraŭ pli — estas tio, ke el Sovetio tiuj ideoj, koncernaj metodoj kaj konceptoj estas transplantataj al eksterlando.

Kaj kiel siatempe esperanto el Ruslando venis eksterlanden, tiel ŝajne ankaŭ nun — la novaj fortoj, instigantaj esperanton al plua evoluo, iras el Rusio eksterlanden por tie fari el esperanto — apartenaĵo de izoluloj — apartenaĵon kulturan de ĉiuj modernaj akceloj kaj de vastaj homamasoj.

### **Nova periodo en la lingvo-evoluo**

La literaturo de esperanto daŭre kriskis. En ĉiu periodo — pluan- gian kreskigon helpis tiuj rondoj, kiuj utiligante esperanton praktike, samtempe iel ligis esperanton kun certaj pli altaj ideoj kaj idealoj.

E. Privat asertas, «ke la fakto, ke francoj longe gvidis la tutan esperanto-movadon kaj gazetaron, ne sukcesis meti la lingvon sur relojn analitikajn». (II, p. 191). Supozeble tio okazis ne nur pro la esence originala lingvo-karaktero de esperanto, sed ĉefe pro tio ke la kapitalisma periodo de esperanto-evoluo, dum kiu la francoj ludis ĉefan rolon en esperantujo (jaroj 1900—1914) portis al esperanto nenian plian internan enhavon, neniel sukcesis ligi esperanton kun iuj pli vastaj aspiroj kaj bezonoj de homamasoj. Pure praktika kaj pure aplika, tiu periodo donis al esperanto nenion novan kaj freŝan. La lingvo daŭris ekzisti per la fortoj internaj kolektitaj dum la 1-a ideisma periodo de ĝia evoluo.

Eĉ kreo de specialaj teknikaj terminaroj dum la periodo kapitalisma, eĉ kuraĝa verkado de teknikaj artikoloj, kiun entreprenis R. de-Saussure— en realeco nemulte servis al la lingvo-riĉiĝo, ĉar mankis reala neceso por tiuj terminaroj kaj por tiuj teknikaj artikoloj.

La amaso esperantista restis indiferenta por tiuj eksperimentoj kaj ilin ne bezonis. Tiu tuta verkaĉo restis privata afero de izolaj amatoroj kaj esence malmulte influis la popolan lingvon de esperanta gazetararo kaj de la esperantistaro.

Tute male,—kiam esperanto estis ekuzita por certaj klasaj celoj de la laboristaro—, tiujn novajn formojn kaj esprimojn uzitajn—ekuzis



la amaso mem. Tiu celkonscia laborist-esperantista amaso bezonis tiujn novajn formojn kaj esprimojn. Do ili enradikiĝis forte en la lingvon. Ili servis al pliriĉiĝo de la lingvo.

La nova laborist-klasa ideismo, intime ligata kun la problemo de lingvo internacia, vasta ekuzo de esperanto en kampo de sociologiaj problemoj — donis fortan antaŭenpuŝon al pliriĉiĝo de la lingvo, al ekuzo de novaj lingvo-formoj, al kreo de nova stilo.

Post vegeta'io dum la perio'io de sia propagand'o kaj utiligo en la kapitalisma socio, kiam ĝi d'aŭris ekzisti ĉefe per la fortoj pli frue kolektitaj, esperanto ricevis novan puŝon, kiu ŝetis ĝin al pli alta grado de socia uzebleco, utileco kaj valoro. Kaj grandaparte tiu nova puŝo estis donita de esperantistoj sovetiaj, aktive kunlaborintaj en kreo de novaj sociaj teorioj pri la lingvo internacia, en serĉado kaj eltrovo de novaj pli riĉaj esprimformoj, uzeblaj en la lingvo.


Rimarkin'a riĉiĝo de esperanto-literaturo, novaj formoj, novaj ideoj en la lingvo dum la postmilita periodo—plejgrade venis el la ribela Oriento, el tiuj rondoj, kiuj sukcesis trovi internan ligan inter esperanto kaj la akceloj de homaro al pli bona estonto.

Certagra'e pravas tiurilate la germana lingvisto K. Fossler, skribinta en la j. 1925, ke «antaŭnelonge en gramatikon kaj vortaron de esperanto penetris la internacia bolŝevismo, socialismo kaj komunismo, kiuj intencas ne nur vivi esperanton per siaj ideoj kaj atmosfero, per siaj akceloj kaj enhavo, per sia proleta voĉo, sed kiuj intencas ankaŭ per helpo de esperanto puŝi antaŭen sian politikan propagand'on». Tiuj vortoj de aŭtoritata lingvo-scienculo de la epoko kapitalisma estas plej bona finkonkludo por tiu verko.






### Grafika tabelo pri kresko de la esperantistaro en tutmondo




### Grafika tabelo pri kresko de la esperantista gazetaro





## Resuma statistiko pri la verkaro lerna kaj propaganda en 50 nacilingvoj (1887 — 1928)

1. germana . . . . . 306	19. ĉina . . . . . 12	36. araba . . . . . 2
2. franca . . . . . 245	20. kataluna . . . . . 12	37. judhispana . . . . . 2
3. rusa . . . . . 132	21. greka . . . . . 10	38. kimra . . . . . 2
4. angla . . . . . 121	22. estona . . . . . 10	39. malaja . . . . . 2
5. hispana . . . . . 101	23. armena . . . . . 9	40. tatara . . . . . 2
6. itala . . . . . 85	24. norvega . . . . . 9	41. albana . . . . . 1
7. hol-flandra . . . . . 66	25. hebrea . . . . . 7	42. astura . . . . . 1
8. pola . . . . . 58	26. latva . . . . . 7	43. friula . . . . . 1
9. portugala . . . . . 55	27. litova . . . . . 7	44. latina . . . . . 1
10. sveda . . . . . 54	28. ukaina . . . . . 5	45. slovaka . . . . . 1
11. hungara . . . . . 36	29. persa . . . . . 4	46. tagala . . . . . 1
12. bulgara . . . . . 35	30. turka . . . . . 4	47. visaja . . . . . 1
13. japana . . . . . 32	31. islanda . . . . . 3	48. hindustania . . . . . 1
14. finna . . . . . 21	32. judgermana . . . . . 3	49. flandra-7-a . . . . .
15. dana . . . . . 20	33. kartvela . . . . . 3	50. rutena-28-a . . . . .
16. kroata . . . . . 14	34. serba . . . . . 3	
17. rumana . . . . . 13	35. slovena . . . . . 3	
		entute . . . . . 1568 verkoj



1) Necesas rimarki, ke la lerna kaj propaganda literaturo ampleksas nur 40—50% el la tuta libraro, koncernanta esperanton aŭ presita esperante. Pri laŭjara kresko de la tuta tiu libraro oni povas juĝi laŭ statistika tabeleto, ellaborita de Esperantista Centra Oficejo en la j. 1910. En la j. 1889 estis — 29 libroj, en la j. 1894—88 libroj, en la j. 1899—123 libroj, en la j. 1904—211 libroj, kaj en la j. 1909—1330 libroj.



### Listo de fontoj historiaj.

- I. E. Privat. Historio de la lingvo esperanto, 1-a parto. UEA, Ĝenevo, 1912
- II. E. Privat. Historio de la lingvo esperanto, II-a parto. Hirt & Sohn, Leipzig, 1927.
- III. Prof. L. Ĵirkov. Poĉemu pobeĉil jazyk esperanto? CKSEU, Moskva, 1930.
- IV. K. Brüggemann — Historio de esperanto. F. Adler, Dresden, 1923.
- V. Z. Adam (A. Zakrzewski) — Historio de esperanto. Varsovio, 1913.
- VI. E. Drezen — Historio de mondlingvo. SAT, Leipzig, 1930.
- VII. E. Drezen — Zamenhof. SAT, Moskvo, 1929.
- VIII. L. L. Zamenhof — Originala Verkaro. Hirt & Sohn, Leipzig, 1929.
- IX. CARLO BOURLET. Grupo Esperantista, Paris, 1914.
- X. B. Kotzin — Historio kaj teorio de IDO. Moskvo, 1913.
- XI. Otto Jespersen — Two papers on international language. London, 1921.
- XII. L. Beaufront — Doktoro Louis Couturat, 1868—1914. Frankfurt a/Main, 1920.
- XIII. ZAMENHOF E LA DELEGITARO. Paris, 1914.
- XIV. HECTOR HODLER, LIA VIVO KAJ VERKO. UEA, Ĝenevo, 1928.



## E N H A V O

<b>ANSTATAŬ ANTAŬPAROLO . . . . .</b>	<b>3</b>
<b>I. Za ideisma forto en la komenca periodo</b>	
La grado de ĝenerala prepariteco por akcepto de la lingvo internacia . . . . .	5
✓ La unuaj propagandaj faroj de Zamenhof . . . . .	5
La morala interna idearo de Zamenhof . . . . .	6
La ideaj akceloj de la unuaj esperantistoj . . . . .	7
La rolo de la rusiaj esperantistoj . . . . .	8
<b>II. Provoj organizi kaj reformi la lingvon en la komenca periodo</b>	
✓ Provo doni la gvidadon de la movado en manojn de Amerika Filozofia Societo . . . . .	9
✓ Provo organizi Ligon Esperantistan . . . . .	9
La esperantistoj celantaj reformi esperanton . . . . .	10
Volapukistoj venintaj al esperanto . . . . .	10
✓ Trompeter — mecenato de esperanto . . . . .	11
La reform-projekto de la jaro 1894 . . . . .	12
✓ Postreforma krizo de esperanto . . . . .	13
✓ La gazeto «Lingvo Internacia» . . . . .	14
Provo organizi skriban kongreson mondlingvan . . . . .	15
✓ La rezultoj de la komenca periodo . . . . .	15
<b>III. La propaganda praktikismo de la franca periodo</b>	
L. de Beaufront — iniciatinto de nova periodo . . . . .	16
✓ Novaj metodoj de propagando . . . . .	16
La nova esperantistaro . . . . .	17
La amaso kaj la gvidantoj en la nova esperantistaro . . . . .	18
Metodoj de gvidado de la amaso . . . . .	18
La rivalado kaj konkurado inter la gvidantoj . . . . .	19
<b>IV. Monopoligaj tendencoj en la movado</b>	
La novaj gvidantoj, anstataŭintoj de Beaufront. . . . .	21
Carlo Bourlet . . . . .	21
Progreso de esperanto de post la j. 1900 . . . . .	22
La kontrakto kun Firnao Hachette . . . . .	23
Monopolemo de Hachette kaj Bourlet . . . . .	24
Presa esperantista societo . . . . .	25
✓ Provoj de Zamenhof forigi danĝerojn de la monopolistaj tendencoj. . . . .	25
<b>V. La organizaj problemoj dum la unuaj kongresoj</b>	
Demokratiaj tendencoj kaj la organizo de unuaj internaciaj kunvenoj esperantistaj . . . . .	27
La reformistaj proponoj por la unua kongreso . . . . .	28



Prokrastigo kaj entombigo de reformaj proponoj . . . . .	29
La organiza problemo prezentita al la unua kongreso . . . . .	29
La preparo de kongreso kaj parizaj esperanto-ĉefoj . . . . .	31
La unua kongreso en Boulogne . . . . .	31
Fondo de la lingva komitato . . . . .	32
Centra oficejo esperantista . . . . .	33
Porlingvaj rezultoj de la unuaj kongresoj . . . . .	34
Homaranismaj idealoj de Zamenhof . . . . .	34

## VI. La delegitaro por alprenado de la lingvo internacia

Organizo de la Delegitaro . . . . .	36
Reformemaj ideoj ĉe Couturat . . . . .	37
Beaufront-reformisto. . . . .	39
La komitato de la delegitaro . . . . .	41
Esperantistoj rilatoj al la decidoj de la komitato . . . . .	42
Malkovro de anonimeco de Ido . . . . .	42
Zamenhof kaj la delegitaro . . . . .	44
Rompo de la intertraktado . . . . .	45

## VII. Ido-skismo

Komenco de Ido — movado . . . . .	48
Aŭtokrateco persona en Ido — movado . . . . .	49
La reformado de Ido kaj ĝia disfalo . . . . .	50
La kontraŭ-ida agado ĉe esperantistoj . . . . .	52
Reformistoj kaj demokratioj en la esperantistaro . . . . .	53
Th. Cart — esprimanto de la idearo esperantista . . . . .	54

## VIII. La ĝenerala esperanto-movado post la jaro 1908

Ĝenerala vastiĝo kaj progreso de la lingvo . . . . .	56
Konsisto de la esperantistaro . . . . .	57
La metodoj de propagando . . . . .	57
Utiligo de esperanto por celoj praktikaj . . . . .	58
La regado en Esperantujo . . . . .	58
La opozicio al la aŭtokrata regado . . . . .	59
Zamenhofa foriro el la oficiala esperanto-movado . . . . .	61
Laŭlanda organizo kaj movado . . . . .	62
La gazetaro esperantista . . . . .	64
La lingvo-evoluo . . . . .	64
Falo de aŭtokrata regado . . . . .	65

## IX. La esperanta demokratio

Hector Hodler . . . . .	67
Organizo kaj laboro de UEA . . . . .	68
Hector Hodler dum la milito . . . . .	70
Agitado antaŭ la ŝtat-aŭtoritatoj post la mond-milito . . . . .	71
Rilato de la ŝtatoj al esperanto . . . . .	72
Agitado en fakoj aplikaj . . . . .	73
Postmilita organizo de la neŭtrala esperantistaro . . . . .	75
Internacia Centra Komitato de la esperanto-movado . . . . .	75
E. Privat — publika aganto . . . . .	77
Ideismo en esperanto-movado . . . . .	79

## X. La laborista esperantismo

Esperanto inter laboristoj antaŭ la mond-milito . . . . .	80
Renaskiĝo de laborista esperanto-movado post la mondmilito . . . . .	80



E. Lanti kaj Sennacieca Asocio Tutmonda . . . . .	81
Sennaciisma celado de SAT . . . . .	83
Splitiĝo de laborista esperanto-movado . . . . .	84
Esperanto-movado en Sovetio . . . . .	85
Rolo de sovetia esperantistaro en la ĝenerala esperanto-evoluo . . . . .	87
Nova periodo en la lingvo-evoluo . . . . .	88

Grafika tabelo pri kresko de la esperantista societaro en tutmondo.

Grafika tabelo pri kresko de la esperanta gazetaro.

Resuma statistiko pri la verkaro lerna kaj propaganda en 50 naci-lingvoj (1887-1928).

Listo de fontoj historiaj





## ◆ Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto - Literatura (EKRELO) ◆

ofertas al vi:	mk. g.	Por Sovetio rubl.
Programo de Komunista Internacio . . . . .	1.20	— .60
<b>SOSNOVSKI:</b> La Kvinjaro de Sovetlandoj (riĉe ilustrita) . . . . .	1. —	— .50
<b>VARANKIN:</b> Teorio de Esperanto . . . . .	2 50	1.25
<b>STALIN:</b> Kulturo Nacia k Internacia . . . . .	— 20	— .10
<b>KOLEKTIVO:</b> Cent Tridektri Tagoj (elektitaj skizoj pri Sovet-Hungario), riĉe ilustr. . . . .	2. —	1.35
Preparantoj de milito . . . . .	— ,60	— .35
<b>DREZEN:</b> Analiza Historio de Esperanto (riĉe portretita) . . . . .	1,70	1 —
<b>LAVRENEV:</b> Disrompo ( teatraĵo ) . . . . .	— ,50	— .45
<b>MAJAKOVSKIJ:</b> Per voĉo plena. Rev. poemoj . . . . .	— ,70	— .40
<b>IVNICKIJ:</b> Esperantista Traktoro . . . . .	— ,15	— .07
<b>KUBENSKIJ:</b> Mikaelo . . . . .	— ,25	— .12
<b>CEĤOV:</b> Mia Dialogo kun Poŝtestro . . . . .	— ,25	— 12
<b>KRĴIJANOVSKIJ:</b> Kiel ni konstruas Socialis- mon . . . . .	— ,10	— .05
<b>EJDELMAN-NEKRASOV:</b> Problemo de La- borista Esperantismo . . . . .	— ,50	— .25
<b>ŜERVUD:</b> La vero pri persekutoj kontraŭ religio . . . . .	— ,50	— .25
<b>STALIN:</b> La decidaĵaro . . . . .	— ,30	— .15
<b>BUĤARIN:</b> Financa kapitalo en la papa man- telo . . . . .	— ,40	— .20
Tiel estis en jaro 1917 . . . . .	— ,20	— .10
<b>PESTUN:</b> Ruĝa Talko . . . . .	— ,20	— .10
Nia gvidanto. Kolekto de skizoj Lenin . . . . .	— 30	= 20
<b>MIHAJLOV.</b> Batalante por la metalo . . . . .	— ,20	— .10
<b>RUBLEV:</b> Esperanto-Zirkel (Esperanto-Ron- deto), germanlingva esp.-lernolibro . . . . .	1, —	— .50

Pluraj libroj daŭre aperadas

Mendu ĉe: **E K R E L O**

Leipzig N 24, Löbauer Str. 35 (Germanio). Poŝt-  
ĉeka konto: Leipzig, Walter Kampfrad. N o 13527

Sovetianoj mendu ĉe CKSEU — Spiridonovka, 15,  
Moskvo

Mendoj nur estos plenumataj post antaŭa pago!





Sovetio  
ubl.

.60

.50

.25

.10

.35

.35

—

.45

.40

.07

.12

.12

.05

.25

.25

.15

.20

.10

.10

.10

.0

.0





---

„EKRELO“

Löbauerstr 35

Leipzig N 24

G e r m a n i o .



